


Esperanto
19034/1987
EL POPOLA
ĈINIO

中國報週

1 1987

Esperanto





*Akvuma veturilo sur strato
Ŝakludo sub stratlampe*



TRA NIA LENSŬ

Aŭtuna nokto de Pekino

Fotoj de ŜEN ĈEN

Nokta foiro






En beboĉambro de akuŝejo
Ĉe stando de nokta foiro



En belarta vespera lernejo



p. 2. 1/5



Ĉe stando de etmanĝaĵoj

Gajeco regas en la pekina nokto, en kiu pekinanoj sin amuzas laŭ forta pekina gusto. Ĉu vi iam vidis tian ŝakludon? Ĉiunokte maljunuloj ludas ĉinan ŝakon sub strata lampo ne pro manko de libera loko en sia hejmo, sed pro ia aparta ŝato. Knabinoj kun ĝojo vizitas noktan foiron, kie vendiĝas belaj vestoj, bongustaj etmanĝaĵoj kaj aliaj. Pro okupiteco en tago ili ne povas viziti foiron. Ili pasumas do en nokta foiro. Eble nun venos al ili ŝanco aĉeti al si taŭgan veston. La gaja forno-fajro kaj la laŭtaj krioj de vendistoj forpelas la aŭtunan malvarmeton. Sed multaj pasigas la tempon en altaj etaĝdomoj aŭ en malgrandaj domoj kun kvadrataj kortoj. Nature en la nuna epoko ne mankas junuloj, kiuj ŝatas pasigi vesperon en balo.

En profunda nokto multaj ankoraŭ laboras. Lernantoj studas diligente por akiri pli da scioj. Flegistinoj ameme nutras bebojn per lakto. Akvumaj veturiloj moviĝas surstrate. La antikva urbo, saturita de moderna civilizacio, eniras kun nova aspekto en novan tagon.



Ĝojo en malgranda familio

En balo



Enhavo

Komence de la nova jarcento	2
Progresas la reformo de ekonomia sistemo de Ĉinio	3
VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (1): Jangzi — la plej granda rivero de Ĉinio	66
Grandioza sporta manifestacio en Azio	14
Vojaĝo en Hulun Bujr (1)	10
MATERIALO: Bela kaj fekunda Hulun Bujr	13
Tekstila industrio de Ŝinĝjang	7
JUBILEA JARO DE ESPERANTO: Esperanto havas pli brilan perspektivon ol iam ajn antaŭe	23
Kvazaŭsonĝaj travivaĵoj	21
ESP-NOVAĴOJ	62
Tute plasta aŭto kaj ĝia inventinto	37
NOVELO: Popola muziko	53
ĈINA LITERATURO:	
Ora tempo por prozo (II)	58
Bovdistranĉo	61
Fingra pikturo de Liŭ Ĝongdong	39
ĈINAJ ARTOJ: La antikva skulpturo de Ĉinio	32
Korban-festo en Kaŝi	29
ĜENROJ DE ĈINAJ NACIMALPLIMULTOJ: Nupto de uĝuroj (Kolora bildoserio)	49
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Ĉinaj alkoholaĵoj	46
ĈINAJ POŝTMARKOJ: Poŝtmarkoj pri loĝdomoj (Kolora bildoserio)	52
Eventualaj damaĝoj de novaj teknikoj	64
AMUZO	43
KURANTAJ AFEROJ	44
SUR LA KOVRILO: Nupto (Pentraĵo pri moro de tuĝja-oj kaj mjaŭ-oj en okcidenta Hubej-provinco) de ŜJANG ĜIJIAN	
TRA NIA LENSŬ: Aŭtuna nokto de Pekino (Kolora bildoserio)	

JARABONTARIFO	Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00		
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50											

KOMENCE DE LA NOVA JARCENTO

Alvenas la jaro 1987. Por ni esperantistoj ĝi estas jaro eksterordinara — ĝi alportas la centjaran jubileon de nia Internacia Lingvo kaj enkondukas la duan jarcenton de nia movado. Nun ni staras komence de la nova jarcento.

La redakcio de El Popola Ĉinio ĵus travivis du eventojn: la jubileo de ĝia 35-jara ekzisto kaj la 71-a UK. Freŝaj memoroj daŭre sentigas al ni la varman amikecon kaj helpemon de niaj kunlaborantoj kaj legantoj. Ni vidas belan perspektivon de nia gazeto kaj de la nobla afero iniciatita de d-ro L.L. Zamenhof. Kun kora ĝojo kaj memfido ni renkontas la pli brilan jubileon de la centjara ekzisto de Esperanto.

Por celebri la jubileon, ni malfermis specialan rubrikon "Jubilea Jaro de Esperanto", en kiu ni ne nur raportos per vortoj kaj fotoj pri festaj aktivadoj de landaj kaj internaciaj Esperanto-organizoj, sed ankaŭ aperigos artikolojn pri la teorio, historio, praktika apliko de la Internacia Lingvo kaj pri ĝia kreinto. Ni publikigos ankaŭ raportojn pri gravaj aranĝoj en Pollando, kie okazos la solena jubilea UK, kaj ni raportos pri la Kultura Festivalo en la jugoslava urbo Zagreb kaj aliaj aktivadoj demonstrantaj la Esperantan kulturon. Ni jam ricevis promesojn de kelkaj amikoj pri kunlaboro kaj ni petas ĉiujn aktivajn legantojn bonvole ion fari por la gazeto, ke ĝi relative plene informu la esperantistaron pri la ĉefaj festaktivadoj en la jubilea jaro. Ni antaŭe dankas ĉiujn, kiuj bonvolos nin helpi en tio.

Post centjara ekzisto kaj sin-ekzercado, Esperanto jam fariĝis kapabla eleganta junulo, kiu rajtas okupi pli altan pozicion en la homa socio. Komprenoble, li ankaŭ devas plenumi pli gravajn kaj pli malfacilajn taskojn kun devosento. La Esperantaj gazetoj estas kaj demonstriloj por vidi la ĉarmon kaj kapablon de la Internacia Lingvo kaj rimedo por plenumi lian servon al la

mondo. Kion do nia gazeto El Popola Ĉinio devas fari? Ni ne kontentas pri la atingitaj sukcesoj. Ni bone konscias, ke ni devas klopodi senĉese por fari la revuon respektinda rivalo al la plej prestiĝaj periodaĵoj en la mondo, por ke ĝi estu konstanta kapabla eksponanto pri la praktika valoro de la Internacia Lingvo. Ni esperas, ke ĉiuj konsciencaj samideanoj kunlaboros kun ni por atingi nian komunan celon.

La kongresa temo de la 71-a UK "Interkompreniĝo, paco, evoluo" tute koincidas kun tio, por kio nia gazeto sin dediĉas de sia naskiĝo. "Interkompreniĝo, paco, evoluo" povus esti akceptita de la esperantistaro kiel devizo por la aktivado dum la dua jarcento. Ja por tiuj noblaj celoj kreiĝis nia Internacia Lingvo! Kaj por pli bone komprenigi vin pri Ĉinio kaj la ĉina popolo, ni aperigos en 1987 la artikoloserion "Vojaĝo laŭ Jangzi-rivero", kaj niaj raportistoj nun diligentas per siaj plumoj kaj fotiloj por detale prezenti al vi aspektojn de la plej longa rivero kaj nutranto de la kulturo de Ĉinio kaj la vivon de la loĝantoj en ĝia vastega baseno. Tion ni decidis fari pro la intereso montrita de niaj legantoj pri la aperintaj artikoloserioj pri la Granda Muro, la Granda Kanalo kaj Tibeto. Ni aldonos al la gazeto novan rubrikon pri "Ĉinaj Artoj", en kiu aperos serioj de fotoj kun koncizaj komentarioj pri la pikturo, arkitekturo, skulpturo, metiartoj ktp. de Ĉinio, kaj la rubrikon "Ĉinaj Poŝtmarkoj" por iom kontentigi la ŝatantojn de ĉinaj filatelaĵoj. Ni konservos la rubrikojn plaĉajn al la legantoj "Por Via Sano", "Por Komencantoj", "Enciklopedieto de Ĉinio", "Amuzo", "Ĉina Literaturo", "Kurantaj Aferoj" k. a. Por plikomformigi la titolon al la enhavo, ni uzos novan titolon "Tra Nia Lenso" por la malnova rubriko "El Reala Vivo de Ĉinio". Kaj krome ni klopodos limigi la longecon de la artikoloj, ke ili estu leĝindaj tamen ne lacigaj.

Progresas la reformo de ekonomia sistemo de Ĉinio

Nun la tajdo de la reformo de ekonomia sistemo disvolviĝas tra la ĉinaj urboj kaj vilaĝoj. Tio estas la plej ŝatata paroltemo kiu interesas ankaŭ nemalmultajn eksterlandanojn. Ili deziras scii pri nia reformo. Ĉi-sube mi iom raportu pri la reformado.

LA REFORMO KOMENCIĜIS UNUE EN LA KAMPARO

Ekde la fino de 1978 la ĉina registaro alprenis serion da rimedoj por ĝustigi la kamparan politikon. Interalie, la plej influhava rimedo estis de marto 1979 unu post alia altigi grandaskale la ŝtatajn aĉetprezojn** de greno, koton, oleo kaj aliaj 15 agrikulturaj produktaĵoj, ke en la jaro la indico de la aĉetprezaro de agrikulturaj produktaĵoj de Ĉinio pliiĝis je 22.1%, kompare kun tiu de 1978. Por tio la ŝtato elspezis pliajn 10.8 miliardojn da jŭanoj (ĉ. 3.7 jŭanoj egalas al unu usona dolaro). Samtempe la ŝtato malaltigis la vendprezojn de parto de agrikulturaj produkto-rimedoj. Dank' al tio, la kamparanoj profitis de la ŝanĝiĝo de prezoj kaj levis sian produktan aktivecon.

Ekde la fino de la 70-aj jaroj, en la ĉina kamparo praktikiĝas la sistemo de familia laŭkontrakta respondeca produktado, fruktodona kaj konforma al la realo de Ĉinio. Ĝi estas administra maniero, kiu karakterizas sin per tio ke admi-

nistrantoj devas subskribi kontrakton pri produktado, unuopa aŭ grupa administrado anstataŭas la unuigitan kolektivan administradon, unueco kombiniĝas kun aparteco kaj la rajto, respondeco kaj profito estas unuigitaj, kondiĉe ke la tera posedanteco restas senŝanĝa. La nova sistemo evitis iamajn egalismen en distribuado de produktaĵoj kaj troan centralizismen en administrado, kio plene elvolvis la aktivecon de la kamparanoj kaj devokonscion esti mastroj de la ŝtato, rezulte de tio rapide disvolviĝas la agrikultura produktado. Ni prenu Siĉŭan-provincon kiel ekzemplon. En 1976 ĝi aĉetis el aliaj provincoj 550 milionojn da kilogramoj da greno, sed nun la pokapa meznombra enspezo de la kamparanoj en la provinco kreskis de 95 jŭanoj en 1976 al 315 jŭanoj; dum la pokapa meznombra porkonsuma greno de 184.5 kg. al 380 kg. Estas solvitaj la vesta kaj manĝa problemoj en la provinco, kies agroj konsistigas 6.7% de tiuj de nia tuta lando, dum loĝantaro 10% de tiu de la lando. Tio estas evidenta sukceso.

La alia reformo en la kamparo komenciĝis vintre de 1983, kiam Ĉinio plenumplekse reformis la administran sistemon de la popola komunumo, establis subdistriktan registaron por plenumi la funkcion de baza regpotenco, apartigis la regpotencan funkcion de la entreprena. Fondiĝis vilaĝana komitato, kiu respondecas pri publikaj

Danke ni ricevis varmajn kuraĝigojn kaj konsilojn de niaj ĉ. 300 amikoj kaj legantoj en la kunsido aranĝita de ni por ili en la kadro de la 71-a UK. En tiu kunsido ni vidis pli klare, ke ni devas pli multe zorgi pri la rubriko "Inter Ni" por pliintimigi nian rilaton kun la legantaro. Kun antaŭdanko ni petas, ke vi, niaj perantoj, kunlaborantoj kaj legantoj, skribu al ni, kion vi volas legi en la gazeto, kiajn opiniojn vi havas pri la aperintaj verkoj en ĝi, kiajn proponojn kaj kon-

silojn vi havas por ni, kion ni devas fari por pli bonigi la distribuadon — unuvorte, kion ni devas fari por ke viaj bezonoj estu pli kontentige plenumitaj. Kaj ni faros por vi laŭ nia ebleco, kvankam limigitaj estas niaj rimedoj kaj kapabloj.

Je la fino ni sincere deziras al vi, karaj legantoj kaj amikoj, feliĉan novjaron kaj multajn sukcesojn en via laboro por amikeco kaj paco!

La Redakcio

aferoj. La antaŭa trinivela administra sistemo — popola komunumo, produkta brigado kaj produkta taĉmento, estas abolita kaj ili tri fariĝis koope-raj ekonomiaj organizoj sendependaj kaj egalraj- taj. Inter ili ne ekzistas tia rilato, ke unu subi- ĝas al alia administre.


Nun en la ĉina kamparo la reformo iras pli profunden. Tio estas aboli la politikon, ke la ŝtato monopoligas la aĉetadon de greno, kotono kaj oleo kaj aĉetas aliajn agrikulturajn produk- taĵojn laŭ difinita kvanto, kaj anstataŭe praktiki laŭkontraktan aĉetadon kaj liberan aĉetadon kaj vendadon. Ĉinio reordigas la ekonomian struk- turon de la kamparo kaj disvolvas porkomercan ekonomion por ke la kamparanoj fariĝu de etpro- duktantoj produktantoj de sociaj komercaĵoj. La politiko estas: laŭ la lokaj aktualaj kondiĉoj aktive disvolvi multspecajn entrepre- nojn, sub la premisoj ne redukti la grenan pro- duktadon. Rezulte de tio, granda ŝanĝiĝo okazis en la rilato inter la ŝtato kaj la kamparanoj. An- taŭe la kamparanoj produktis por plenumi tas- kon donitan de la ŝtato, nun ili produktas por plenumi ekonomian kontrakton aŭ kontentigi la

bezonojn de merkato. Ĝuste pro tio, senprece- dence vigliĝas la kampara ekonomio kaj senkom- pare altiĝas la entuziasmo de la kamparanoj. En la pasintaj kvin jaroj la totala produktovaloro de agrikulturo ĉiujare altiĝis je 11% kaj la pokapa meznombra enspezo de vilaĝanoj je 14%. Tio estis neniam okazinta en la ĉina historio.

EKSPANSIO DE ENTREPRENA MEMSTA- RECO — DEIRPUNKTO DE LA URBA EKONOMIA REFORMADO

En la pasinteco la entreprenoj de tutpopola posedanteco estis regataj rekte de la ŝtato kaj la rajto de la entrepreno estis tute limigita. Oktobre de 1978 oni faris eksperimenton ekspansiigi en- treprenan memstarecon en ses entreprenoj de Siĉŭan-provinco. Surbaze de la sukcesa sperto akirita en la provinco, maje de 1979 Ĉinio faris la saman eksperimenton en ok entreprenoj, kaj en 1980 en Ĉinio estis 6 600 entreprenoj, kie oni faris la eksperimentadon. Post 1981 Ĉinio plen- amplekse efektivigis respondecan sistemon pri ekonomio interne de entreprenoj kaj energie po- pularigis plurspecajn ekonomiajn formojn kaj

Kamparano de Anhuj-provinco Lu Heŝan, kiu funkci- igas sian familian farmejon, en manipulado de traktoro



plurspecajn administrajn metodojn interne de entreprenoj por reguligi la konsiston de la posedanteco. La ŝtato alte taksas la disvolviĝon de urba kolektiva kaj privata ekonomioj. Iuj malgrandaj entreprenoj de tutpopola posedanteco estas donitaj al kolektiva administrado, aliaj estas luigitaj al kolektivo aŭ individuo dum la posedanteco restas senŝanĝa. La entreprenoj de kolektiva posedanteco ne plu praktikas administrajn rimedojn aplikatajn de tiuj de tutpopola posedanteco, sed rimedojn taŭgajn por la entreprenoj de kolektiva posedanteco, kiaj sendependa kalkulado, memrespondeco pri propraj profitoj kaj perdoj, demokratia administrado k. a. Iuj entreprenoj praktikas aliajn reformojn en si, kiaj respondeca sistemo de fabrikestro, malgrandigo de kalkula unuo kaj similaj.

Dank' al la ekspansio de entreprena memstareco, plifortiĝis la vivipovo de la entrepreno kaj ekvigliĝis la urba ekonomio, kaj de tio ankaŭ estiĝis novaj problemoj, kiuj montriĝas ĉefe en nekompleteco de diversaj reformoj kaj nekompleta efektivigo de la entreprena memstareco. Evidentiĝis ankaŭ la kontraŭdiroj inter faka kaj regiona administrado kaj la apartiĝo de la urbo kaj kamparo. De 1981 la ŝtato sankciis la eksperimenton de ĉiuflanka reformo en la urbo Ŝaŝi de Hubej-provinco, Ĉangŝi de Ĝjangsu-provinco kaj Ĉongĉing de Siĉŭan-provinco.

La ĉefaj punktoj de ĉiuflanka reformo estas doni entreprenon al malsuperaĵ instancoj por administrado; doni provinc-nivelan povon de ekonomia administrado al la subprovinc-nivela urbo Ĉongĉing; reorganizi entreprenojn, energie akceli la kombilon de sciencoj kun produktado; reformi la administran sistemon de konstruado kaj fundamenta konstruado kaj organizi kvartalan konstruadon; vigligi cirkuladon kaj reformi la antaŭan cirkulan sistemon hermetikan kun malmulte da kanaloj kaj pluraj gradoj; kaj funkciigi pograndan merkaton de industriaĵoj kaj starigi komercan centron.

Ĝis nun, la nombro de tiaj urboj jam atingis 73.

Kaj krome, oni faris reformon ankaŭ en aliaj flankoj. Ekz., alpreni specialajn politikojn kaj flekseblajn rimedojn en ekstera komerco de la provincoj Gŭangdong kaj Fuĝjan. En 1980 la ĉina registaro ŝanĝis la politikon de unuigita kolektado kaj elspezo kontraŭ la loka financo en la politikon de kolektado kaj elspezo laŭ konkretaj cirkonstancoj de la lokoj.




Kamparanoj de Gaŭ'an-gubernio, Ĝjangŝji-provinco, transportas grenon al tenejo.

PLENE DISVOLVIĜAS LA REFORMO DE EKONOMIA SISTEMO

En la pasintaj du jaroj Ĉinio prenis la urbon kiel la ĉefan punkton de la reformo, kiu disvolviĝis en kelkaj koneksaj sferoj. Unue, pliigi la vivipovon de entreprenoj, precipe tiun de la grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj de tutpopola posedanteco; doni al entreprenoj ĝenerale egalajn konkurencajn kondiĉojn kaj respondecon pri iliaj propraj profito kaj perdo kaj doni al ili ankaŭ la rajton de memstara administrado kaj tiun de memakumulado, memreformado kaj memevoluo. Due, disvolvi merkatan ekonomion, mildigi regadon de prezoj de diversspecaj etkomercaĵoj, permesi fari negocojn de diversaj produktaj rimedoj kaj konsumaj rimedoj ekster la ŝtata plano. Koncerne la entreprenojn de la tutpopola posedanteco oni ŝanĝas la interez-donan sistemon en la impostpagan. Koncerne la fundamentan konstruadon de entreprenoj oni ŝanĝas la monasignan sistemon en la monpruntan de bankoj, tiel rompante la blokadon inter regionoj kaj fakoj, por krei favorajn kondiĉojn al la ekonomia kunlaboro inter entreprenoj, fakoj kaj regionoj en kapitalo, tekniko, produktado kaj cirkulado.

La pordomalfermo al aliaj landoj disvolviĝis pluen. En 1984 Ĉinio malfermis 14 apudmarajn urbojn kaj Hajnan-insulon al la eksterlando. En



En la Limigita Kompanio de Fipoj de Pekino entreprenata de Ĉinio kaj Usono



En la Ĝjamusi-a Kolor-tekstila Fabriko, kiu vigliĝas en kunlaboro kun la Ŝanhaja Sepa Fabriko de Mantukoj

1985 Ĉinio malfermis al la eksterlando la delton de Jangzi-rivero, la delton de Perlo-rivero kaj la tri specialajn ekonomiajn distriktojn de Ŝjamen, Ĝangĝoŭ kaj Ĉjŭanĝoŭ en la suda Fuĝjan. Ĝis la fino de 1985, Ĉinio havis pli ol 2 500 entreprenojn investitajn de Ĉinio kaj aliaj landoj, kune administratajn de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj stariĝitajn per alilanda kapitalo, kaj krome 3 800 en konstruado. La pordomalferma politiko de Ĉinio validas mondscale. Unu el ĝiaj ĉefaj enhavoj estas permesi kaj kuraĝigi investi en Ĉinio. Kaj Ĉinio ankaŭ investas en aliaj landoj. La kunlaboro ekonomia kaj teknika kun aliaj landoj havis novajn atingojn en sia disvolviĝo. En 1985 Ĉinio subskribis 749 kontraktojn pri ekstera

konstruado kaj pri livero de laborfortoj, kun monsumo de 1.19 miliardoj da usonaj dolaroj.

La reformo de ekonomia sistemo en la kamparo kaj tiu en la urbo akcelas la disvolviĝon de la rilato inter la urboj kaj kamparo. Por rompi la apartiĝon kaj izolitecon de la administra sistemo de la urboj kaj kamparo Ĉinio praktikas novan sistemon en siaj kompare evoluintaj regionoj, t. e. urbo gvidas guberniojn. Je la fino de junio 1986, 704 el la 2 028 gubernioj de la lando estis sub la gvido de 151 urboj. Grandpaŝe disvolviĝis ankaŭ la konstruado de la malgrandaj urbetoj, kiuj ludas sian pli grandan rolon en interligo de la urba kaj kampara ekonomioj.

Kun plena disvolviĝo de la reformado kaj plua prospero de la komercaĵa ekonomio de la urboj kaj kamparo, elstariĝas la problemo de makrosuperrego kaj makroadministrado. Ni opinias, ke la mikromalfermo kaj la makrosuperrego estas du egale gravaj flankoj interligitaj. La rekta superrego al entrepreno far la ŝtato paŝopostpaŝe transiros al pera superrego kiel la ĉefa punkto.

Tamen la reformo estas kompleksa kaj profunda. En 1985 aperis novaj problemoj en la reformo de ekonomia sistemo de la urbo, kiaj tro grandskala fundamenta konstruado, ne strikta regado de importado. La reformo de prezaro rekte influis la vivon de popolanoj pro kompare granda kurzaltiĝo, malgraŭ tio ke la ŝtato donis al la urbanoj ian subvencion. Krome, la tradiciaj konceptoj, kutimaj fortoj kaj burokratismo multe malhelpas la reformadon. Tamen, plejparto de la popolanoj profitis kaj profitas de la reformo kaj klare vidas el siaj propraj spertoj, ke la malnova sistemo malhelpas la produktan disvolviĝon, vivnivelan altiĝon kaj ŝtatan prosperiĝon. Tial oni povas diri, ke la ĉina reformo estas subtenata de la tuta socio. Ĉinio estas preta paŝopostpaŝe efektiviĝi la ĝeneralan projekton de la reformo kun solvado de urĝaj problemoj aperintaj en la ekonomia disvolviĝo de ia tempo laŭ bezono kaj ebleco. Ĉinio estas ĉiam¹ firma en reformo kaj strebas fari solidajn paŝojn por ĝin sukcesigi.

¹ *La aŭtoro estas estro de la grupo pri ĉiuflan-ka eksperimento sub la Ŝtata Komisiono de Reformo de Ekonomia Sistemo de Ĉinio.*

² *Ĉinio praktikas la politikon, ke la ŝtato aĉetas grenon, kotonon, oleon kaj aliajn ĉefajn agrikulturajn produktaĵojn de kamparanoj kaj vendis ilin al la konsumantoj.*

Tekstila industrio de Ŝinĝjang

Je mencio de Ŝinĝjang, mi ofte asocias ĝin kun senlima stepo kaj grasaj ŝafoj. En la lastaj jaroj mi pensis ankaŭ pri la produktaĵoj el pelto, lano, viando kaj kotonono. Ĉi-foje en Ŝinĝjang mi propraokule vidis ĝian prilaboran industrion originalan en Ĉinio.

Mi unue vizitis la Ŝinĝjang-an Tekstil-industrian Kompanion. Inĝeniero Ĉjan Ŝin prezentis al mi la ĝeneralan staton de la industrio. Li diris, ke Ŝinĝjang estas unu el la kvar grandaj brutobredaj bazoj de Ĉinio, la peltoj tie produktataj estas grandkvantaj kaj bonkvalitaj. La lano de la loko povas rivali kun internacie fama merinolano. Ŝinĝjang estas ankaŭ fama kotonprodukta bazo. La fekunda stepo prezentas bonajn kondiĉojn por disvolvi la lokan tektilan industrion.

En la lastaj 30 jaroj ĝia tekstila industrio rapide disvolviĝis. La produktovaloro konsistigas dekonon de la totala industria produktovaloro de la Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj la lano, kotonono kaj koncernaj produktaĵoj eksportitaj konsistigas 50% de la eksportitaj produktaĵoj de la regiono.

La lanaj kaj kotonaj tekstilejoj de Ŝinĝjang estas multaj kaj dislokitaj, en kio la aliaj provincoj de Ĉinio ne povas sin kompari kun ĝi. Novaj ŝpinteksejoj konstruiĝis en Gobio. Ekz. la Ĝenerala Tekstila Fabriko "La Unua de Julio" estas granda fabriko kun 100 000 spindeloj, pli ol 3 000 teksmaŝinoj kaj ĉ. 10 000 oficistoj kaj laboristoj. Ĝi distancas de la regiona ĉefurbo Urumĉi je 3 000 km. La kompanio tenas oftan kontaktiĝon kun ĝi kaj gvidas ĝian produkta-

don pere de aviadilo, telegrafo kaj telefono. Nur en la subregiono ili estas 450 tekstilaj fabrikoj, kies malgranda parto estas entreprenata de Ĉinio kaj aliaj landoj. Nun Ŝinĝjang jam havas kompletan tektilan industrion de kotonono, silko kaj lano, kun tinkurado kaj trikado. Ĝiaj kotonaj kaj lanaj teksaĵoj vendiĝas en kaj eksterlande pro sia bona kvalito.

FAJNAJ LAN-TRIKOTAĴOJ

La kaŝmiraj ĵerzoj de la Tjanŝan-a Lan-tekstila Fabriko estas

Diversnaciecaj laboristoj de la Ilia Lan-tekstila Fabriko





En la Ŝihezi-a Koton-tekstila Fabriko



Ujgura laboristino prilaboranta trikotoĵon

fajnaj kaj modfasonaj. Ili havas grandan debiton en 21 provincoj kaj municipoj de Ĉinio kaj vendiĝas en 12 landoj, kaj estas rigardataj en la internacia merkato kiel altklasaj trikotoĵoj. La fabriko estas unu el la unuaj entreprenoj funkciigataj kune per ĉina kaj alilanda kapitaloj, kiujn sankciis la ŝtato en 1980, kaj la unua tia entrepreno en la

Ŝingĵang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Ĝi posedas teknikajn talentulojn. Hongkongaj kaj japanaj teknikistoj direktas ĝian produktadon. Mi vizitis ĝiajn laborejojn de klasifikado-purigado, lano-meĉigado kaj fajna ŝpinado. Forte allogis min la gigantaj lanaj kardomaŝinoj, magiaj lanomeĉigaj maŝinoj kaj neĝblankaj lanomeĉoj. Ĉe la maŝinoj intense

laboris lertaj junaj laboristinoj en blankaj vestoj.

En ĝia eksponejo de produktaĵoj mi vidis diversajn lanajn kaj kaŝmirajn ĵerzojn de viroj, virinoj kaj infanoj, jupojn kaj pantalonojn. La supervestoj havas malsamajn kolumojn, sen aŭ kun butonoj. La modaj vestoj kun diversaj normoj estas okulplaĉaj. Tial ĝia produktaĵo estas laŭdata kiel "Floro sur la Silka Vojo".

KOTONTEKSAĴOJ ĈIAM PLI PRESTIĜAJ

Enirinte la Longfibrakotonan Tekstilan Limigitan Kompanion de Ŝingĵang, mi renkontis ĝian ĝeneralan direktoron kaj inĝenieron Ĵong Keĉin. Li diplomitiĝis el la Ŝanhaja Tekstilindustria Instituto en la 60-aj jaroj kaj nun fariĝis specialisto tiurilate. Li rakontis al mi pri la Ŝingĵang-aj kotonteksaĵoj.

Kotonaj ŝtofoj de Ŝingĵang eniris la internacian merkaton en la komenco de la 70-aj jaroj. Ĝiaj produktaĵoj ĝuis bonan reputacion pro siaj granda fortikeco, blankeco, malmulta malpuraĵo kaj puraj koloroj. En la pasintaj Kantonaj Foiroj ili estis konkure aĉetataj kaj grandkvante eksportataj. Ĝiaj diverskoloraj kotonŝtofoj kun forta nacia gusto, originala stilo kaj malsamaj specoj vekis intereson ĉe diverslokaj komercistoj.

Rumanaj, japanaj kaj hongkongaj fabrikoj faris provan ŝpinadon, teksadon kaj vendon de la bonkvalitaj longfibra kotono kaj tiu maldikfibra de Ŝingĵang kaj akiris kontentigan rezulton, tial ili grandkvante aĉetas kotonon de Ŝingĵang. Ankaŭ alilandaj kaj alilokaj fabrikoj alvenis sinsekve por aĉetado.

LONGTEMPE DEBITAJ SILKAĴOJ DE ŜINGĴANG

Iu inĝeniero de la Tekstil-industria Kompanio de la Ŝingĵang-a Uĝura Aŭtonoma Regiono detale prezentis al mi la silkan industrion de la regiono. Li diris, ke la silkraŭpa bredado de Ŝingĵang havas logan historion kaj famiĝas tutmonde. Antaŭ pli ol 1 400 jaroj Ŝingĵang jam estis grava trapasejo sur la Silka Vojo inter Azio kaj Eŭropo. La tiea silka produktado prosperas de longe. Nun Ŝingĵang ĉefe produktas plurspecajn bonkvalitajn silkojn, tradiciajn manteksitajn silkaĵojn kun helaj koloroj kaj originalaj desegnoj, diversspecajn virajn kaj virinajn silkvatitajn jakojn kaj broditajn silkajn vestojn kun nacimalplimulta stilo, precipe bele fasonitajn graciajn modajn vestojn kaj piĵamojn.

MONDFAMAJ ALTKLASAJ DRAPOJ

Jam antaŭ longe mi informiĝis, ke Ŝingĵang produktas originalajn drapojn. Ĉi-foje mi vidis tiajn drapojn kaj vestojn tie en magazenoj kaj privataj standoj.


La bonkvalitaj drapoj de la regiono ĉiam debite vendiĝas en kaj eksterlande. La lana gabardino gajnis arĝentan medalon de bonkvalitaj produktaĵoj de Ĉinio. Multaj alilandaj fabrikoj faris altklasajn vestojn el la drapo kun marko "Ŝafo-paŝtado", kiuj ricevis laŭdon de klientoj.

Pure lanaj kaj fajnaj estas ĝiaj debitaj drapoj, kiaj gabardino, tartano kaj aliaj. Ĝi produktas ankaŭ diversspecajn naturkolorajn lan-ŝtofojn kaj drapojn por palto.

Mi haste vizitis fabrikojn de tapiŝoj kaj ledaĵoj de Ŝingĵang. Ankaŭ ili impresis min profunde.

Respondeculo de la Ŝingĵang-a Tekstil-industria Kompanio diris al mi, ke la kompanio planas konstrui kaj rekonstrui nombrojn da kotonaj kaj lanaj tekstilaj fabrikoj. Tiuj fabrikoj estos ekipitaj per plej novaj ekipaĵoj produktitaj enlande kaj per importitaj avangardaj ekipaĵoj. Precipe en prilaborado de longafibra kotono, tinkturado kaj postteksta prilaborado la kompanio akceptos alilandan kapitalon por fari kunnan entreprenadon aŭ faros rekompencan negocon kun alilandaj komercistoj. Tio altiĝos la produktan kaj administran nivelon de la Ŝingĵang-a tekstila industrio kaj akcelos ĝian pluan disvolviĝon.

En la kudrejo de la Tjanŝan-a Lan-tekstila Fabriko




Vojaĝo en Hulun Bujr (I)

Kiam mi estis knabo, mi jam sciis, ke en la malproksima Nordoriento de nia lando estas vasta stepo, kie vivas mongoloj. Rajdante sur ĉevaloj ili pelas gregojn da bovoj kaj ŝafoj. Ili nomadas kaj loĝas en jurtoj.

Mi aŭdis ankaŭ, ke tie sin etendas senlima dezerto, malofte vidiĝas loĝdomoj, ofte furiozas sablovento kaj kapricas vetero. Tie oni ne konas printempon nek aŭtunon. Ĉiam regas trosekeco,

*La Maŭzoleo de Sovetiaj Ruĝar-
meaj Martiroj en Manĝoŭli*



alterne tiranas varmego kaj frosto. La loko estas timiga.

Dum multaj jaroj min ĉiam tiklis la aspiro tien vojaĝi, ĝui tieajn pejzaĝojn kaj koni la naciajn morojn. Somere de 1986 la sorto min favoris. La 3-an de aŭgusto mi trajne veturis tien kiel membro de ĵurnalista grupo.

HAJLAR — URBO SUR STEPO


Post du-nokta kaj unu-taga veturado ni atingis Hajlar, la ĉefurbon de Hulun Bujr, tagmeze de la 5-a. Tiam en Pekino tiranis netolerebla varmego, dum en Hajlar estis ne varme, kaj plie vespere kaj matene eĉ iom malvarme pro la alta latitudo. Vere ideala someruma loko.


La urbo Hajlar kun 200 000 loĝantoj estas centprocenta stepa

urbo. Ĝi situas en la centro de la stepo Hulun Bujr. Ĝi estas koncentra kaj prilabora centro de la brutaj produktaĵoj de la stepo kaj ludas ankaŭ la rolon en livero de produktiloj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj. Ĉjan Feng, ĝia vicurbestro, konigis al mi la industrian disvolviĝon de la stepa urbo. En la urbo la ĉefa industrio estas tiu prilabora kun brutaj produktaĵoj kiel krudaj materialoj. Tie funkcias pli ol 130 industriaj entreprenoj de lanŝpinado, lanaj litkovriloj, feltoj, tanado, ledŝuoj, triko, laktaĵoj kaj aliaj kun produktaĵoj de centoj da specoj.

Antaŭ ĉio ni vizitis tanejon kaj viand-prilaborejon en la antaŭurbo. La viand-prilaborejo ĉiujare povas prilabori 200 000

La Fervoja Stacio Manĝoŭli





En la Hajlar-a Lan-tekstila Fabriko

bovojn kaj 600 000 ŝafojn, produkti grandkvantajn ladmanĝaĵojn, kiuj vendiĝas en la enlanda merkato kaj eksportiĝas al islamaj landoj. La tanejo ĉiujare povas prilabori 200 000 bovfeleojn. Ĝiaj landfamaj bovladoj estis transportitaj kiel krudaj materialoj al Ŝanhajo kaj aliaj urboj, sed nun oni povas trovi tie

faritajn ledjakojn, peltaĵojn, plumvestojn kaj aliajn vestojn. Elfabrikiĝinte, ni vizitis la ledŝufarejon de la urbo, kiu prenis de la tanejo produktitan ledon kiel sian materialon. Ĝiaj diversfasonaj ledŝuoj por viroj kaj virinoj nun vendiĝas enlande kaj pluraj urboj mendas ĝiajn ledŝuojn.

En la urbo Hajlar nin plej interesis la urba laktaĵ-farejo, plej granda en Ĉinio. Ĉiutage ĝi povas prilabori 300 tunojn da freŝa lakto. La de ĝi produktitaj lakta pulvoro, butero kaj laktaĵ bombonoj ĉiuj estas landfamaj. La fabriko subskribis kontrakton pri lakto-aĉetado kun 11 000 bredistoj de laktobovinoj, per kio ĝi solvis la malfacilon de paŝtistoj en vendo de freŝa lakto. En la pasintaj 30 jaroj ĝi pagis al la bredistoj 200 milionojn da jŭanoj. Nun la fabriko ankoraŭ ne atingis sian produktopovon kaj devas helpi la bredistojn levi laktajn produktokvanton kaj kvaliton.

Ĉe Hulun-lago



Ni vizitis ankaŭ la Fabrikon de Paŝtistaj Maŝinoj de Hajlar. Ĝi estas malgranda kaj produktas falĉmaŝinon, herbo-kolektan maŝinon, fojnoamasigilon, laktositelan ĉaron bezonatajn de la paŝtistoj. La maŝinoj mildigis laborintensecon de paŝtistoj kaj akcelis disvolviĝon de la stepa brutobredado. Nun en Hajlar

funkcias 10 fabrikoj servantaj rekte al la paŝtistoj. Ili produktas jungilarojn, selojn, rajdistajn botojn, mongolajn tranĉilojn, jurtajn feltojn, mongolajn vestojn kaj aliajn objektojn uzatajn speciale de mongoloj. Nun Hajlar estas unu el la 11 produktaj bazoj de la nacimalplimultaj objektoj.

MANĜOŬLI — LANDLIMA URBO

Manĝoŭli, malgranda urbo ĉe la norda landlimo de Ĉinio, limtuŝas Sovetunion en la okcidento. Tie estis malgranda vilaĝo frue en la komenco de la 17-a jc. Post kiam oni starigis en 1901 tie fervojan stacion, la vilaĝo iom post iom disvolviĝis en urbeton. Tamen ĝis hodiaŭ la urbo havas nur 30 000 loĝantojn.

En Manĝoŭli klare vidiĝas 6 horizontalaj kaj 7 vertikalaj stratoj. Ambaŭflanke de la stratoj staras diversaj domoj.

18 km. okcidente de la urbo troviĝas la Ĝenerala Stacio Landlima. La internacia ekspreso inter Pekino kaj Moskvo transiras tie la landlimon ĉina-sovetunian. La du landoj ĉiu starigis altan feran pordegon supremeze kun nacia emblemo siaflanke super la fervojo. Oni kutime nomas ĝin landpordo. Vicestro de la landlima stacio de Manĝoŭli diris al ni, ke en la lastaj jaroj oftigiĝis renkontiĝo inter la ĉina landlima stacio kaj la Davoria landlima taĉmento de Sovetunio. En la gravaj festoj ili invitis unu la alian por amika intervidiĝo aŭ vizito. Revenante al Manĝoŭli, mi vidis, ke ĉie en la tranĉeoj fositaj en la pasinteco kreskas herboj.

En Manĝoŭli kuŝas la Maŭzoleo de Sovetiaj Ruĝarmeaj Martiroj en la batalo por helpi la ĉinan popolon kontraŭ la japanaj agresantoj.

La Fervoja Stacio Manĝoŭli estas la plej granda stacio de internacia komerco de Ĉinio. Pro kresko de la komercado inter Ĉinio kaj Sovetunio kaj la Orienta Eŭropo la fervoja trafiko estas tre vigla. Tie ni vidis vartraĵojn plensarĝitan per ligno, aŭtoj kaj aliaj materialoj. Ni vizitis la internacian trajnon de Moskvo al Pekino kaj vidis, ke la alilandaj pasaĝeroj enirintaj la ĉinan teritorion estas iom emociaj kaj malpacience atendas kontrolon de ĉinaj landlimaj laborantoj. Elvagoniĝinte ili promenis sur la ĉina tero kaj aĉetis ĉinajn objektojn aŭ poŝtmarkojn. Nun la fervojo de Moskvo al Pekino fariĝis vigla. En la lastaj jaroj diplomatoj, oficistoj kaj turistoj el pli ol 50 landoj transiris tie la landlimon.

HULUN-LAGO

Legendo diras, ke antaŭ tre longe sablovento ofte tiranis la lokon kaj la paŝtistoj vivis ĉiam pli mizere. Tiam paro da gejunuloj Bujr kaj Hulun decidis iri respektive suden kaj norden por serĉi fonton. Ili ambaŭ sukcesis. Bujr fosis profundan lagon sude, dum Hulun fosis grandan lagon norde. Ili ambaŭ fariĝis dioj de lago. Por renkontiĝi kun Hulun, Bujr fosis kanalon de sude norden. La rivero kunligis la du lagojn kaj fine renkontiĝis la juna paro. Nun la du lagoj klare vidiĝas sur la mapo. La suda lago nomiĝas Bujr, kiu kuŝas ĝuste ĉe la landlimo de Ĉinio kaj la Mongola Popola Respubliko. La norda lago nomiĝas Hulun. Ĝin kaj Bujr kunligas la rivero Ursong. Oni nomas la regionon Hulun Bujr per la nomoj de ambaŭ lagoj. Kun la lagoj kaj rivero la sablovento ne povas plu furiozi kaj la loko fariĝis fekunda stepo.

Forlasinte Manĝoŭli, ni atingis Hulun-lagon. La lago estas blua kaj pura. Rigardate de malproksime, la vastega lago kunfandiĝas kun la ĉielo. Blankaj ondoj frapas la ŝtonajn bordojn. Ni sentis nin kvazaŭ ĉe marbordo. La mongoloj nomas ĝin Dalaj-lago, kiu signifas "marsimilan lagon" en la mongola lingvo.

Hulun estas la kvara granda lago de Ĉinio kaj la unua de la Interna Mongolio. Ĝi kun 400-kilometra perimetro kaj areo de 2 260 kvadrataj kilometroj povas enteni 13 miliardojn da kubmetroj da akvo. Ĉirkaŭ ĝi etendiĝas vastaj marĉo kaj stepo. Tial la loko abundas je fiŝoj kaj birdoj. Ĝi estas ankaŭ unu el la gravaj trairejoj por migrantaj birdoj en norda Ĉinio. Oni taksis, ke 1/5 de la ĉinaj birdoj havas 240 speciojn kaj apartenas al 40 familioj de 17 ordoj. Gruoj, mevoj, cignoj, sovaĝaj anseroj, sovaĝaj anasoj, hirundoj kaj ardeoj migras tra tiu ĉi loko.

Ni vizitis la fiŝejon de Dalaj-lago, fonditan en 1955. Oni diris al mi, ke en la lago vivas 30 specioj da fiŝoj kaj salikokoj, inkl. de karpoj, karasoj (*Carassius auratus gibelio*), ezokoj kaj siluroj. La gastiganto regalis nin en la Ĉelaga Hotelo per fiŝoj de dekelkaj specioj ĵus kaptitaj. La pladoj vere bongustaj. Oni diris, ke tieaj kuiristoj povas prepari 160 specojn de pladoj el diversspecaj fiŝoj. Estis tute ekster mia atendo, ke sur la norda stepo de nia lando oni povas ĝui fiŝfeston, ĝeneralan en suda Ĉinio.

Hulun-lago brilas kvazaŭ perlo inkrustita sur la vasta verda stepo. La lago, kvankam ne famkonata, fariĝos turisma loko en la estonteco, kiu allogos turistojn per siaj nordlandaj pejzaĝoj kaj stepaj moroj.

Bela kaj fekunda Hulun Bujr

Hulun Bujr kun totala areo de 250 000 kvadrataj kilometroj estas unu el la 8 subregionoj de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Ĝi situas en la nord-orienta parto de la aŭtonoma regiono. Tie estas abundaj naturaj riĉfontoj, kiuj atendas ekspluaton.

La Granda Ŝing'an-montaro, fame konata kiel verda trezorejo, kuŝas en ĝia orienta parto. Tie troviĝas la plej granda arbaro de Ĉinio, kun totala ligna rezervokvanto de 730 milionoj da kubmetroj. Tie kreskas ĉefe ŝing'anaj larikoj kaj ankaŭ betuloj, nigragrizaj betuloj (*Betula dahurica*), poploj, kverkoj, piceoj kaj kelkaj alispecaj arboj. Tie estas pli-ol-3 000-specaj arbustoj, herboj, musko, likeno k.a. En la arbaro vivas grandnombraj bestoj, el kiuj dekoj da specoj estas rigardataj kiel protektendaj raraj bestoj.

Ŝirmate de la Granda Ŝing'an-montaro sin etendas la senlima stepo Hulun Bujr fama en Ĉinio, kun totala areo de 100 000 kvadrataj kilometroj. Kun ebena tereno riĉa je herbo kaj akvo ĝi estas rigardata kiel ideala natura paŝtejo. Tie oni bredas Sanhe-ĉevalojn taŭgajn por ŝarĝoportado, Sanhe-bovojn taŭgajn por doni lakton kaj viandon, fortikajn Ŝjinihe-ĉevalojn, Ŝjinihe-lakto-bovinojn kaj nigrajn kaprojn kun valora felo.

Sub la stepo rezervas sin abundaj mineraloj de karbo, fero, kupro, oro, plumbo, zinko, mirabilito, fluorito k. a., precipe ĝia karba rezervokvanto estas granda kaj ekspluatablebla pro sia proksimo al tersurfaco. Estas en konstruado kaj rekonstruado novaj kaj malnovaj karbominejoj en Ĝalajnoŭer, Jimin kaj Dajan. Hulun Bujr fariĝos grava enĝergia bazo de Ĉinio. Ankaŭ petrolo,

marmoro k. a. en prospektorado havas perspektivon de ekspluatado.

Hulun Bujr estas lulilo de la nomadoj de norda Ĉinio. Tie vivis pluraj naciecoj. La elterigitaj hom-kranioj kaj grandnombraj ŝtonaj instrumentoj montris, ke jam en la malfrua periodo de paleolitiko kaj la komenco de neolitiko tie vivis homoj. Ĝingis-Ĥano tie debutis sur la historia sceno kaj metis la bazon por Jŭan-imperio. Hulun Bujr estas unu el la kulturaj luliloj de la nordaj naciecoj. Nun tie vivas pli ol 2 milionoj da mongoloj, hanoj, dahuroj, evenkoj, olunĉunoj, hujoj, koreoj, manĉuroj k. a. La subregiono havas 13 guberniojn kaj urbojn, inter kiuj estas 3 naci-malplimultaj aŭtonomaj gubernioj: la Evenka Aŭtonoma Gubernio, Olunĉuna Aŭtonoma Gubernio kaj Dahura Aŭtonoma Gubernio Morin Daŭa.

Ŝafaro sur stepo



Grandioza sporta manifestacio en Azio

SENPRECEDENCA KONKURO

La ĉiukvarjara azia sportkunveno estas la plej altnivela en la okuloj de la ĉirkaŭ 3-miliarda azia popolo.

De post la Unua Azia Sportkunveno okazinta en Hindio en 1951 la aziaj landoj donis ĉiam pli grandan atenton al sia sportado kaj la nivelo de iliaj sportaj ludoj leviĝis rapide. Antaŭ la malfermo de la Deka Azia Sportkunveno en 1986 la diverslandaj sportaj organizoj anoncis sian celon por gajni medalojn. La delegacio de japanaj sportistoj, kiu gajnis plej multe da oraj medaloj de la Unua ĝis la Oka Aziaj Sportkunvenoj, esprimis, ke ĝi prezentos sian tutan lertaĵon por konkuri kun la ĉina delegacio, kiu gajnis plej multe da oraj medaloj en la Naŭa Azia Sportkunveno. La sudkorea delegacio, kiu ĉiam estis ŝub la dua loko laŭ la nombro de oraj medaloj gajnitaj de ĝi en la pasintaj aziaj sportkunvenoj, intencis superi aliajn, utiligante favorajn kondiĉojn esti gastiganta lando. Ĝia principo estis "Preterlasi Ĉinion kaj malhelpi Japanion por gajni la duan lokon en la totala nombro de oraj medaloj." Al la rivaloj la delegacio de ĉinaj sportistoj donis definitivan respondon, ke ĝi gajnos plej multe da oraj medaloj. Ankaŭ la sportaj delegacioj de Irano, Filipinoj, Tajlando, Hindio, Indonezio kaj Pakistano esprimis,

ke ili venkos la defiantojn en siaj fortaj sportbranĉoj.

La 20-an de septembro 1986, en la stadiono de Seulo ekbrulis la grandega torĉo. Jen inaŭguriĝis la sportkunveno longe preparita.

Tuj en la sekvanta tago komenciĝis la konkurso. Ĉinaj sportistoj gajnis naŭ el la dek unu oraj medaloj en la konkursoj de pafo, naĝo, biciklado, halterlevo kaj gimnastiko kaj rompis tri rekordojn en pafo, unu en biciklado kaj unu en naĝo kadre de la aziaj sportkunvenoj. Tiutage japanaj naĝistoj gajnis la aliajn du orajn medalojn. Je la 22-a de septembro la sudkorea delegacio, kiu ne malstreĉis sian forton, gajnis kvar orajn medalojn kaj la japana ses orajn medalojn.

Poste, dum tri tagoj, kreskis respektive la nombro de oraj medaloj gajnitaj de Ĉinio, Japanio kaj suda Koreio, kun diferenco laŭvice inter 30 kaj 10. Sed tia situacio daŭris nelonge. Ekde la sesa tago de la konkurso la nombro de oraj medaloj gajnitaj de suda Koreio proksimiĝis al tiu de Japanio. Je la 30-a de septembro la delegacio de suda Koreio gajnis plej gravan sukceson: unufoje ĝi superis Japanion en la totala nombro de gajnitaj oraj medaloj. Post tio, la sudkorea delegacio kun forta batalvolo defiis la ĉinan, kiu eksentis ĝian efektivan minacon.

En la postaj konkursoj la sudkorea delegacio gajnis orajn medalojn sinsekve en piedbatalo, bokso, ĵudo, atletiko, tablotenis, volanludo kaj hokeo, plene elvolvante sian superecon en iuj sportbranĉoj kaj utiligante favorajn kondiĉojn esti gastiganta lando.

Kaj Ĉinio gajnis la unuan lokon en vira korbopilado, vira flugpilado, virina flugpilado kaj virina teniso. Post sia unua malsukceso ĉinaj tablotenisistoj kaj volanistoj uzis sian tutan forton en la posta konkurso kaj gajnis grandan parton de la oraj medaloj de la individuaj ludoj en la du sportbranĉoj.

En la 4-a de oktobro la statistiko klare montris, ke Ĉinio kaj suda Koreio posedas po 92 orajn medalojn.

En la 5-a de oktobro, la lasta tago de la sportkunveno, restis nur ses oraj medaloj gajnotaj, kvin por atletiko kaj unu por piedpilado.

Je 13:50, 24 sportistinoj el ses landoj partoprenis en la 4×100-metra virina stafetkuro. Kaj en la konkurso kvar ĉinaj knabinoj en blankaj kostumoj starigis la novan azian rekordon de 44"78 kaj per tio gajnis plian oran medalon por sia delegacio. Poste en la 4×100-metra vira stafetkuro ĉina atleto la unua ĝiskuris la celokon, tio portis al Ĉinio la 94-an oran medalon.

Ĉe la fino de la atletika konkurso la japana delegacio gajnis

du el la ceteraj tri oraj medaloj kaj la hinda unu. Tiutage je 18:00 suda Koreio venkis Saudi-Arabion per 2:0 en la piedpilka finalo kaj tiel gajnis la lastan oran medalon de la sportkunveno. Jen finiĝis la tuta konkurso. Rezulte, la ĉina delegacio gajnis la unuan lokon, kun 94 oraj medaloj, la sudkorea delegacio la duan lokon, kun 93, kaj la japana la trian lokon, kun 58.

NOVAJ REKORDOJ KREITAJ

En la Deka Azia Sportkunveno sportistoj el diversaj landoj kaj regionoj kreis grandan nombron da novaj rekordoj kadre de la azia sportkunveno, i.a. oni rompis aziajn rekordojn je 99 homoj en la konkursoj de pafo, arkopafo, atletiko, halterlevo, biciklado kaj kegloludo. Oni rompis je 224 homoj la rekordojn de la azia sportkunveno en naĝo kaj supre menciitaj sportbranĉoj. En la arkopafa konkurso oni rompis kaj egaligis respektive du mondajn rekordojn. En la 29 disciplinoj de naĝo oni rompis 28 rekordojn. En iuj disciplinoj de la pafo, naĝo, arkopafo kaj atletiko ne nur gajnintoj de oraj medaloj, sed ankaŭ tiuj de arĝentaj kaj kupraj medaloj rompis rekordojn kadre de Azio kaj la azia sportkunveno. Eĉ iu gajninto de la sesa loko rompis rekordon de la azia sportkunveno.

En la Deka Azia Sportkunveno ĉinaj sportistoj konkursis en 20 el la 25 sportbranĉoj. En la sportbranĉoj de atletiko, pafo, arkopafo, halterlevo, naĝo kaj biciklado ili 69-foje rompis rekordojn kadre de Azio kaj la azia sportkunveno.

Krome, ili unufoje gajnis la unuan lokon en la 10 000-metra virina kuro, vira kaj virina biciklado, virina arkopafo, vira flugpilkado, virina teniso kaj velado.



La Ĉina Vira Flugpilka Teamo ĝojas pro sia gajno de la unua loko.



La ĉina teamo gajnis la oran medalon en la konkurso pri la virina kvaropa konkurboato kun stiristo.

La 758 sportistinoj el diversaj partoj de Azio bonege ludis kaj estis admirataj de la publiko.

Inter ili troviĝis la hinda sportistino P. T. Usha, konata kiel "flugvirino" de Azio. La totala

nombro de oraj medaloj gajnitaj de ŝi en Azio superis 12. Antaŭ la konkurso de la Deko Azia Sportkunveno ŝi aspiris al ses oraj medaloj. Fakte ŝi gajnis nur kvar orajn medalojn, tamen neniu atletino povis rivali kun ŝi.

En la stadiono de Seulo la 15-jara ĉina gimnastino Ĉen Cujting per sia lerta ludo konkeris la publikon. Ĉiufoje ŝi gajnis almenaŭ 9.7 poentojn. En la teama konkurso pri grundgimnastiko ŝi gajnis dek poentojn. En la sportkunveno ŝi gajnis tri orajn medalojn.

Krom ili, ankaŭ la sudkorea kuristino Lim Chun Ae, la nova elstara ĉina naĝistino Jan Ming kaj la filipina kuristino Vegaa Lydia De atingis brilajn sukcesojn en la konkurso.

En la sportkunveno 19 sportistinoj gajnis po almenaŭ du orajn medalojn.

SPORTA LEVIĜO EN AZIO

Pasis jam 36 jaroj, de kiam oni okazigis la Unuan Azian Sportkunvenon en 1951. Kaj tiaj sportkunvenoj fariĝis ĉiam pli grandaj kaj akiris sukcesojn ĉiam pli bonajn.

La Unuan Azian Sportkunvenon partoprenis nur pli ol 500 sportistoj el dek unu landoj kaj regionoj, kaj postaj aziaj sportkunvenoj havis pli kaj pli da partoprenantoj. Kaj tiu ĉi sportkunveno estis la plej grandioza.

En la pasintaj 35 jaroj multaj aziaj landoj rimarkinde progresis en sportado. Indonezio fariĝis forta volanluda lando, kiel la monda publiko opinias. Plurfoje ĝi gajnis mondĉampionecon. Tajlandaj kaj sudkoreaj boksistoj sub pezkategorio 60 renomiĝas ne nur en Azio, sed ankaŭ iom en la mondo. Ankaŭ kegloludo

rapide progresis en Singapuro kaj okupas gravan pozicion internacie. Pakistano plurfoje gajnis mondĉampionecon en hokeo kaj oran medalon tiurilate en la 23-aj Olimpikoj. Oni laŭdis okcidentaziajn landojn, kiel Saudi-Arabio kaj Kuvajtio, pro ilia lerta piedpilkado, kvankam ili ne perfektigis en aliaj sportbranĉoj.

Ĉinio kun multnombra loĝantaro kaj vasta teritorio, same kiel aliaj aziaj landoj, rapide disvolvis sian sportadon dum la pasintaj pli ol 30 jaroj. Ekde 1974 Ĉinio oficiale partoprenis en la aziaj sportkunvenoj. Ĝi gajnis 25,50 kaj 61 orajn medalojn respektive en la Sepa, Oka kaj Naŭa Aziaj Sportkunvenoj en 1974, 1978 kaj 1982. Kaj en la naŭa ĝi estis gajninto de plej multe da oraj medaloj.

En la 80-aj jaroj la ĉina sportado eniris novan stadion. Inter 1981 kaj 1985 en Ĉinio aperis novaj elstaraj sportistoj kaj sportaj teamoj rekonitaj en Azio aŭ en la mondo. Dum tiu periodo ĉinaj sportistoj 156-foje gajnis ĉampionecon en 16 sportbranĉoj kaj 79-foje rompis mondajn rekordojn.

En tiu ĉi sportkunveno Ĉinio gajnis 94 orajn, 82 arĝentajn kaj 46 kuprajn medalojn. Ĝi pli progresis ol en la Naŭa Azia Sportkunveno, ĉu en kvanto de oraj medaloj de ĝi gajnitaj, ĉu en la sportbranĉoj, en kiuj ĝi okupis la unuan lokon.

En tiu ĉi sportkunveno plej multe kreskis la nombro de oraj medaloj gajnitaj de suda Koreio. Ĝi gajnis 28 orajn medalojn en la Naŭa Azia Sportkunveno kaj la nombro de oraj medaloj ĉi-foje gajnitaj de ĝi kreskis je 65. Tiu cifero estis pli granda ol la nombro de oraj medaloj gajnitaj de Japanio en tiu ĉi sportkunveno.

La kaŭzo de la mirinda kresko kuŝis en tio, ke ĝi unuflanke utiligis la favorajn kondiĉojn esti gastiganta lando kaj aliflanke ĝiaj sportistoj rimarkinde progresis en pafado, atletiko, ĵudo kaj tablotenisado.

Iuj landoj kaj regionoj, kiaj Hongkong, Kataro kaj Libano, unufoje gajnis orajn medalojn. Resume, 22 landoj kaj regionoj gajnis medalojn ĉi-foje, i. a. 13 gajnis orajn medalojn. Ambaŭ ciferoj estis pli grandaj ol tiuj en la Naŭa Azia Sportkunveno. Tio montris novan progreson de la azia sportado.


Estis rimarkindaj la sukcesoj de la Deko Azia Sportkunveno, rimarkindaj ankaŭ ĝiaj mankoj.

Ekzistis grandaj diferencoj de sportado inter diversaj landoj. La tri potencoj Ĉinio, suda Koreio kaj Japanio gajnis ĉirkaŭ 85% de la 269 oraj medaloj. Tia serioza malekvilibro jam vekis atenton de la aziaj sportaj rondoj.

Cetere, en tiu ĉi sportkunveno sportistoj de iuj landoj malsukcesis en iuj sportbranĉoj, en kiuj ili estis fortaj antaŭe. Estis klara ekzemplo, ke la ĉinaj vira kaj virina tablotenisaj teamoj perdis la ludojn en la teamaj konkursoj. Ankaŭ Japanio perdis orajn medalojn en ĵudo kaj naĝo.

La aziaj sportkunvenoj montris, ke la nivelo de sportaj ludoj de Azio estas ankoraŭ multe malpli alta ol tiu de la mondo. Ĉi-foje sportistoj rompis kaj egaligis respektive du mondajn rekordojn nur en arkopafo. Tiuj faktoj montris direkton al la aziaj landoj en disvolvo de sportado.

La 11-a Azia Sportkunveno okazos en 1990 en Pekino de Ĉinio, kaj oni atendas pli bonajn ludojn de aziaj sportistoj.



Ĉinaj sportistoj en la Deka Azia Sportkunveno



Ĉina naĝistino Jan Ming (dekstre) gajnis tri orajn medalojn en la virina 400-metra unuopa miksaĝo kaj virinaj 400- kaj 800-metraj rapidnaĝoj.

Ĉinaj pafistoj gajnis la unuan oran medalon de la sportkunveno en la teama konkurso pri la vira libera pistol-pafado.

Ĉinaj sportistoj (la unuaj du) en la konkurso pri la vira 4×100-metra stafetkuro






Ĉina sportistino Ĝang Juping gajnis la ĉampioncon en la konkurso de saltotabulo-plonĝo.



Ĉina gimnastino Ĉen Cujting gajnis dek poentojn en la konkurso pri grundgimnastiko.

Ĉina sportistino Ĝu Juĉing (la dua de dekstre), gajninto de la unua loko en la sep virinaj kunmetitaj konkursoj





Ĉina gimnasto Li Ning gajnis tri orajn medalojn de grundgimnastiko, duringado kaj unuopa kunmetita ludo. Jen li estas en konkurso.

Ĉinaj flugpilkistinoj Ljang Jan (frapanta) kaj Jang Ŝjilan en konkurso



Ĉinaj sportistoj en la konkurso pri la vira 100-kilometra biciklado





Ĉina diskoĵetisto Li Ŭejnan gajnis la unuan lokon trifoje sinsekve en la aziaj sportkunvenoj.




Ĉinaj halterlevistoj He Jingĉjang kaj Zeng Gŭoĉjang gajnis respektive la ĉampionecon kaj subĉampionecon en la halterleva konkurso en pez-kategorio de 56 kg.

Ĉina atletino Ljaŭ Ŭenfen per 6.37 m. gajnis la unuan lokon en longosalto.



Ĉina sportistino Li Ŝinji gajnis la ĉampionecon en teniso.



Kvazaŭsonĝaj travivaĵoj

— Pri la 71-a UK en Pekino



La aŭtoro (maldekstre) kaj ĉina s-ano Ivan Ko

Adiaŭ, Pekino, la urbo de miaj revoj, kiuj ne plu restis revoj, sed efektiviĝis en realo. Hodiaŭ mi nur povas rememori la belegajn tagojn dum la UK en Pekino; la semajno plenĝoja, plezur-riĉa kaj abunde feliĉa.

Mi povas fiere rakonti pri mia unua UK neforgesebla dumvive. Ja, laŭ eldiro de kara samideano, “la unua UK por ĉiu estas aparte interesa!”

Ekde la apero de verdo-plena surfaco de la ĉefurbo Pekino, tra la fenestro de aviadilo antaŭ miaj okuloj, la ĝojego plenigis mian koron. Jen, baldaŭ okazos la unuaj kontaktoj kun samideanoj alinaciaj. Kaj mi ne atendis longe! Baldaŭ en la flughavena salonego bonvenigis ver daj flagoj ĉe junaj ĉinaj geesperantistoj kun ĉarmaj ridetoj. “Saluton” kaj sekve elkoraj brakumoj! Tiel komenciĝis mia UK!

La ĉina ĉefurbo regalis nin per sia pura aero, freŝa jen pluva, jen sunbrila vetero, belaj verdaj pejzaĝoj, ofta kaj interesa frekventado de biciklantoj, bel-orde vestitaj knabinoj, revige lumantaj noktoj, mirige vastaj placoj kaj grandaj palacoj.

Akompanis tiujn la ĉarmo de ĉinaj delikataj stiloj en arkitekturo, kuirado, manĝado, etiketo, muzikado, dancado, teatrado kaj kantado, kiuj favoris kaj interesis la kongresanojn dum la ĉinaj artaj vesperoj, dum allogaj ekskursoj, dum la buntaj bankedoj kaj manĝoj, dum interesaj butikumadoj, kaj dum agrablaj personaj kontaktoj travivaĵe en Pekino.

Kaj kio okazis en la kongresejo? Ho, ektrivado de novaj geamikoj kaj retrovado de malnovaj gekaruloj. Tra koridoroj de la kongresejo, kies ĉiu momento

plenis je informado, diskutado, konferencado, intervjuado, fotado, interŝanĝado, ridado, parolado, prezentado, marŝado por atingi la ĝustan salonon de via deziro: salonon Hodler, salonon Zamenhof, salonon Hujucz aŭ salonon Damjanov!

Jen, vi povus aŭskulti riĉan prelegon, informiĝi pri nove fondita fak-grupo, enaferiĝi pri la evoluo de jam prospera ligo longdaŭra, ĝui la konferencon pri informado, ĉeesti la historian momenton de elekto de nova prezidanto de UEA en la komitato, vee perdi samtempan scian prelegon ŝatatan, por ĉeesti alian aparte gravan kunsidon, entuziasme partopreni akademian kunsidon, kie viaj ŝatataj verkistoj sin esprimas, esti intervjuata de pola radio, aŭ norvega, aŭ pekina, trovi viajn surprizajn fotojn de emociaj momentoj de amikaj ren-



La aŭtoro (maldekstre) en la 71-a UK

kontiĝoj en la ĉambro de Foto-servo de UK, trinki bongustan teon, aĉeti laŭokazajn memor-poŝtaĵojn, serĉi sciencajn librojn aŭ aboni EPC en la Libro-servo kaj ricevi la belan silkan Esp-kaptukon donace!

Se vi jam ĝuis vian interesan ekskurson al la Somera Palaco, kun ties belaj arkitekturaj delikataĵoj kaj boatoj diverskoloraj sur bel-aspekta lageto pitoreska, kie vi enfotiligis kiel eble plej multe da pejzaĝoj okulfrapaj, jen estas la tempo por bankedi!

Ronda tablo kun buntaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, delikataj porcelanaĵoj kaj desegnaj manĝbastonetoj atendas vin. Ne ĝenu vian cerbon por rekoni ĉiun specon de la legomoj, fiŝoj, viando, fruktoj spicaĵoj ktp, ĉar ĉiun fojon vi renkontiĝos kun preskaŭ nova vario de manĝindaĵoj! La regalemo de niaj ĉinaj gastigantoj estas mirinde senekzempla. Nu, gratulon pro via klara lertiĝo en uzado de manĝbastonetoj, ja esperantistoj vere estas lert. . . Kompreneble preni fungojn per bastoneto ankoraŭ estus malfacile por

vi. La makulo sur la tablo-tukoj je lavado malaperos. Ne maltrankviliĝu. Provu denove!

Jen, rapidu, ni devas atingi la modernajn busojn, kiuj portos nin al la granda ĉina teatro. Tie okazos la artaj programoj, same tie okazis la solena malfermo de UK kun ĉeesto de ĉ. 2 500 samideanoj, t.e. la plej granda internacia kunveno ĝis nun okazinta en la Ĉina Popola Respubliko!

Ĉu temas pri la nacia vespero, kiu minuton post minuto multobligas la miron, surpriziĝon kaj admiron de la spektantoj per elverŝado de varia fonto de ĉinaj artaĵoj je pekina opero, akrobataĵo, tenora solo, soprana solo, sol-danco ktp, ĉu la koncerto de la ĉarma kanada kantistino Joëlle Rabu kaptas la atentojn kaj konkeros ne nur la amantajn korojn de pacemaj esperantistoj, sed ankaŭ la amantajn korojn de romantikaj ĉiamjunaj samideanoj, dum la kunkantado vigla! Eble tamen ni kune raviĝas de la karmemoraĵoj eldiroj de Verda Majo, el la buŝo de kapabla Vida Jerman en teatraĵo surbaze de la

artaj notoj de Spomenka Štimec, nia brava verkistino!

Ho, morgaŭ ni troviĝos sur la antikva Granda Muro de Ĉinio.

Ĉi tie, ĉirkaŭate de la amasoj de entuziasmaj homoj, kiuj dense enviciĝis por suprenmarŝi sur la vasta ŝtuparo de la Granda Muro, oni vere spertas ke la Internacia Lingvo helpas al interhomaj rilatoj, kaj precipe dank' al la Granda Muro. IL ne nur la homajn korojn, sed ankaŭ la homajn korpojn vole-ne-vole multe pli proksimigas!

La grandiozo de la Granda Muro refoje bildigas al ni la imponecon de la kelkmiljara civilizacio de la granda Ĉinio, reprezentanto de oriento mistera, brila kaj antikva!

Adiaŭi al tia ŝatinda gastiganto estus tre malfacile, sed kvazaŭ la sonĝo bela de vere pacaj, interkompreniĝaj kaj evoluaj tagoj de la 71-a UK en Pekino devus jam finiĝi al mi. Mi revenis al Irano kun stoko da adresoj de novaj geamikoj, donacetoj de ĉinaj samideanoj, fotoj, libroj, diskoj kaj lavango da belaj memoroj pri miaj kvazaŭsonĝaj travivaĵoj dum mia neforgesebla unua UK en Pekino. Estus mia devo, ĉi tie sincere dankegi ĉiujn karajn ĉinajn samideanojn, kiuj per sia senlaca aktivado kaj penado ebligis al ni ĉiuj kongresanoj en Pekino ĝui tiun belan vojaĝon al Ĉinio.

Respondo por "Serĉado de bovo":

En jarfina vespero la kamparano perdis bovinon baldaŭ naskontan idon.

Esperanto havas pli brilan perspektivon ol iam ajn antaŭe

— Interparolo inter ĉina kultura vicministro Jing

Jŭoĉeng kaj s-ro Tibor Sekelj

La kuranta jaro estas la 100-jara jubileo de Esperanto. Por rememorigi pri tiu evento kun historia signifo, nia revuo malfermis la rubrikon "Jubilea Jaro de Esperanto", en kiu ni aperigos artikolojn pri jenaj temoj: opinioj de diverslandaj eminentuloj pri Esperanto; la historio kaj la nuna stato de la Esperanto-movado; perspektivo de Esperanto; praktikado kaj atingoj de Esperanto en diversaj kampoj; rememoroj de veteranaj esperantistoj ktp. Ni kredas, ke tiuj artikoloj favoros la Esperanto-movadon. Ni esperas, ke ĉiuj Esperantaj organizoj kaj legantoj kunlaboros kun ni por bone funkciigi tiun rubrikon. En ĉi numero ni aperigas interparolon inter Tibor Sekelj, fama jugoslava esperantisto, kaj Jing Jŭoĉeng, ĉina kultura vicministro. Dum sia restado en Pekino s-ro Sekelj vizitis ankaŭ la Ĉinan Edukan Komisionon kaj la Ministerion de Radio, Filmo kaj Televido de Ĉinio, kies estroj bone akceptis lin.

— La Red.

ĈINIO SUBTENAS ESPERANTON

Sekelj: Dum la lasta Unesko-konferenco mi estis reprezentanto de Esperanto-Asocio, de la Esperanto-movado, kaj mi prezentis pere de la jugoslavaj reprezentantoj rezolucion favoran al Esperanto. Kune kun Jugoslavio subskribis ankaŭ Ĉinio kaj aliaj kvin landoj.

Jing: Mi jam informiĝis pri tio.

Sekelj: Mi longe parolis kun la reprezentanto de Ĉinio pri tiu temo. Mi klarigis la veran, internan signifon de tiu subskribo. Ĝi estas tio, ke Ĉinio havas tre longan historion, longan historian sperton en kulturo kaj politiko kaj ĉio, tamen dum multaj jaroj en la pasinteco la ĉinaj diplomatoj kaj aliaj, kiam ili renkontis alilandajn diplomatojn, kolegojn, ĉiam diris tre humile: "Ni estas tre nova lando, tre nova ŝtato, ni petas vin instrui nin, ĉar vi havas pli longan sperton." Tio, oni diras,

estis kutimo. Tamen, nuntempe, Ĉinio jam vidas, ke sufiĉas tiu troa modesteco, kaj oni devas elpaŝi kun la vero. Ĉino deziras sian 5 000-jaran sperton iomete dividi kun aliaj popoloj kaj tion, kio valoras, iomete ankaŭ transdoni al aliaj. Kaj estas la problemo, en kiu lingvo transdoni tiun longan sperton. En la ĉina? Neniu komprenas ĝin. Uzi la anglan, aŭ la francan, aŭ la rusan? Tio ne indus al tiu malnova kulturo fronte plene alian, multe pli novan kulturon por sin esprimi. Tial estas plej nature akcepti iun lingvon neŭtralan, kiu estas nek via, nek de la aliaj, sed povas esti havaĵo de la tuta mondo sen ofendi iun ajn. Esperanto estas tia lingvo neŭtrala kaj krome facila por lerni, adaptebla al ĉiuj necesoj de la nuntempa vivo. Mi kredas, ke eĉ Ĉinio oficiale ankoraŭ ne tute konscias pri tiu rolo, sed mi esperas, ke iom post iom Ĉinio fariĝos decida faktoro en la akcepto de Esperanto.

Ni forte esperas, ke eble post dek jaroj Ĉinio aperos antaŭ la Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko kaj diros: "Ni rezignas pri la uzo de la ĉina lingvo kaj adoptas Esperanton kiel internacian lingvon, kaj ni petas, ke la aliaj delegitoj sekvu tiun ĉi ekzemplon."

Jing: Tio estas bona espero.

Sekelj: Mi petas tion, ĉar vere mi ĉeestis plurajn Unesko-konferencojn. Tie la ĉina delegitaro, kompreneble, parolas en la ĉina lingvo, sed nur la delegitaro komprenas ĝin, nur ili komprenas sin mem, sed por la alia publiko ni devas traduki en ses aliajn lingvojn. Kaj krom la ses lingvoj jam uzataj nun postulis la araba. La araboj jam eniris. Nun oni diskutas pri la akcepto de la germana, kaj poste venos la japana kaj svahila. Do jam kvar lingvoj estas pretaj esti uzataj krom la ses jam uzitaj. Do tio signifas dek lingvojn. La ĥaoso fariĝos pli granda, la kostoj pli grandaj kaj interkompreniĝo pli malgranda. Do al mi ŝajnas, ke se tiun solvon, laŭ mia espero, Ĉinio proponos, tio estos tre bonvene akceptita. Sed, kompreneble, antaŭ tio mi supozas dek jarojn. Dum tiu tempo oni devas bone prepari, kaj en Ĉinio kaj en la aliaj partoj de la mondo oni devas bone prepari por tion povi akcepti kaj uzi. Nuntempe en Ĉinio en multaj universitatoj oni jam instruas Esperanton, sed laŭ mia opinio oni devus multe pli frue komenci, por ke en tiu ĉi lando estu granda nombro da personoj, kiuj flue kaj korekte parolas Esperanton. Kaj samtempe tion faras ankaŭ aliaj landoj, ĉar Esperanto havas veran valoron, nur se en multaj landoj samtempe oni legas ĝin kaj uzas ĝin. Tial, ĉefe tial, mi volas tion esprimi al vi kaj peti vian apogon al la ĉina Esperanto-movado, kiel oni apogas en multaj aliaj landoj. Kaj mi estas tre feliĉa, ke ĉi tie estas tre favoraj kondiĉoj por tiu evoluo.

Jing: Tio tre ĝojigas min, ĉar mi rememoras rakonton en Biblio: Fierante, la homaro volis konstrui turon kondukantan al la ĉielo. Kun timo Dio devigis la homaron paroli diverslingve por ĝin puni. De tiam la homaro perdis pacon. Mi rakontis tion por esprimi, ke la lingva problemo vere havas rilaton nedisigeblan de la homaro, precipe de milito kaj paco. Lingvo povas esti tre sentema parto de la nacia sento. En Ĉinio ĉiuj scias, ke de la 20-a jarcento Esperanton subtenas multaj



S-ro Jing Jüoĉeng (dekstre) kaj s-ro Tibor Sekelj

famaj, prudentaj kaj progresemaj personoj. Caj Jüanpej, granda ĉina edukisto en la nuna jarcento kaj eksrektoro de la Pekina Universitato, estis unu el la personoj, kiuj plej frue subtenis Esperanton. Hodiaŭ ni renkontiĝas ĝuste en lia iama loĝejo. Antaŭe oni nomis ĝin Halo Ĝjemin, Ĝjemin estis lia kromnomo. Kaj mi opinias, ke estas tre interese, ke ni interparolas ĉi tie.

Sekelj: Do ĉi tie estas la plej konvena loko por paroli pri tio.

Jing: Krom Caj Jüanpej, ankaŭ ĉina pioniro Lusin kaj aliaj famuloj havis saman opinion, t. e. Esperanto estas lingvo de espero. Kompreneble, la idealo de Esperanto absolute ne povas realiĝi tuj en la sekva tago, kiam oni trovas ĝin bona. Por ĝin realigi, necesas multaj laboroj, tempo, propagando kaj instruado. Ni profunde respektas esperantistojn de kiu ajn lando, ĉu de Ĉinio, ĉu de aliaj landoj. En la nuna jarcento naciismo anomalie kreskis iagrade pro grandaj militoj. Tio estas anormala. Naciismo fariĝis ia malvasta ideologio, ekz. germanoj opiniis, ke la ĝermana nacio superas ĉiujn aliajn, sed japanoj pensis, ke ili superregos la tutan mondon, kaj el tio sekvis ilia lingva agreso, kiu kaŭzis grandan antipation de la subprematoj kaj agre-



S-ro Jing Jüoceng (la tria de maldekstre) interparolas kun s-ro Tibor Sekelj (dekstre).

satoj. En Ĉinio aparte akra estis tiu problemo. Tial post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 ĉinoj estis tre sentemaj pri la lingva problemo. Mi rememoras, ke en la komenco de la 50-aj jaroj ni forigis ĉiujn fremdlingvajn skribojn sur la ŝildoj de vendejoj kaj sur la fabrikmarkoj de komercaĵoj, ĉar ĉiaj fremdlingvaj skriboj en la malnova socio estis rigardataj preskaŭ kiel signo de la nacia honto. Tial oni ne ĉiam agis prudente. Lingvo mem estas ilo kaj ne portas klasan karakteron. Ni ne opinias, ke la japana lingvo estas malbona pro la japana agreso al Ĉinio. Mi pensas, ke la ĉinoj maturiĝis politike post pli ol 30 jaroj kaj ne povas esti regataj de tia sento. Aliflanke, ne eksplodis mondmilito post la Dua Mondmilito. Ankaŭ tio estas grava kondiĉo. Nun ni ĉinoj havas novan vidpunkton en teorio de milito. Ni asertas, ke mondmilito estas evitebla, kaj ni faras ĉion eblan por preventi tian militon. Sub tiu premo mi pensas, ke Esperanto havas perspektivon pli brilan ol iam ajn antaŭe en Ĉinio kaj en aliaj landoj. Tial, se ni intencas prezenti ian

proponon tiuflanke aŭ subskribi ĝin, ne ekzistas obstaklo principe, sed ni devas konsideri, ĉu la tempo estas konvena, ĉu sufiĉe multaj landoj havas saman opinion kiel ni. Oni povas diri, ke ni konsideras pri agmaniero kaj ekipaĵo. Principe, mi pensas, Ĉinio apogas Esperanton, sed necesas fari multe da laboroj por tio.

ĈINIO ESTAS FIDELA AMIKO DE LA ESPERANTO-MOVADO

Sekelj: Dankon pro via opinio, kiu estas tre favora, ĝuste tiel kiel mi deziris. Mi scias, ke nun ankoraŭ ne estas la momento, sed mi esperas, ke en la proksimaj dek jaroj ni povos prepari la mondon por tia okazaĵo. Ekzistas propono, kiun ni diskutas nun en Ĉinio kaj en aliaj landoj, pri enkonduko de Esperanto en lernejoj de ĉiuj ŝtupoj, komence de la infanĝardenoj, la lernejoj elementaj mezgradaj kaj universitatoj en la tuta mondo. Kvankam Esperanto estas tri-foje pli facila ol iu ajn alia lingvo por lerni, tamen ĝi havas sonojn kaj ankaŭ frazkonstruon, kiuj ne koincidas ekzemple kun la ĉina kaj

kelkaj aliaj lingvoj. Do estas bone al la infanoj jam komenci instrui, tiel ke ili povu facile pensi en du vojoj, en la nacia kaj en la internacia. Krome, ĝuste kiel vi diris, se oni prenas ekzemple la anglan lingvon por internacia uzo, tio influas la nacian lingvon kaj altrudas la anglan kaj usonan kulturon al la popolo de alia lingvo. Esperanto estas lingvo tiel neŭtrala, ke ĝi lasas la naciajn kulturojn netuŝitaj kaj donas tiun instrumenton por interkompreniĝo kiel estas telefono kaj aviadilo.

Jing: KREDU, mi petas, ke Ĉinio kiel lando agreŝita antaŭe kaj evoluanta nun estas fidela amiko de la Esperanto-movado. Ĉar ankaŭ tio estas evidenta karakterizaĵo de Esperanto: de la 20-a jarcento Esperanto ligiĝas kun la progresema afero de la homaro. La subpremataj nacioj havas plej grandan esperon por Esperanto. Laŭ mia scio, la plejparto de Esperanto baziĝas sur la familio de la hind-eŭropaj lingvoj, tamen, kiel mi vidas, Esperanto evoluas en la landoj de la familio de la hind-eŭropaj lingvoj ne tiel rapide kiel en la orient-eŭropaj landoj. Eble tio rilatas kun la historio de la 20-a jarcento. Tre frue Ĉinio sekvis la Orientan Eŭropon. La malfortaj kaj subpremataj nacioj estas pli fervoraj por Esperanto. Inter ili, mi pensas, enviciĝis ankaŭ Ĉinio.

Sekelj: Jes. Kaj ni povas diri, ke en Ĉinio oni eldonas nun la plej bonaspektan revuon "El Popola Ĉinio", kies gvidanto estas Ŝju Ŝanŝu. Ĝi estas tre konata revuo kaj pere de ĝi la esperantistoj de la mondo havas okazon konatiĝi kun la ĉinaj problemoj kaj kun la lando kaj popolo. Krome, Radio Pekino tri-foje tage radias programojn en Esperanto, kiujn en la tuta mondo oni aŭskultas. Ekz., mi en Jugoslavio preskaŭ ĉiutage sidas ĉe radioaparato por aŭskulti la programojn de Radio Pekino. Tiu ĉi Universala Kongreso, kiu okazis antaŭ du semajnoj ĉi tie, ankaŭ allogis 2 500 personojn. Tio signifas sufiĉe grandan nombron de publiko malgraŭ la longaj vojaĝoj kaj grandaj elspezoj. En la estonteco la ĉinaj esperantistoj verŝajne preparos aliajn interesajn kunvenojn por plivastigi la konon de la lando kaj ankaŭ helpi la disvastigon de Esperanto. Tial mi parolas nun pri la organizo de konferenco de medicinistoj por doni al ili scion kaj kursojn pri

la ĉina tradicia medicino. Same, post eble ok jaroj, estas propono, ke oni organizu ĉi tie en Ĉinio kunvenon de pedagogoj de la tuta mondo kaj de infanoj kiuj lernas Esperanton, tiel ke ili povu interrilati inter si kaj denove montri al la ĉina popolo, ke Esperanto vivas. Tiel, iom post iom la popolo kontaktas unu alian kaj montras, ke Esperanto havas praktikan valoron, krom tiu teoria. Kompreneble, mi volis nur ĝeneralajn informojn doni, kaj certe la Ĉina Esperanto-Ligo donos al vi pli detalajn informojn kiam venos la tempo por tio. Cetere, mi estas tre feliĉa, ke mi aŭdis, ke vi kaj la ĉina registaro simpatias kun la ideo de la internacia lingvo, ĉar via helpo en tiu senco multe signifas por la progreso de Esperanto ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en mondaj rilatoj.


ESPERANTO POVAS LUDI POZITIVAN ROLON EN LA PORDO-MALFERMA POLITIKO

Jing: Mi ĵus parolis pri nia lando. Mi tre ĝojas, se mi povas iom kontribui. Mi atentigas vin, ke en la lastaj jaroj Ĉinio alprenis tre gravan politikon, t. e. malfermi la pordon al la eksterlando. En la komenco vi diris, ke Ĉinio havas longan historion kaj kulturon. Kompreneble, ili estas riĉaĵo por ni, tamen ili povos fariĝi nia ŝarĝo, se ni ne konvene ilin uzos. Vidu nian landnomon. "Ĉinio" legiĝas "ĝonggŭo" en la ĉina lingvo, "ĝong" signifas "meza, centra" kaj "gŭo" — "lando". Verŝajne ĝi opinias, ke ĝi estas la centro de la mondo. Ni nepre devas liberiĝi el tia penso kaj fariĝi parto de la homaro. Alpreni tiun politikon en la nacio kun multaj loĝantoj kaj longa historio estas granda afero kun historia signifo. Tamen ni alfrontas multajn malfacilojn kaj en politiko kaj en psikologio, kaj pli grave, en lingvo.

Sekelj: Estas ĝuste tio, kion mi pensis kaj kion mi deziris esprimi en la komenco, ke estas bedaŭrinde, ke tiu granda kapitalo, kiu kuŝas en la 5 000 jaroj de kulturo, . . . tio estas granda kapitalo, estas bedaŭrinde, ke la mondo ne povas uzi ĝin, kaj mi esperas, ke Esperanto povos helpi al ĝi.

Jing: Nun pli grandan atenton ni donas al la ĝuado de riĉaĵoj de aliaj landoj, al importado de pli da alilandaj kulturoj, komprene-

S-ro Tibor Sekelj
(la dua de dekstre)
en la 71-a UK



ble, ni volas ankaŭ eksporti nian kulturon. Esperanto povas kaj devas ludi pozitivan rolon en la malferma politiko.

Sekelj: Jes. Mi povas diri, ke Esperanto staras je via dispono en tiu senco. Kaj ni jam klopodas, kaj ni povas fari multe pli, por diskonigi iom la kulturajn valorojn de Ĉinio.

Jing: Multan dankon.

ĈINIO SUBTENAS ESPERANTON NE NUR MORALE, SED ANKAŬ POR RECIPROKA UTILO

Jing: Nun mi povas diri nur ke ni certe konsideros pri nia subteno al la lingvo. Tio estas startpunkto, ĉar ni ne opinias nian subtenon al la Esperanto-movado nur filantropia afero. En niaj intereso, ni opinias, ke tio estas forta apogo por Ĉinio, almenaŭ granda utilo. Do, ni kunlaboras ne nur morale, sed ankaŭ por reciproka utilo. Ofte la kunlaboro kun profito estas pli fidinda.

Sekelj: Jes. Ekzemple, mi menciis unu planon. Tio estas televida kurso de Esperanto, tre populara kaj tre interesa, kiun ni povus fari kun Jugoslavio, Ĉinio kaj kelkaj aliaj nacioj por kune financi, kune dissendi.

Jing: Ĉe ni la televido kaj filmo apartenas al alia ministerio, tamen ni estas sub sama registaro. Ni povos intime kunlabori, subteni la planon. Kompreneble, estas la Ministerio

de Radio, Filmo kaj Televido, kiu tion decidis. Mi ne bone konas la aferojn, mi diras nur laŭ mia impresio. Ankaŭ niaj esperantistoj devas kulturi siajn daŭrigantojn. Iuj esperantistaj aktivuloj, kiujn mi konas, estas maljunaj, kiel s-ro Bakin kaj aliaj veteranoj. Ni tre bezonas tiel junajn esperantistojn, kiel li (Jing montras Ĝjang Hongĝang, kiu interpretas la interparolon). Do oni devas kulturi esperantistojn ekde ilia infaneco por solvi la problemon.

Sekelj: Jes. Ĝuste pro tio mi proponas, ke en universitatojn, en mezlernejojn kaj eĉ en elementajn lernejojn oni enkonduku kelkajn klasojn de Esperanto kiel la duan lingvon.

Jing: Kompreneble tio ne signifas, ke iom pli aĝaj ne devas lerni. Mi mem havas grandan intereson. Krome, mi aŭdis, ke Esperanto estas tre utila al infanoj en ilia lernado de aliaj lingvoj.

Sekelj: Jes, ĝi estas tre utila, ĉar ĝi havas bazan gramatikon, tre regulan kaj tre logikan. Tiu logiko helpas al la lernado de aliaj lingvoj.

... mi ne plu ĝenos vin, ĉar vi havas ankaŭ aliajn aferojn por fari. Kaj mi tre dankas pro tiu ĉi interesa interparolo.

Jing: Bedaŭrinde mi vere havas multon por fari, sed estas malmulto tiel interesa kiel nia interparolo.

Sekelj: Dankon!

Novaj Libroj

eldonitaj de la

Ĉina Esperanto-Eldonejo

Ĉina Antologio (1919 — 1949) (n-ro 10-Es-2064S) £ 6,40 US\$ 9,80

Kolekto de 55 noveloj, raportaĵo, eseoj kaj poemoj de la plej famaj ĉinaj verkistoj de tiu periodo, inkluzive de Lusin, Maŭ Dun, Bakin, Laŭ Ŝe, Gŭo Moĵŭo k.a. La libro vive spegulas la socian vivon en la tiama Ĉinio.

Oranĝa Ombrello (10-Es-1979P) £ 1,10 US\$ 2,15

Kolekto de mikronoveloj montranta la ĉiutagan vivon de ordinaraj ĉinoj.

Gaŭ Ŝiĉji: Aŭtobiografio de Bakterio (13-Es-1982P) £ 0,90 US\$ 1,60

Per viglaj lingvaĵoj la aŭtoro priskribas la vivon de bakterio. Ĝi estas interesa popular-sciencia legaĵo.

Kuracaj Manĝaĵoj (15-Es-2047P) £ 0,65 US\$ 1,25

Receptoj de kuracaj kaj sanigaj manĝaĵoj.

Ĉinaj Familiaj Pladoj (15-Es-2061P) £ 1,10 US\$ 2,15

Receptoj de ĉinaj pladoj facile pretigeblaj en familio.

Tajĝiĉŭan (17-Es-2065P) £ 1,30 US\$ 2,50

Speco de ĉina tradicia luktarto. Kiel saniga gimnastiko ĝi taŭgas precipe por maljunuloj kaj malsanuloj.

Ĉinlingva Konversacio (9-CEs-2070P) £ 1,10 US\$ 2,15

Elementa kurso konversacia de la ĉina lingvo pri ĉiutaga vivo.

Gvidlibro pri Pekino (12-Es-2067P) £ 1,55 US\$ 2,85

Ĝi servas kiel helpanto al eksterlandaj gastoj en vizito al Pekino, konigante vidindajn lokojn, hotelojn, restoraciojn, trafikajn liniojn, gravajn telefonnumerojn ktp., kun mapo kaj koloraj bildoj.

Vojaĝo tra Ĉinio (85-Es-284P) £ 8,80 US\$ 12,50

Albumo pri 24 turismaj urboj de Ĉinio, kun koloraj bildoj.

Pejzaĝoj de Pekino (87-EsEC-535) £ 0,50 US\$ 0,95

Serio da koloraj poŝtkartoj.

Pejzaĝoj de Ĉinio (87-EsEC-534) £ 0,65 US\$ 1,30

Serio da koloraj poŝtkartoj.

Mendu ĉe UEA, perantoj de EPCĈ aŭ la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (**GUOJI SHUDIAN**), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Bejĝing, Ĉinio

Korban-festo en Kaŝi

En la lasta aŭgusto mi flugis de Urumĉi al Kaŝi por partopreni en la tradicia Korban-festo de Islamo.

La aviadilo flugis okcidenten laŭ la norda vojo de la antikva "Silka Vojo", trans la fekundan oazon Aksu kaj senliman dezerton. Kiam la aviadilo estis atingonta la altebenaĵon Pamiro, mi jam vidis tra ĝia fenestro, ke Kaŝi, kiel verda juvelo, estas inkrustita inter neĝ-kovrita montaro kaj dezerto.

Mi atingis Kaŝi plenan de misteroj. En la movoplena Kaŝi regas agrabla klimato. Ujguroj konsistigas pli ol 90% de ĝia loĝantaro. La viroj, virinoj, maljunuloj kaj infanoj, ĉiuj ŝatas porti kvarangulan ĉapeton kun desegnoj. La viroj portas robon longan ĝis la genuoj kaj broditan ĉemizon. La virinoj ŝatas beligi sin per jupo kun nigra veŝto, orelingo, braceleto, fingroringo, kolĉeno kaj similaj ornamaĵoj. Iuj virinoj sin ornamas per vualo.

En Ŝinĝjang la ujguroj, kazaĥoj, ĥalĥazoj kaj la loĝantoj de aliaj ok naciminoritatoj kredas je Islamo. Ili prenas la 10-an de la dekdua monato de la islama lunkalendaro kiel Korban-feston. Laŭ la islama lunkalendaro la


jaro havas 354 tagojn. La celebrado de la festo daŭras tri tagojn. Dum la tagoj oni okazigas diversajn aktivadojn. Kvankam la festo devenas de la religio, tamen ĝi efektive jam fariĝis tradicia festo de naciminoritatoj. En la festo la naciminoritatoj gratulas unu alian, kio akcelas

interkomprenon kaj donas novajn signifon kaj enhavon al la festo.

Korban-o signifas feston, sinferon kaj sindonemon en la araba lingvo. Tial Korban-festo alinomiĝas bestobuĉa festo. Laŭ legendo de antikva religio, la profeto Abrahamo vidis en sonĝo

Islamanoj faras diservon antaŭ la moskeo Ajtiga.





Bazaro en la festo



Islamanoj brakumas unu la alian en la festo.

Alahon, kiu sugestis, ke li mortigu sian filon por montri sian fidelecon al Alaho. Kiam Abrahamo levis tranĉilon por mortigi sian filon, tien rapidis sendito

de Alaho kun ŝafo kaj ordonis al li buĉi ĝin anstataŭ sian filon. Surbaze de la legendo oni regule buĉas ŝafon por kulti Alahon, kio estas konata kiel tradicia

moro. Antaŭ la festo, ĉiu familio purigas siajn korton kaj ĉambrojn, rearanĝas meblaron, lavas litaĵon kaj preparas manĝaĵojn por la festo. Familianoj en aliaj lokoj laŭeble hejmenrevenas por celebri la feston kune kun sia familio. En la festo loĝantoj iras en moskeon. Imamo prezidas la kolektivan diservon de la festo, kio estas unu el ĝiaj gravaj aktivadoj.

La 16-an de aŭgusto, 1986 islamanoj havis sian feston. Ĉe la tagiĝo islamanoj de Kaŝi senĉese venis al la plej granda moskeo Ajtiga en la centro de la urbo. De malproksime oni povis aŭdi laŭtan krion de la muezino. Ankaŭ mi eniris la moskeon.

Laŭ la regularo neislamanoj, precipe virinoj, ne rajtas eniri en moskeon. Islamo opinias, ke virinoj dankas virojn por sia feliĉo. Ĝuste pro tio, mi, kvankam raportistino de EPC, nur povis eniri ĉambreton apud la kulta halo kaj rigardi la scenon tra fenestro. Je la oka la diservo komenciĝis kaj la korto pleniĝis de homoj. La diservo konsistas el kelkaj ceremonioj kaj movoj. La movoj estas irado, starado, laŭdado, riverencado, adorkliniĝo kaj surgenuiĝo. Antaŭ la diservo oni devas bani sin kaj lavi la manojn, kio estas nomata granda kaj malgranda purigo. Post kolektiva diservo oni intersalutas. Ili metas la dekstran manon sur la bruston kaj klinas sin antaŭen je 30 gradoj dirante "Saluton, saluton". Iuj palpas sian vizaĝon per la manoj (unu el la benaj ritoj de la religio).

Post matenmanĝo eksonis surnaoj kaj tamburoj sur minareto. Ĉiuj homoj en festaj kostumoj sen distingo de sekso kaj aĝo torrentis al la placo por kanti kaj

danci. Sama-danco estis la plej interesa. Laŭdire la danco "Sama" en formo unuopa, duopa aŭ triopa estas antikva religia danco. La ujuguroj ĉiam konservas la antikvan simplan arton kaj transplantis ĝin en nacian feston, tiel ke ĝi fariĝis amuzo necesa por festo. Krome, ili ŝatas ankaŭ la daŭlang*-an dancon Sajnajmu. Invitinte por si kompanon, viroj kaj virinoj eniris dancejon paron post paro. Ili estis geamantoj, geedzoj, amikoj, patro kaj filo aŭ avo kaj nepo. Iliaj dancmovoj estis graciaj, variemaj, facilaj aŭ solenaj.

La daŭlang-a danco karakterizas sin ĉefe per klara ritmo, forta movo kaj montras nomadisman kaj ĉasadon de daŭlang-oj en arbaro dum la pasintaj kelkcent jaroj. Ĉiuj movoj figure prezentas diversajn laborojn. Sub akompano de orkestro la rigardantoj en cirkloj kantante aplaŭdis ilin. Kiam rapidiĝis la ritmo de muziko kaj dancaj paŝoj, ekleviĝis la krio "Bis! Brave!" La dancantoj pli kaj pli entuziasmiĝis. Per gaja dancado ili adiaŭis la malnovan jaron kaj bonvenigis la novan.

Por pasigi la feston ĉiuj familioj buĉas ŝafon. Laŭ tradicia kutimo oni devas regali parencojn kaj amikojn per abunda festeno. Mi vizitis la hejmon de la ujugura maljunulo Ŝaliĝjang Kaĵiaĝji. Ĉiuj liaj familianoj estis gastamaj. La mastrino proponis teon al mi. La tablo estis plene kovrita de diversaj manĝaĵoj, kaj *sanzi*** , bombonoj, frititaj kukoj, fruktoj kaj multaj aliaj. Ĉirkaŭ la tablo mi kaj la gastigantoj ĝuis la frandaĵojn interparolante.

La 72-jara Kaĵiaĝji havas sonoran voĉon kaj sunbrunan viza-

ĝon. Li ne povas bone paroli en la hana lingvo, tial lia boparenco Ajlimu fariĝis interpretisto por mi. Kaĵiaĝji havas unu filon kaj du filinojn. Nun la maljunaj geedzoj vivas kune kun siaj filo, bofilino, nepoj kaj nepinoj. Bofilino Nabiŝa zorgas pri la mastrumado. Ŝi estas 33-jara kaj havas kvin gefilojn. Ŝi estas fileca al la bogepatroj, amas la edzon kaj estas laŭdata de la najbaroj.

Post simpla manĝo ili buĉis grasan ŝafon en la korto. Mi kaj infanoj kun scivolemo staris apude kaj rigardis pri buĉo kaj senfeligo kaj purigo de la internajoj. Kaĵiaĝji diris al mi, ke la viando de tieaj ŝafoj estas mezgrasa, delikata, sen malagra-

bla odoro, kaj viando rostita estas plej saliviga.

Subite aŭdiĝis gaja rido de knabinoj ĉe la pordo: Filinoj de lia filino venis gratuli lin pro la nova jaro. Ilia alveno tuj vigligis la korton plenan de floroj. Mi senprokraste levis mian fotilon. . .

Finiĝis Korban-festo. Forirante mi ekpensis la diron: Se vi ne vizitis Kaŝi, vi ne vere estis en Ŝinĝjang. Tial mi estas tre ĝoja pro tiu vojaĝo.

* *Daŭlang estas nomo de tribo vivanta en praarbaro.*

** *Sanzi estas fritita fragila farunaĵo vermicelforma.*

Buĉado de ŝafo en la festo



La antikva skulpturo de Ĉinio

Teksto de JUJ LIN

Fotoj de ĜONG ŜENG

La ĉina skulpturo naskiĝis en la malfrua periodo de neolitiko (antaŭ la 17-a jc. a. K.). Tiam jam aperis maskoj, skulptitaj ceramikaj nudaj virinoj kaj skulptitaj ŝtonaj homaj kapoj de naiva, simpla tamen versimila plastiko. En la periodo de la dinastioj Ŝang kaj Ĝoŭ (ĉ. la 17-a jc. a. K. — 770 a.K.) aperis nemalmultaj homfiguroj kaj malgrandaj jadaj bestoj, precipe bronzaĵoj en eleganta formo kun komplikaj ornamaj desegnaĵoj.

En la periodo de la dinastioj Ĉin kaj Han (221 a. K. — 220 p. K.) la ĉina skulpturo senprecedence progresis. La tiamaj skulptaĵoj karakteriziĝis per amplekseco, granda skalo, alta nivelo kaj riĉa enhavo. Ekzemple, la grandaj terakotaj militistoj kaj ĉevaloj ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio en Lintong-gubernio de Ŝenŝji-provinco estis miraklo en la argila skulpturo kaj ceramiko de Ĉinio. La terakotaj militistoj kaj ĉevaloj kaj ŝtongravuritaj bildoj de Han-dinastio spegulis la tiaman socian vivon kaj havas tre altan valoron de arto. Aparte menciinda estas la giganta ŝtonskulptaĵaro antaŭ la tombo de la granda strategiisto Hŭo Ĉjubing de Han-dinastio. Ĝi estis modelo de la tiutempa ŝtonskulptado.

En la periodo de la Okcidenta kaj Orienta Ĝin-dinastioj, la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (265-581), la disvastiĝo de budhismo instigis faradon de ŝtonkaverna-

roj kun budhaj statuoj. La abundaj budhaj statuoj en temploj, la grandaj ŝtonaj gvardioj kaj bestoj antaŭ la maŭzoleoj de imperiestroj kaj nobeloj, kaj homfiguroj kaj bildoj en la tomboj senprecedence prosperigis la tiaman skulpturon. Ekz., Jungang-ŝtonkavernaro de Datong de Ŝanŝji-provinco estas unu el la plej grandaj ŝtonkavernaroj de Ĉinio. La fotoj, kiujn vi nun vidas, montras unu el la ĉefaj kavernoj de Jungang. La pagodformaj kolonoj kaj muroj de la kaverno estas plenaj de niĉoj kun budhaj statuoj kaj bodisatvaj statuoj, kaj la kasono en formo de ŝaktabulo, kun belaj feinoj, bildigas gajan budhisman paradizon.

La antikva skulpturo de Ĉinio atingis sian kulminon en la periodo de la dinastioj Suj kaj Tang (581-907). La ŝtonskulptaĵoj ĉe maŭzoleoj, ŝtonaj homoj en tomboj, ŝtonkavernoj, budhaj statuoj en temploj k.a. atingis senprecedencan nivelon ĉu en kvanto, ĉu en arto. ekz., ŝtonaj leonoj ĉe Ĉjanling-maŭzoleo en Ĉjanŝjan-gubernio, Ŝenŝji-provinco, prezentis tre belan esprimmanieron kaj multe troiĝis la dignon de leonoj. La granda budha statuo en Fengŝjan-templo ĉe Longmen estas tipa reprezentanto de la Tang-dinastia ŝtonkaverna skulpturo. Ĝi sin tenas digne, tamen kviete kaj intime.

En la longa periodo de la fino de Tang-dinastio ĝis Ming-dinastio (907-1644), la ĉina skulpturo iom post iom vulgariĝis, ke

aperis statuoj de arhatoj similaj al laikoj kaj tiuj de Avalokitesvaro similaj al belulino. La plastiko evoluis de ĝeneraligo kaj koncizeco al lozeco kaj debilsvelteco, tamen la tekniko fariĝis ĉiam pli delikata, sed imponeco malsufiĉa. Ekz., la koloraj bodisatvaj statuoj de Ljaŭ-dinastio (916-1125) en Hŭajan-templo en Datong, Ŝanŝji-provinco, havas dignan vizaĝon kaj belan pozon. La fera dio-patrono de Song-dinastio (960-1279) en Ĝincitemplo en Tajjŭan, la ĉefurbo de tiu provinco, dank' al la detala observado de la reala vivo fare de la lertaj skulptistoj kaj dank' al ilia majstra tekniko, portis jam aspekton ne de dio, sed de malica oficisto en la tiama socio.

Ĉing-dinastio (1644-1911) estis la lasta dinastio de la feŭda socio de Ĉinio, kaj ĝia skulpturo dekadencis. Sed la skulpturo disvolviĝis en metiarta kampo pro la bezono de la luksa vivo de la reganta klaso kaj pro la influo de var-ekonomio kaj teknika progreso. Ekz., la ebura skulptaĵaro "Gaja Distriĝo" havas plaĉajn sveltajn kaj vivecajn homfigurojn. Ankaŭ la verdjada skulptaĵo "Naŭ Avoj" estas eminenta verko. Ĝi prezentas pitoreskajn montojn kaj kaskadojn, kaj elegantan kioskon. La maljunuloj kun malsamaj pozoj kaj mienoj, tiu sur ponto kaj tiuj ludantaj ĉinan ŝakon en kiosko aŭ ĝuantaj la pejzaĝon, estas tre versimilaj. La artaĵo montras tre altan nivelon de la tiama skulpturo.

Bronza vinujo en formo de ŝafo, farita en la periodo de 1066—771 a. K.



Unu el la ŝtonkavernaro de Jungang






*Ŝtona leono ĉe Ĉjanling-
maŭzoleo*



*Ŝtonskulptaĵoj ĉe maŭzoleo de S
tio*




*Terakotaj militistoj ĉe la maŭzo-
leo de la Unua Imperiestro de
Ĉin-dinastio*





ng-dinas-



Granda budha statuo en Fengŝjan-templo ĉe Longmen

La fera dio-patrono en Ĝinci-templo





*Koloraj bodisatvaj statuoj
en Hūajan-templo*

*La verdjada skulptaĵo "Naŭ
Avoj"*



*La ebura skulptaĵaro "Gaja
Distriĝo"*



Tute plasta aŭto kaj ĝia inventinto

Oktobre de 1984, du plensarĝitaj pluruzaĵaj aŭtoj de Pekino komencis sian longan vojaĝon de 25 000 km, inkluzive malfacilan vojon de 5 000 km kaj montvojon de 5 000 km. Aprile de 1985, la du aŭtoj revenis al Pekino, trakurinte 80 urbojn kaj 100 guberniojn. Trapasinte rigoran kontrolon kaj ŝtatan ekspertizon, la aŭto estis nomita BS-111-tipa tute plasta kamioneto. Ĝiaj teknikaj inventoj jam ricevis patenton en Ĉinio kaj kelkaj aliaj landoj.

Tia pluruza laktoblanka aŭto aspektas ordinara, tamen fakte ĝi estas tute plasta aŭto neniam vidita en la historio de aŭtofarado. Ĝi ne havas framon, kardan-akson kaj risortojn. Escepte de veturiga kaj dampa sistemoj, ĝiaj korpo, ŝoforkupeo kaj ŝarĝplato estas du-home movebla peco, farita el plasto plifortigita per vitrofibro.

Tia aŭto kun malpeza korpo kaj malmultaj perturboj konsumas malmulte da benzino kaj estigas malpli da bruo kaj polucio. Ĝi estas lacrezista kaj korodimuna. Ĝia manipulado estas simpla kaj la produktokosto malkara. Komparante ĝin kun importita avangarda kamioneto kun sama ŝarĝokapablo kaj maksimuma hora rapideco de 100 km., oni trovis, ke ĝia benzinkonsuma kvanto estis nur 69% de la lasta, dum ĝia neta pezo 51% de la lasta. Ekonomi-

kistoj antaŭdiris, ke ĝi fariĝos malkara kaj belaspekta trafikilo multe ŝatata de la uzantoj en la novekonomia epoko.

Oni ne nur estas mirigita pro apero de la tute nova aŭto, sed ankaŭ admiras ĝian inventinton, s-ron Tang Ĝinŝeng, ordinaran junulon kun pala kaj maldika vizaĝo.

Tang naskiĝis en Pekino en 1951. Kiam li lernis en mezlernejo, la fruktoĝardeno de la lernejo estis lia plej ŝatata loko. Liaj pupitro-kestoj ĉiam estis plenaj de ludiloj: Aviadiloj, kanonoj kaj militŝipoj. Sed sur lia poentokajero ofte legiĝis: la ĉina lingvo — 4 poentoj, mate-

matiko — 3 poentoj, la angla lingvo — 2 poentoj. Li opiniis sin malpli saĝa ol aliaj.

Li iam vivis en kamparo kaj tie partoprenis en agrikultura produktado. Poste li soldatiĝis kaj komencis stiri tankon. Sed por stiri tankon sole kuraĝo ne sufiĉas. Sekve, li komencis lerni infiniteziman kalkulon, recipron, ordinaran diferencialan ekvacion. . .

En 1975 la Fortuno favoris lin — Tang Ĝinŝeng estis akceptita de la Pekina Politeknika Instituto.

En la fino de 1982 li finis planon de tutplasta aŭto. Sed,

Tang Ĝinŝeng kaj lia tute plasta aŭto





Novtipa tute plasta aŭto



Tang Ĝinŝeng (la dua de dekstre) kaj aliaj fakuloj en la Ĉina Internacia Ekspozicio de Aŭtoj

ho ve, kiam li frapis je la pordo de Espero foje-refoje por trovi kunlaboranton, li ricevis malvarmajn respondojn: “Ni eĉ ne havas sufiĉan tempon por esplori nian propran aŭton, de kie ni akiros tempon por la via?” “Kia plasta mikro-aŭto? Pri ĝi ni neniam informiĝis. Ne ĝenu nin!”

Post kiam li estis rifuzita ĉie kaj multe spertis malvarman traktadon, li eĉ volis peti entreprenan licencon pri restoracio. Sed la riproĉo de lia patro inspiris lin al plia provo. Li pensis, kial mi ne povas trovi malgrandan fabrikon por kunlabori, kiam la grandaj fabrikoj ne volas tion? Li venis al malgranda fabriko entreprenata de kolektivo, sed ĝi ne havis sufiĉan forton por realigi lian planon. Li do ĉie serĉis helpanton.

Fine oni prezentis lin al Hŭo Ĝjun, direktorara prezidanto de la Prognoza Eksploata Kompanio de la Ĉina Scienc-teknika Konsulta kaj Serva Centro. Post 15-minuta interparolo, Hŭo Ĝjun jam konis la valoron de lia afero kaj malkaŝe diris: “Diru, kiom da mono vi bezonas por fari unu tian aŭton.

2 500 jŭanoj estis bagatelo por prove fari unu novtipan aŭton. Sed kiam la parolanto konsentis doni la sumon, tiu juna inventanto ekscitiĝis de neatendita favoro. Ĉar li povis daŭrigi sian aferon per tiu sumo plus siaj akumulitaj 860 jŭanoj.

Li petis malgrandan fabrikon, ke ĝi prilaboru 75 maŝinpecojn,

kaj alian malgrandan fabrikon, ke tiu funkciu kiel aŭto-muntanto. En la du sinsekvaj monatoj Tang Ĝinŝeng absorbita ĉiam restis ĉe la aŭto kun fabrikestro Song Jundi.

La 1-an de julio 1983, naskiĝis la tute plasta aŭto unua en la mondo. Sen ĵurnalistoj kaj gratulantaj homamasoj, ĝi silente mordrompis sian “umbilikan ŝnuron” en kaduka tenejo. Tang Ĝinŝeng tamen donis al ĝi benplenan nomon “Cigneto”.

Alternis tagoj kaj noktoj. Sagra rapide pasis pluraj monatoj. La Cigneto tamen restis tie kiel malbela anaseto, al kiu neniu ĵetis eĉ afablan rigardon. Fine ĝi estis elportita el la tenejo en korton. Post nelonge ĝi kovriĝis per dika tavolo da polvo.

Iun tagon post duon-jaro, al la malgranda fabriko venis du neatenditaj biciklistoj. La unua estis doktoro Song Ĝingjing, iama konsilanto de la Brita Reĝa Aŭto-Asocio kaj nuna direktoro de la Ĉina Aŭto-industria Kompanio. Lia akompananto estis instruisto Jŭan Ĝaŭŝjang de la aŭto-inĝeniera fakultato de Ĉinghŭa-universitato. Ili venis tien speciale por viziti la solecan “Cigneton”.

Oni senpolvigis la aŭton. La maljuna sinjoro Song rigardis ĝin atente kaj esplore. Subite li kaptis Tang Ĝinŝeng je la brako kaj diris emocie per vibranta voĉo: “Junulo, vi faris bele! Mi revenis al la patrolando antaŭ dekoj da jaroj kaj okupiĝis ĉefe pri tiu afero, sed mi ne sukcesis. Mi ne atendis, ke vi realigis mian deziron!”

Post nelonge Tang Ĝinŝeng komencis fari la duan aŭton, subtenate de la Ŝtata Konsilantaro, la Pekina Minerala Instituto, la Ĉina Scienc-teknika Asocio kaj aliaj institucioj. . .

Fingra pikturo de Liŭ Ĝongdong



Liŭ Ĝongdong en pentrado per fingroj

Iun antaŭtagmezon nelonge post la Printempa Festo de 1985, en la inaŭguro de Ŝjihu-parko de Hajkang-gubernio, Ĝuangdong-provinco, iu ĝentila mezaĝulo iris al la podia tablo. Iom meditante, li trempis en tuĉakvo sian fingron, kaj movis ĝin sur papero. Poste preminte la manpla-

ton sur la paperon li faris facilan ŝmiron, jen aperis sur la papero lotusfolio. Li turne movetis sur ĝi sian fingron, kaj je tio aperis aro da ŝtonoj. Li pentris per ungoj ondetojn en baseno. Poste, li uzis samtempe ambaŭ manojn kaj la dek fingrojn. En malpli ol kvarono de horo, li jam unu-

spire finpentris bildon “Lotusoj el Akvo” kun ĝustaj kolornuancoj. Tio vekis ĉe la rigardantoj admiron. Poste li elpoŝigis sian sigelilon kun ideografiaĵoj “Paŝtknabo de Lejĝoŭ” kaj per ĝi sigelis la pentraĵon.

Li nomiĝas Liŭ Ĝongdong kaj estas membro de la Ĝuangdong-

Paŝtknabo de Ŝjiŝŭangbanna



provinca filio de la Ĉina Belar-
tista Asocio kaj vicprezidanto de
la Gŭangdong-provinca Metiarta
Instituto.

Liŭ devenis de malriĉa kam-
parana familio de Hajkang de
Lejĝoŭ-duoninsulo kaj paŝtis bo-
von en infanaĝo. Dum la paŝ-
tado li faris dekmilojn da pentraj
ekzercoj sur krudaj paperoj.
Enirinte mezlernejon, li feliĉe
akiris direktadon de instruisto
kun eminenta pentrarto. Tio es-
tis por li grava turnopunkto de

paŝtknabo pentranta sur la tero
al pentristo. Li neniam forgesas
sian infanan vivon de paŝtado,
kolektado de brulligno kaj kap-
tado de fiŝoj kaj salikokoj. Li
tre amas sian hejmlokon kaj
fieras, ke li estas Lejĝoŭ-ano.
Tial li ofte sigelis siajn pentra-
ĵojn per "Paŝtknabo de Lejĝoŭ".

En 1959 Liŭ Ĝongdong suk-
cesis en ekzameno por eniri en
la Kantonan Artan Instituton.
Tie li unuafoje sciis pri fingro-
pentra arto. Li estis zorge ins-

truita de fama pentromajstro
Pan Tjanŝoŭ. Liŭ absorbiĝis en
fingropentrado.

Fingropentrado estas branĉo
de la ĉina pikturo. Legendo
diras, ke pentristo Ĝang Zaŭ
(kiu aktivadis ĉ. 782 p. K.) de
Tang-dinastio fingre pentris sur
silkaĵo. Tio estis la rudimento
de fingropentrado, sed bedaŭrin-
de liaj pentraĵoj perdiĝis kun la
tempopaso. Ĉe la komenco de
Ĉing-dinastio pentristo Gaŭ Ĉji-
pej (1672—1734) kreis fingran
pentrarton. En sia okjaraĝo li
komencis lerni pentradon. Sed
kiam li estis jam 20-jara, li an-
koraŭ ne multe sukcesis. Iun
tagon li sonĝis, ke maljunulo
kondukis lin en ĉambron, kies
muroj estis plene kovritaj de
pendantaj majstraj pentraĵoj. Be-
daŭrinde ne estis peniko kaj
tuĉo en la ĉambro, nur vazo kun
akvo. Li do kopiis la pentraĵojn
per fingro trempita en akvo.
Inspirita de la sonĝo, li pentris
per fingro sur papero kaj silkaĵo,
kaj li plene posedis la pentrar-
ton en la sonĝo. De tiam li fa-
miĝis pro sia fingra pentrarto,
kiu rapide estis enkondukita en
Japanion, Koreion kaj aliajn lo-
kojn. En la pasintaj pli ol 300
jaroj multaj lernis lian arton, sed
malmultaj atingis altan nivelon.
En la lastaj kelkdek jaroj ŝajne
estis konita nur la fingra pentrar-
to de Pan Tjanŝoŭ.

Kun solida bazo de penika
pentrado, Liŭ Ĝongdong ĉiamani-
ere esploras la fingran pentrar-
ton. Li diris, ke esplori la fin-
gran pentrarton de la ĉina pen-
trarto ne estas krei ion novan
kaj originalan, sed celas disvolvi
la fingran pentrarton.

Kvankam fingra pentrado ne
estas tiel facila kiel penika pen-
trado, tamen ankaŭ ĝi havas sian
propran superecon. Fingroungo

Printempo



Gruo-paro





Hüangšan-monto en nubaro

povas fari malmolajn kaj akrajn strekojn, fingrumado povas fari rondajn kaj dikajn strekojn, ungo kaj fingro en samtempa uzado povas atingi artan efekton de rigideco kaj moleco, plurfingra uzo havas pli riĉan esprimon en kuniĝo, disiĝo kaj turniĝo. La fingrumado, fingropartoj kaj manplato povas fari pli grandan tuĉadon.

Liŭ Ĝongdong faris multajn pentraĵojn, lerte aplikante tiujn teknikojn. Lia bildo "Paŝtknabo" montras, ke kelkaj freŝaj salikaj vergetoj pendas super akvo, bubalo apenaŭ levas el la akvo la kapon, ĝia ĵus elakviĝinta dorso estas akveca, sur ĝi sidas senzorga paŝta bubo. La bildo estas plena de lirikeco, ĝia aranĝo estas originala kaj figuroj vivecaj.

Por pentri la bildon "Antikva Banjano super Rivero", li strekis en tradicia metodo branĉojn kaj trunkon de maljuna banjano per dikaj kaj fortaj linioj faritaj per unu fingro kun densa tuĉakvo, nuance punktis per pluraj fingroj la branĉojn, la tuĉakvaj makuloj lerte esprimis la impresivan efekton de la folioj en lumo. En lia pentraĵo "Ĉju Jŭan en Versfarado", la ĉina antikva poeto Ĉju Jŭan, kiu zorgis pri la patrolando kaj popolo, staras, en fortaj prizorgo kaj indigno, ĉe ondanta rivero malgarŭ vento kaj pluvo. La satura tuĉado kaj fluaĵ linioj vidigis sentebajn vivecon kaj poezian etoson de granda indigno.

Liaj pentraĵoj faritaj per fingroj havas diversajn temojn pri

pejzaĝoj, floroj, insektoj, fiŝoj, birdoj kaj bestoj. Pinoj kaj grupoj, lotusfloroj kaj agloj fariĝas vivaj sub lia mano; montoj, ŝtonoj, nuboj kaj akvoj de li pentritaj vekis fortan intereson ĉe rigardantoj. Li rompis la katenon de tradiciaj temoj de fingraj pentraĵoj pri la supre diritaj objektoj kaj pentris ankaŭ vivoplenajn urbojn, riĉajn hejmlokojn de elmigrintaj ĉinoj kaj aliajn temojn pri reala vivo. La kreado donis novan forton al la antikva arto.

Liaj pentraĵoj havas tradiciajn efekton de intenseco, heleco, sekeco kaj humideco kaj ankaŭ ombbron de modernismaj pentristoj. Li aparte admiris la efekton de ne tute kunigitaj linioj, kaj tio donis al la pentraĵo senliman es-

primivon. Tial lia fingropentrado ne nur heredis la superecon de tuĉpenika pentrarto, sed ankaŭ esprimis la artan trajton de modesteco, simpleco, forta streko, kontinuaj linioj kvazaŭ rompitaĵ, simplaj strekoj kun riĉa enhavo kaj aliaj en fingropentraĵoj.

Por altiĝi sian fingran pentrarton, li vojaĝis al multaj pitoreskaj montoj kaj riveroj, de la Kvinvingra Montaro en suda Ĉinio ĝis Songhŭa-rivero en la nordo, de la landinterna Siĉŭan-provinco ĝis la orienta marbordo, ĉie estis spuroj lasitaj de li en diligenta esplorado. Pli-ol-20-jara diligenta esplorado rekomencis lin per brila sukceso. Liajn pentraĵojn kontente taksis famaj ĉinaj pentristoj Liŭ Hajsu, U Zŭojen, Li Kejan, Li Kuĉan kaj aliaj. Studio, televida stacio, radiostacio, ĵurnaloj kaj gazetoj raportis pri lia fingra pentrado. Liaj fingropentraĵoj estis eksponitaj ne nur enlande, sed ankaŭ en Singapuro, Japanio, Kanado, Hongkong, Usono kaj Aŭstralio. Iuj el Kanado, Japanio kaj Aŭstralio speciale venis al Kantono por peti de li instruon. La revuo "Transmara Arto" de Novjorko de Usono invitis lin kiel sian artan rubrikiston.

Liŭ Ĝongdong fariĝis pentristo fama en- kaj eksterlande, sed li ne estas kontenta pri tio. Li diris: "Antaŭ honoro, famo kaj profito, mi firme tenos en mia memoro tion, ke mi estas 'paŝt-knabo de Lejĝou'". Nur la arto estas por mi vera konsolo. Mi estas mezaĝa kaj havas ankoraŭ longan vojon en artista vivo. Mi intencas vojaĝi tra la tuta lando, fari skizojn, kolekti grandan kvanton da pentraj materialoj kaj fari per miaj fingroj pli multajn kaj pli belajn pentraĵojn por levi la fingran pentrarton al pli alta nivelo."

Abonu "El Popola Ĉinio"!

Nun komenciĝas 1987-a abonvarba kampanjo por EL POPOLA ĈINIO. Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1986 10 01 ĝis 1987 02 28), ricevos tradician ĉinan rulpentraĵon. La abonvarbantoj ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

ABONTARIFO DE EPĈ

(Ekvalidas en la 1-a de Oktobro)

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	14.00	24.00	34.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	500	900	1300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugaliao	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	13.00	22.00	30.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00

**VARBILON KAJ SENPAGAN SPECIMENON
NI SENDOS LAŬ PETO.**

Dio de celtabulo (Humuraĵo)

Iu antikva generalo faris ekspedicion kun siaj soldatoj. Kiam li estis perdonta la batalon, subite venis el la ĉielo dio kun helptrupo. Tiel la generalo venkis la malamikojn.

La generalo ĝislarme esprimis sian dankon. Li genuiĝis kaj ador-kliniĝis al la dio demandante lin:



“Kiel vi nomiĝas?” La dio respondis: “Mi estas dio de celtabulo.”

La generalo nekomprene diris al si: “Mi havas nenian rilaton kun li, pro kio li helpis min?” Li demandis: “Mi estas senkapablulo, je kio mi indas vian helpon?”

La dio diris: “Kio! Ĉiutage vi ekzercas vin en pafado, sed via sago neniam vundis min. Ĉu tio ne signifas vian prizorgon al mi?”

Serĉado de bovo (Inteligenteca testo)

Iu kamparano perdis sian bovon. Li serĉis ĉie, sed vane. Sekve li sin turnis al faden-disaŭdiga stacio por peti informi la aferon. Staciestro Gŭo demandis lin: “Kiam vi perdis vian bovon?”

“Aŭ lastjare aŭ ĉi-jare,” respondis la kamparano.

“Kiom da bovoj vi perdis?”

“Aŭ unu aŭ du.”

La estro tuj skribis anoncon por serĉo, kaj la problemo solviĝis tuj post la disaŭdigo.

Ĉu vi scias, kiom da bovoj perdiĝis kaj kiam?

(Respondo trovebla en ĉi numero)

Neapartigebla novjara karto (Magio)

Ludo: Tenu vertikale koverton. Montru ĝin por atesti, ke ĝi estas malplena. Metu en ĝin novjara karton kaj glu-fermu la koverton antaŭ la ĉeestantoj. Tiondu la koverton en la mezo kaj elprenu la karton, kiu restas sendifekta.



Artifiko:

1. Faru antaŭ la ludo aper-turon sur la dorso de la koverto.

2. Eltiru duonon de la enko-vertiĝinta karto tra la aperturo, faldu kaj firme tenu ĝin.

3. Tiondu la koverton kaj eltiru la karton.

KARIKATURO



ĈINIO SUKCESE REPRENIS PLIAN SPUTNIKON

Plia sputniko de Ĉinio por scienca esplorado kaj teknika eksperimentado destinita por observado de la teritorio revenis laŭ difinita plano la 11-an de oktobro, 1986.

Dum la funkciado kvin-taga sur la orbito ĉiuj aparatoj de la sputniko laboris normale kaj akiris grandan kvanton da teknikaj donitaĵoj, kiuj estos uzataj por observado de la ĉina teritorio, minerala prospektado, media protektado, agrikulturo, forstokulturo, akvomastumado, oceanologio kaj sis-mologio, kio akcelos la ekonomian disvolviĝon kaj scienc-esploradon. La Ĉina Popola Asekura Kompanio asekuris la lanĉon kaj revenon de la sputniko. Ekde 1975 Ĉinio laŭplane reprenis ĉiujn ok lanĉitajn sputnikojn.

16 VIDINDEJOJ DE PEKINO LASTATEMPE ELEKTITAJ

En Pekino estas multaj vidindejoj. Antaŭ nelonge la Pekina Turisma Buroo kaj iuj koncernataj institucioj iniciatis balotadon por 16 vidindejoj de Pekino. La nove elektitaj 16 vidindejoj estas: Tjan'anmen-placo, Imperiestra Palaco, Granda Muro ĉe Badaling, Bejhaj-

parko, Somera Palaco, Ĉiela Altaro, Ŝjangŝan-parko, Sidu-pramejo, Ruino de Pekin-homoj ĉe Ĝoŭkoŭdjan, Longĉing-ravino, Templo de Granda Sonorilo, Blankdraka Lageto, Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio, Lugoŭĉjaŭ-ponto, Granda Muro ĉe Mutjanju kaj Dagŭanjŭan-ĝardeno.

MEZNOMBRA VIVDAŬRO DE LA ĈINOJ DUOBLE LONGIĜIS

Antaŭ 1949 Ĉinio estis unu el la landoj, kies loĝantoj havis plej mallongan meznombrian vivdaŭron. Tiam la meznombra vivdaŭro de la ĉinoj estis 35 jaroj. Sed nuntempe, la meznombra vivdaŭro de la ĉinoj atingis 68.72 jarojn.

SINTEZA BENZINO ELFARITA

Antaŭ nelonge la Ŝjian-a kaj Pekina Nov-energia Kompanio elfaris novan sintezan benzinon. Post ekspertizo ĝi estis registrita ĉe la Ŝtata Patenta Buroo.

La sinteza benzino prenas kromproduktaĵon metanolo de kemiaj kaj kemisterkaj fabrikoj kiel la ĉefan materialon kaj, ankaŭ senplumban kontraŭeksplodaĵon, malmulte de benzeno kaj plurajn aldonajojn. Kelkcent-foja prov-

uzado pruvis, ke ĝi estas altkaloria brulaĵo kaj havas uzeblecon egalan al tiu de diversaspecaj benzinoj, kaj eĉ superas la naturan benzinon per siaj grandaj eksploda kaj mova fortoj.

VIRINO KUN CEREBRA HEMISFERO TRAVIVIS 28 JAROJN

Antaŭ 28 jaroj Ŝju Hŭan suferis cerebran paralizon kaj estis operaciita je fortranĉo de la dekstra cerebra hemisfero en Hŭaŝan-hospitalo en Ŝanhajo. Post tri jaroj ŝi komencis lerni en elementa lernejo. Ŝi jam finis lernadon en mezlernejo. Nun ŝi laboras en iu fabriko de Ŝanhajo. Ŝi estas iom lama kaj ŝia maldekstra mano iom kurba. Ŝi havas saman inteligentecon kiel sanuloj.



ORDINARAJ BOVINOJ NASKIS LAKTOBOVINOJN

Docento de la Nordokcidenta Agronomia Universitato de Ĉinio kaj kamparanoj de Ŝenŝji-provinco kune starigis laktobovinejon kaj starigis greftan stacion de laktobovinoj. En pli ol unu jaro ili greftis embriojn el purrasaj laktobovinoj kun nigra-blankaj makuloj en la uteron de 36 ordinaraĵ flavaĵ bovinoj kaj hibridaĵ bovinoj, el kiuj 11

La Feliĉa Ruĝa Korto en Dagŭanjŭan-ĝardeno



gravediĝis kaj 8 el ili naskis bovidojn.


SENDANĜERIGA ROBOTO

La Ĝjangbej-a Maŝinfabrika de Ĝjilin en nordorienta Ĉinio antaŭ nelonge elfaris du robotojn taŭgajn por formovi danĝerajn eksplodaĵojn kaj brulemaĵojn.

Ekspertizinte ilin, fakuloj opiniis, ke la robotoj ebligis al Ĉinio havi robotojn por trakti eksplodaĵojn. Ĉiuj pecoj de la du robotoj estis produktitaj de Ĉinio.

ĈINA KULTURA VILAĜO KONSTRUOTA EN NARA DE JAPANIO

En la japana antikva ĉefurbo Nara estos Ĉina Kultura Vilaĝo — konstruaĵaro kun antikva civilizaĵo de Ĉinio.



La sendanĝeriga roboto de tipo PXZ-102

La Ĉina Kultura Vilaĝo okupos areon de 70 000 kvadrataj metroj, tie aperos konstruaĵo simila al Hanjŭan-halo en Daming-palaco, konstruita de la imperiestro Taj-zong (599-649 p.K.) de Tang-dinastio (618-907 p.K.), en Ĉang'an (la nuna Ŝjian). Prenante kiel prototipon Ŝjisi, foiron de la antikva

Ĉang'an, oni konstruos komercan straton por vendi ĉinajn varojn. Kaj krome, oni tie aperigos konstruaĵojn imite al famaj ĉinaj Ĝjajugŭan-pasejo, Dunhŭang-ŝtonkavernaro, la Granda Muro, kavernoj de Ŝenŝji-provinco, kortoj de Pekino, domoj de la naciecoj Taj-a, Tibeta kaj Ujgura.

NOVA ALBUMO

Vojaĝo tra Ĉinio

Ĉinio kun vasta teritorio kaj historio de 5 000 jaroj havas sennombrajn historiajn restaĵojn. La albumo konigas al vi 23 turismajn urbojn de Ĉinio kaj la Tri Gorgoĵojn de Jangzi-rivero. Ĝi helpas vin koni ĝenrojn, pladojn kun loka gusto, modernajn hotelojn kaj ĉefajn vidindajn lokojn, kiaj la fama antikva ĉefurbo Pekino, la urbo Ŝjian konata kiel muzeo de la ĉina historio, la "paradizoj" Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ, la urbo Gujlin kun pejzaĝoj plej belaj en Ĉinio kaj la urbo Lhasa sur la monda tegmento. Tiuj urboj povas reprezenti la malfermitajn turismajn urbojn de Ĉinio. La albumo estis kompilita de la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĝi, 136-paĝa kun 166 koloraj bildoj kaj 25 klaraj turismaj mapoj, bone servos al la vojaĝantoj en Ĉinio kaj havigos al niaj legantoj, kiuj ankoraŭ ne vizitis Ĉinion, belan ĝuon, kvazaŭ ili mem vojaĝus en tiuj lokoj.



Formato: 185 mm. × 260 mm.

Prezo: US\$12,50 £8,80

(85-Es-284p)

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**
Peranto de EPC

aŭ **Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN)**, P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Ĉinaj alkoholaĵoj

de ĜENG ĜENGJE

Bona alkoholaĵo estas agrabla por homoj. En Ĉinio troviĝas diversaspecaj alkoholaĵoj. Kutime en geedziĝa, naskiĝtaga kaj aliaj festoj oni sin regalas per bona alkoholaĵo por celebrado.

Jam antaŭ longe la ĉina popolo posedis teknikon de vinfarado. Inter la grandnombraj elterigitaj historiaj objektoj troviĝas ne nur multaj vinuoj kaj drinkaj vazetoj, sed ankaŭ antikva alkoholaĵo konservata ĝis nun. Ekzemple, antaŭ kelkaj jaroj oni elfosis du kruĉojn kun alkoholaĵo produktita antaŭ 2 280 jaroj, el antikva tombo en Pingŝan-gubernio, Hebej-provinco. Unu el ili entenis smeraldan kaj diafanan alkoholaĵon kaj la alia malhelverdan. La elfositaj kruĉoj estis bone fermitaj. Kiam ili estis malfermitaj, tuj tiklas la nazon ilia aromaodoro. Laŭ analizo de sciencistoj, la alkoholaĵo estis fermentigita per gisto. Ĝia eltrovo prezentis valoran materialon por esplori teknologion pri alkoholaĵofarado en Ĉinio.

En Ĉinio estas miloj da specoj de biero, rizvino, vino, ratafio, brando k.a. En la Unua Alkoholaĵogustuma Kunveno en 1952 Maŭtaj-brando de Gujĝoŭ, Teĉju-brando de Luĝoŭ de Siĉŭan-provinco, Fen-brando de Ŝinghŭa-vilaĝo de Ŝanŝji-provinco, Ŝjifeng-brando de Fengŝjang de Ŝenŝji-provinco, Ĝjafan-rizvino de Ŝaŭŝing de Ĝeĝjang-provinco, la ormedala brando, tonika ver-

muto kaj ruĝa vino de Jantaj de Ŝandong-provinco estis elektitaj kiel ok superaj alkoholaĵoj de Ĉinio. En la lastaj jaroj estis elektitaj 18 specoj de landfamaj alkoholaĵoj kaj 47 specoj de bonkvalitaj alkoholaĵoj. Estas diversaj specoj de ĉinaj alkoholaĵoj pro malsameco de kvalito. Eĉ unu speco havas malsamajn tipojn kaj gustojn.

Ĉina brando kun forta alkoholo estas distilita el fermentinta amelhava greno. Ĝia aromo estas dividita ĉefe en kvin tipojn: delikata aromo kun Fen-brando kiel la tipa, densa aromo kun Teĉju-brando kaj la Kvingrena Brando de Siĉŭan kiel la tipaj, originala aromo kun Maŭtaj de Gujĝoŭ kiel la tipa, rizaromo kun Sanhŭa-brando de Ĝuangŝji kiel la tipa.

Maŭtaj-brando produktiĝas en Maŭtaj-urbeto de Ĵenhŭaj-gubernio, Gujĝoŭ-provinco. Antikve la urbeto estis izolita kaj malofte vizitata. En 1745 tie komencis trafiki ŝipoj, la urbeto fariĝis grava havenurbo ĉe Ĉiŝuj-rivero. La dokistoj bezonis alkoholaĵon pro peza laboro, kaj ĝin bezonis ankaŭ komercistoj kaj vojaĝantoj por sin plezurigi. Tiel alkoholaĵo-farado multe progresis kaj iom post iom oni perfektigis sian teknologion kaj produktis superan nektaron. Maŭtaj-brando ne nur okupas la unuan lokon inter la ĉinaj famaj alkoholaĵoj, sed ankaŭ estas honorita kiel unu el

la tri mondfamaj brandoj, la aliaj du estas konjaka brando kaj skota viskio.

Oni ŝuldas la bonan kvaliton de Maŭtaj-brando al ĝiaj bonkvalitaj materialoj kaj la tradicia fermenta teknologio. Ĝi estas preparita el lokaj bonkvalitaj sorĝo kaj tritiko. Ĝia farado karakteriziĝas per plurfoja fermentado, plurfoja elpreno de alkoholaĵo, maĉero de la feĉo en alkoholaĵo, longtempa konservado kaj zorgema aldono de ingrediencoj. Ĉiufoje oni metas en ĝin novan grenon, kiu bezonas okfojan fermentadon kaj okfojan elprenadon de alkoholaĵo. La fermenta periodo daŭras 1-10 monatojn. Oni devas meti la malbonkvalitan alkoholaĵon en kelon kaj fermentigi ĝin refoje. La fermentinta alkoholaĵo devas konserviĝi tri jarojn. Poste brandfaraj majstroj zorgeme miksas en ĝin alkoholaĵon konservitan 5-, 10-, 20-jare, kaj tiel formiĝas Maŭtaj-brando pure klara, milda kaj delikate aroma. Tiu brando entenas ne tre multan alkoholon, sed estas forta. Tamen ĝi ne frapas la kapon, ne pikas la gorgon kaj ne facile ebriigas la drinkantojn.

La rizvino estas farita el glueca rizo, rizo kaj milio, kun aldono de speciala gisto kaj laŭ procedo de glukozigo, fermentado kaj distilado. La plej bona el la rizvinoj estas Ŝaŭŝing-rizvino. Estas multe da specoj de la rizvino. La ĉe-

faj estas Hŭadjaŭ-rizvino, Ĝjafan-rizvino, Ŝannjang-rizvino kaj Ŝjangŝjue-rizvino. Ĝjafan-rizvino estas fermentinta el rizo kun aldono de glueca rizo. Ĝi estas dolĉa kaj apetitveka. Ŝannjang-rizvino estas gustoforta kaj fermentinta el rizo kaj alkoholaĵo. Ŝjangŝjue-rizvino estas preparita el feĉo de Ĝjafan kaj rizo. Hŭadjaŭ havas interesan historion. Legendo diras, ke en antikva Ŝaŭŝing, ĵus naskinte filinon, la gepatroj devis aĉeti du vazojn da rizvino, fari artan reliefon sur la vazoj, kaj poste konservi ilin en kelo. Oni elprenis la rizvinon je edziniĝo de la filino, portis ĝin al la bofila familio. Regalo de gastoj per ĝi simbolas feliĉon. Tial la rizvino ricevis alian nomon filina rizvino.

La plej bonkvalita el la ĉinaj bieroj estas tiu de la Ĉingdaŭ-a Bier-fabrika de Ŝandong-provinco. Ĝi estas farita el bonkvalita materialo — minerala fontakvo de Laŭŝan-monto en la antaŭurbo de Ĉingdaŭ, per originala fermenta teknologio kaj rigora scienca administrado. Ĝi estas diafane orflava, gustoplena, dolĉa kaj refreŝiga, kun sufiĉa karbona dioksido kaj delikataj ŝaŭmoj.

Vino kaj ratafio estas preparitaj el freŝaj fruktoj, per fermentado kaj distilado. Vino, kun bela koloro, entenas diversajn vitaminojn, mineralojn kaj sukerojn kaj okupas gravan lokon el la ĉinaj ratafioj. El mulaj ĉinaj vinoj la plej bonkvalitaj estas tonika vermuto, blanka vino, ormedala brando produktitaj de Ŝandong-provinco, la ĉina ruĝa vino kaj speciala brando de Pekino, seka blanka vino kun marko Granda Muro de la Ŝaĉeng-a Vinfara Kompanio de Hebej, kaj la duondolĉa blanka vino kun marko Dinastio de la Ĉina-Franca Vinfara Limigita Kompanio de

Tjanĝin. Krome Ĉinio produktas ankaŭ multajn aliajn ratafiojn, kiaj pomvino de Ljaŭning, mandarinvino de Siĉŭan, arbutvino de Ĝjangŝji, liĉivino de Fuĝjan, ananasvino de Gŭangŝji, orangvino de Ĝeĝjang kaj pirvino de Hebej, kaj vinoj fermentitaj el frago, kratag-fruktoj kaj jangtaŭvino (*Actinidia chinensis*), ĉiuj kun sia distingaĵo konservas originalan guston kaj ebriigan aromon.

Kunmiksitaj alkoholaĵoj, inkluzive fruktsukan vinon kaj eliksiron, estas preparitaj proporcie el alkoholaĵo aŭ manĝebla alkoholo kun aldonitaj sukero, aromaĵo, manĝebla pigmento aŭ drogoj. Bambufolie Verda Brando produktita de la Ŝinghŭacun-a Fen-branda Fabrika de Fenjang-gubernio, Ŝanŝji-provinco estas tipo de la kunmetitaj alkoholaĵoj. Tiu vino kun longa historio estas macerita per bambufolioj. Post

Maŭtaj-brando

De maldkstre:
Ŝjifeng-brando,
Bambufolie Verda Brando,
Fen-brando kaj Ĝjafan-rizvino




plibonigo ĝi ricevis difinitan tipon en 1914. Ĝi estas preparita el fen-brando, proporcie kun aldonitaj angeliko, amomo, santalo, suzigio (*Suzygium aromaticum*), aŭklandio (*Aucklandia lappa*), bambufolioj kaj aliaj drogoj kun aldono de kando. Ĝi superas aliajn samspeciajn alkoholaĵojn kaj havas naturan koloron, aromon kaj guston de la maceritaj drogoj. Ĝi povas vigligi sangon kaj energion, forigi mukaĵon kaj sanigi la hepaton.

En Ĉinio cirkulas legendo pri "vinfarado de simioj". En pratempo simioj sin vivtenis per sovaĝaj fruktoj, kiuj abundis ĉie en arbaro. La fruktoj maturiĝis ne en ĉiuj sezonoj, tial ili devis konservi tiajn fruktojn en kavereno. Post longa tempo ili putriĝis, la ŝimiĝintaj fruktoŝeloj nature fermentiĝis la fruktojn,


kiuj iom post iom formiĝis en nektaron aromoplenan. Tiu "simi-vino" fakte estis nature formiĝinta sovaĝfrukta vino. Nun ankaŭ la sovaĝfrukta vino estas populara en Ĉinio pro senpolucieco kaj aparta gusto. Iu vinfabriko en arbara regiono de la Granda Ŝing'an-montaro produktas pli ol 30 specojn da vino el dekelkaj specoj de sovaĝaj plantoj, kiaj ruĝfaba vino, vakcinfrukta vino, eglanteria vino, krizantema vino k.a. En 1985 la speciala ruĝfaba vino gajnis arĝentan medalon de bonkvalita manĝaĵo de Ĉinio.

Modere trinki vinon, precipe tiun kun malmulta alkoholo, vigligas cirkuladon de sango kaj veki apetiton. Longtempa ekscesa drinkado povas damaĝi la hepaton kaj nervajn sistemojn kaj kaŭzi alkoholismon.



Post la unua lavo (Karikatur) de GŬO BAŬSENG

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO




1. Pekino 2. Hulun Bujr 3. Kaŝi 4. Cinghaj-provinco 5. Gŭangdong-provinco

Nupto de ujguroj

Fotoj de ŜEN ĈEN

Feliĉa nova paro



Pririgardo de doto





Imamoj benas la novgeedzojn per litanio.

La nupto de ujguroj en Ŝinĝjang havas ilian fortan nacian guston kaj montras iliajn tradiciajn morojn kaj ilian lertecon en kantado kaj dancado.

La nupto konsistas el edziĝatestado kaj bonvenigo al novedzino. La edziĝatestadon prezidas maljunulo. Laŭ tradicia kutimo li donacas po unu bakitan ku-

kon trempitan en salakvo al la novgeedzoj. Ili devas tuj manĝi la kukojn por esprimi sian deziron geedziĝi, dividi la ĝojon kaj suferon kaj ami unu la alian dum la tuta vivo. Aparte interesa estas la bonvenigo al novedzino. La novedzo portas la doton al la familio de la novedzino. La gastoj ĝin pririgardas. Kaj la novedzino en belaj vestoj kaj kun vualo sur la kapo eliras el sia domo, akompanate de knabinoj. Proksimiĝante al la hejmo de la novedzo, ŝi devas trapasi la fajron antaŭ la pordo por montri sian fidelan amon.

Post la eniro de la novedzino en la geedziĝan ĉambron, la novedzo malrapide senvualigas ŝin. Jen kulminas la nupto. En kaj ekster la korto ekdancas ĉiuj, ĉu junaj, ĉu maljunaj. La gajeco daŭras eĉ la tutan nokton.

Geknaboj gratulas la novedzinon.





Oni rigardas la geedziĝan ĉambron.

La novedzino pretas trapasi la fajron antaŭ la domo de la novedzo.

Edziĝa festeno kun nacia gusto



Poŝtmarkoj pri loĝdomoj

Teksto de JU PING

Tiu poŝtmarkoserio kun ĉinaj loĝdomoj kiel enhavo estis projektita de vicprofesoro Ĉen Hanmin de la Centra Instituto de Artoj kaj Metioj, ĝiaj instruisto Li Ĝongfa kaj esplor-studento Hŭa Ĝjanŝin kaj emisiita en

1986. La nominala valoro varias inter 1 kaj 110 fen-oj (1 fen-o egalas al centono da jŭano).

La poŝtmarkoserio prezentas loĝdomojn de malsamaj regionoj, malsamaj naciecoj kaj malsamaj stiloj de Ĉinio, kaj mon-

tras diversajn vivkutimojn, tradiciajn morojn kaj belegan arkitekturon. La desegnado kunfandiĝas kun tradicia pikturo kaj moderna projektado kaj donas al la serio fortan nacian guston kaj senton de epoko.



Popola muziko

(Novelo)

Varmeta maja vespero en Masang-urbeto. Ĉio estis peze purpurigita de la subiranta suno. Jasmeno, la mastrino, kuiristino kaj ankaŭ kelnerino de la drinkejo "Jasmeno" en la centro de a urbeto, trinkis du uncojn da rizvino, manĝis bovlon da vermiĉeloj kun du pecoj da "fiodora" fermentinta toŭfuo kaj telero da kokointernaĵoj. Kunportante varmtason da forta teo kaj faldeblan seĝon, ŝi supreniris sur la altan digon de la rivero Balong preterfluanta la urbeton. La digo ebligas havi panoraman vidon de la tuta urbeto, kies centoj da grizaj tegolaj tegmentoj formis kontinuan tuton. La urbetan centron trairas granita strato. Malantaŭ la urbeto estis streĉe konstruataj sukerfabriko kaj kanvas-teksejo investitaj de la gubernia registaro. Je 1.5 km. for de tie oni pavimis novan ŝoseon. Rulpremilo iradis tien kaj reen kun obtuza bruo kaj tremetigis la teron.

Prospere floras la soforoj sur la digo. La branĉoj estis neĝe blankigitaj de grapoloj, kaj la densa aromo iom sufokis la spiradon. Jasmeno malrapide gustume trinketis teon kaj plezurplene svingetis la piedon en pantoflo. Ŝiaj strabetaj, ĉarmaj okuloj direktiĝis al la urbeto ĉe la bordo kaj la granda tapiŝo de plantoj sur la kampo.

Vespero lante cedis la lokon al nokto. La ĉielo iom post iom fariĝis helblua. La luno estis brila. Super la rivero ŝvebis maldensa nebulo. Tiam supreniris sur la digon Lamulo Fang la Sesa, najbaro de Jasmeno, mastro de tetrinkejo kaj Flavokululo, mastro de restoracio, ambaŭ kun faldebla

skabelo. Post ili venis Variolulo Du Ŝuang, butikomastro, kaj Sanŝje, fripono en la urbeto.

La kvin personoj sur la digo estis famaj en la urbeto. Krom Sanŝje malestimata pro siaj mallaboremo kaj klaĉemo, la aliaj kvar registris sin ĉe la ŝtata oficejo kaj starigis butikon aŭ restoracion en la lastaj 3 jaroj, dank' al siaj personaj kapabloj. Ekde tiam la urbeto havas sian komercan centron unikan en la historio. La centro multe gajigis la monotonan vivon de la loĝantoj kaj riĉigis la enhavon de ilia parolo.

Pro malsameco de okupoj, la kvar komercistoj neniam konkurencis inter si. Ili faris sian negocon ĉiam bonhumore kaj harmonie. Ekde printempo ili ĉiuvespere ripozis tie, kio jam fariĝis ilia regula programero. Fripono Sanŝje sin trudis inter ilin ĉefe pro la allogaj okuloj kaj la lasciva talio de Jasmeno. Li ne estis bonvena tie. Jasmeno tute ne atentis lin kaj ofte forpelis lin kiel hundon, dum li senhonte restis senmove.

La kvar komercistoj konigis ĉiu sian sperton en komercado. Sanŝje parolis sensecaĵon interalie. Nerimarkite, batis la 9-a. Fariĝis malvarmete. La kalva Flavokululo oscedadis. Jasmeno refaldis sian seĝon por hejmeniri. Tiam Sanŝje mistere diris: "Franjo Jasmeno, ne hastu! Vidu, io alvenas de malproksime."

Jasmeno malestime ekpaŭtis, tute ne atentante lin. Ŝi neniam kredis, ke Sanŝje iam diros ion veran. Tamen la honesta Variolulo Du Ŝuang diris: "Jes ja, io alvenas." Flavokululo faris rigardon kaj jesis: "Ŝajne la alvenanto ne estas

homo." Lamulo Fang la Sesa diris: "Eble azenido."

La alvenanta figuro estis ankoraŭ malproksima, malklara kaj aŭdiĝis nur ritma paŝbruo.

La kvin homoj silente atendis. La luno prilumis ilin kaj la floran-tajn soforojn, kiuj ĵetis malklarajn, misformajn ombrojn surteren.

Pli kaj pli alproksimiĝis la paŝbruo.

"Ne azenido, sed homo," diris Fang la Sesa.

Jasmeno metis la seĝon, kruce metis siajn manojn sur la ŝultrojn kaj fiksis la rigardon sur la alproksimiĝanta figuro.

La figuro paŝis antaŭ ilin. Nur tiam ili klare vidis, ke li estas debila viro kun longa bambustango en mano kaj malgranda rulo da litaĵo sur la dorso. Tolsakoj longaj, mallarĝaj, plataj kaj grandkapaj pendis sur la ŝultroj kaj ĉe la talio kaj oni ne povis diveni, kio estas ene.

Sanŝje frotis alumeton kaj la brilo prilumis la veninton kun malgrasa, pala vizaĝo kaj paro da grandaj, sed senbrilaj okuloj.

"Mi estas blindulo. Geonkloj kaj gefratoj, ĉu vi bonvolus esti ĝablaj kaj permesi al mi tranokti ĉe vi?"

Neniu el la kvin respondis. Unue ili rigardis la junan blindulon de la kapo ĝis la piedoj kaj poste ĵetis rigardon unu al alia.

"Ho blindulo, mi ja volas esti filantropia, por ke mi povu akiri edzinon, sed bedaŭrinde mi havas ĉe mi nur unu liton kun tri kaj duona piedoj," ironie diris Sanŝje.

“Do lasu,” trankvile diris la blindulo per voĉo obtuza, kvazaŭ ĉiu vorto eltiriĝus el la brusto.

“Mastro Flava,” diris Lamulo Fang la Sesa, “vi ja havas vakan ĉambron, ke via dua filino edziniĝis antaŭ nelonge.”

“Ho, mia fraĉjo, ĉu vi forgesis, ke mia tria filino estas jam 15-jara? Apenaŭ ŝia fratino forlasis la hejmon, ŝi transloĝiĝis en la ĉambron de sia fratino . . . Ha, la domo de frato Du Ŝuang estas vasta. Li ja nove konstruis 3 tegolajn domojn.”

“Vere, mia domo estas vasta, tamen hodiaŭ mi aĉetis grandan kvanton da varoj kaj nun la domo estas plenplena de ili, tiel ke ĝi ne havas eĉ lokon por enŝovi la piedojn . . . Fraĉjo Fang, ĉu vi . . .”

“Ne koncernu min. Mia paĉjo preskaŭ dormas en hundejo! . . .” laŭte kriis Fang la Sesa.

“Se tiel, mi do ne ĝenos vin. Dankojn al vi,” la juna blindulo etendis la stangon por sondi la vojon kaj daŭrigis sian iradon kun levita kapo.

“Vi, fikomercistoj, nur hipokrituloj. Se nun petus de vi la permeson tranokti dek virinoj, same belaj kiel franjo Jasmeno, vi certe konkure forrabus ilin al via hejmo. Mi . . .” diris Sanŝje.

“Diablo vin prenu!” Sanŝje ankoraŭ ne finparolis, Jasmeno verŝis la restan teon sur lian vizaĝon. Poste ŝi ŝovis la faldeblan seĝon sub sian akselon, grandpaŝe kuratingis la blindulon, kaptis lian bambustangon kaj trankvile diris: “Do sekvu min! Atenton! Jen vojo malsupren.”

“Dankon, bofranjo!”

“Nomu min simple fratino! Ĉiuj tiel nomas min.”

“Dankon!”

“Nedankinde!”

Jasmeno diris nenion plu. Ŝi atente kondukis la blindulon mal-

supren de sur la digo kaj sur la granitan straton. La kvar homoj sur la digo aŭdis Jasmemon malfermi kaj fermi la pordon kaj vidis mildajn lumradiojn tra la helverda fenestrokurteno de ŝia ĉambro. La moviĝanta figuro de Jasmeno projekciĝis sur la diafana kurteno.

Sur la digo la tri komercistoj senparole rigardis unu alian kaj reciprokis konfuzan rigardon. Ili ŝajne volus ion diri, sed fine nenion eldiris. Ili kapjesis unu al alia, oscedadis kaj iris hejmen. Ili ĉiuj estis mezaĝuloj, sentemaj por iuj aferoj kaj inertaj por iuj aliaj. Ke Jasmeno permesis al la blindulo tranokti en ŝia hejmo, tio, kvankam neimagebla, estis kompreneble tre natura, ĉar unu blindulo povis ja tranokti en ilia hejmo, sed tamen ĝi estis multe malpli vasta ol tiu de Jasmeno. Jasmeno havas 6 ĉambrojn vastajn kaj helajn, kie, kompreneble, povas tranokti 4 aŭ 5 blinduloj. Tial, kiam la blindulo stumble malsupreniris de sur la digo sekvante Jasmemon, la tri ceteraj samtempe malŝarĝite elspiris.

Tamen fripono Sanŝje surpriziĝis de tio. La faro de Jasmeno fulme frapis lin. Li, kun larĝe malfermita buŝo kaj rigidaj okuloj, staris tie kvazaŭ ŝtipo. Li eklumiĝis nur kiam la tri komercistoj ŝanceliĝe malsupreniris de sur la digo. En la okuloj de Sanŝje tio ne estis bagatelo. Ĉe li furiozis ĵaluzo kaj malvirto. Li fiksas siajn avidajn okulojn sur la ĉarma figuro de Jasmeno kaj tiu senmova de la juna blindulo kaj elmurmuris abundon da fekvortoj.

Nun iom pri Jasmeno mem. Se sole laŭ la eksteraĵo, Jasmeno impresis kiel lasciva kaj frivola virino. Ŝia paro da strabetaj okuloj donis viglajn esprimojn al ŝia vizaĝo kaj la ĉarmaj kaj humidadaj lipetoj estigis revan imagon. Sed sperto atentigas al ni, ke oni ofte faras gravajn erarojn, se oni juĝas la internan mondon de homo

sole laŭ la eksteraĵo. Oni devas koni la animojn de si mem kaj de aliaj en la reala vivo.

Antaŭ nelonge Jasmeno elektris la tutan urbeton per sia eksedziniĝo. Tiutempe la lokanoj vivis en ekscitiĝa atmosfero. Neniu sciis, kial Jasmeno eksedziniĝis al la juna, bela kaj promesplena vicsekciestro de la gubernia registaro, kiu estas ĉiufanke pli forta ol ŝi. Komence oni suspektis, ke la adoniso-vicsekciestro amindumis iun alian, sed poste oni informiĝis, ke li amegis Jasmemon. Kiam Jasmeno petis eksedziniĝon, li ploris ĝis okulŝveliĝo. La klaĉemuloj ĉiamaniere klopodis por elfosi iajn amoraĵojn, sed iliaj klopodoj estis senfruktaj. Oni diris, ke la sola motivo de Jasmeno por la eksedziniĝo estis, ke ŝia edzo amis ŝin kiel imperiestro sian kromedzinon. Tiu senco ja estis tro profunda, ke neniu el la loĝantaro povus kompreni ĝin. Fripono Sanŝje tiutempe plene disvolvis sian imagpovon, priskribante la mastrinon de la drinkejo kiel malĉastulinon. Kun tia deziro li ĉiutage sin ŝovis en la drinkejon, sed krom insulto li rikoltis nenion.

Ŝaltinte la lampon, Jasmeno tuj estis kaptita de la eksterordinara aspekto de la juna blindulo: Lia pala kaj elstara frunto faras la senbrilajn okulojn trankvilaj kaj dignaj. Liaj aŭrikloj eksterordinare grandaj vidigas viglegan vivipovon, sentemon kaj saĝecon, tiel ke ili tremetas ĉe iu ajn apenaŭ senteblo sono.

Jasmeno ĉiam estis frandema. Ĉi-foje ŝi preparis por la blindulo abundajn manĝaĵojn: delikata kokido, frititaj salikokoj, telero da striitaj kukumoj spicitaj per sezama pastaĵo kaj delikataj vermiĉeloj. Krome Jasmeno verŝis rizvinon en glason kaj proponis ĝin al la juna blindulo.

“Bonvolu eltrinki la vinon.”

“Ho, franjo, mi neniam trinkas vinon.”

“Ne gravas. La vino estas malforta kaj utila al sang-cirkulado kaj tendenoj.”

Pripensinte momenton, la blindulo prenis la glason kaj eltrinkis ĝin per unu tiro. Poste li komencis preni manĝaĵon kun bona apetito. Neniom afektante, li montris sin tute senĝena. Jasmeno rigide fiksas sian rigardon sur li, kaj ŝian koron inundis fluso da delikata, dolĉa tenereco.

Ŝi enloĝigis la junan blindulon en la orienta ĉambro kaj sin mem en la okcidenta. Antaŭ enlitiĝo ŝi meditis dekelkajn minutojn kaj elŝaltis la lampon.

Nur tiam Sanŝje forruliĝis de sur la digo.

La sekvantan tagon estis foiro de la urbeto. En la varmetan purpuran matenruĝon miksiĝis rozaj lumoj. Sur la strato moviĝadis homaj torentoj, kaj ĉie leviĝis laŭtaj kaj mallaŭtaj krioj de kolportistoj. Lamulo Fang la Sesa, Flavokululo kaj Variolulo Du Ŝuang ĉiuj jam komencis sian negocon. Flavokululo hejtis antaŭ sia domo simplan fornon por friti farunstriojn, pro kio la strato saturiĝis de apetitivekaodoro. Sed Jasmen-drinkejo ĉiam prospera hodiaŭ estis riglita, kvietita. En ordinaraj foiroj Jasmeno estis elmontriĝema kaj preskaŭ duonstrato povis aŭdi ŝian sonoranan voĉon. Hodiaŭ la foiro malvigliĝis pro ŝia foresto. Flavokululo, Fang la Sesa kaj Du Ŝuang, okupataj de la respektiva servado, jen kaj jen direktis siajn demandajn okulojn al la drinkejo. La triopo aspektis maltrankvila. Iam nekomprenbla maltrankvilo mordis iliajn nervojn.

Sanŝje kun ŝvelaj okuloj trarigardis en la foiro. En la butiko de Flavokululo li preteratente prenis frititan farunstrion, ruze ridis kaj flustris al li en la oreilon. Flavokululo gape staris tie sen atenti pri la forno. Sanŝje, vidante lin stupori, ŝtele prenis plian strion kaj foriris. Sanŝje ripetis sian malnovan artifikon en la tetrinkejo de



Fang la Sesa kaj la butiko de Du Ŝuang. Akirinte rikoltojn kaj spiritan kaj materian, li forestis de la foiro tutan tagon.

Sensacio rapide trakuris la tutan urbeton. Antaŭ malfermo de la foiro la tuta urbeto informiĝis, ke hieraŭ nokte Jasmeno akceptis la junan blindulon kaj ili dormis sur la sama lito, ke Jasmeno brakumis kaj ŝmace kisis lin, kaj ke la kiso estis klare aŭdebla eĉ de sur la digo de Balong-rivero.

Iuj virinoj kaŝrigardis internen tra la pordfendo de la drinkejo. Sed la domoj de Jasmeno staris en du vicoj. La unua vico el tri ĉambroj estis kuirejo, vendotablo kaj gastĉambro de la drinkejo, kaj

la dua estis ŝia loĝejo. La du vicoj estis interligitaj per altaj muroj kaj formis fermitan korton. Tial per kaŝrigardo oni vidis nur la tablojn kaj benkojn, dum la interna spektaklo estis tute nevidebla. Iuj virinoj, tiklataj de scivolemo, sin turnis al la korta muro, tamen en la luma tago grimpi alies murojn ne estas dece. Ili povis nur kaŭri ĉe la muro kaj subaŭskulti. El la korto aŭdiĝis nur la sono de akvoĉerpado kaj vestolavado.

La drinkejo estis fermita tutan tagon kaj Jasmeno ne montris sin eksterdome. Falis vespera krepusko. La fifamo disvastiĝis des pli furioze. La loĝantoj de la urbeto

estis turmentataj en la animo. Oni ne tute trovis granda skandalo tion, ke viro pasigas nokton ĉe virino. Ilin tiklis ĉefe la forta scivolemo ekscitita de la enigma fakto. Kiel absurde estis, ke ĉarmulino restigis la malpuran blindulon ĉe si la tutan diurnon.

Fine subita saĝo lumigis ies menson kaj ili supreniris sur la digon de la rivero por de tie rigardi en la korton de Jasmeno. En la nebuleca krepusko nur Jasmeno facile paŝe iradis en la korto por kolekti la sunumitajn vestojn, dum tute malaperis la juna blindulo.

Sendube en la urbeto ne mankis homoj, kiuj dubis pri la onidiro. Ili ne kredis, ke okazis ia amoraĵo inter Jasmeno kaj la blindulo. Jasmeno estis virino aroganta. Ŝi malestimis homojn ordinarajn kaj estis neimageble, ke tiu banala blindulo povis veki ĉe ŝi dolĉan senton. Tamen, ili ne povis nei, ke en Jasmen-drinkejo nun fermentas io eksterordinara, tiu antaŭsento forte kaptis la kordon de la lokanoj.

Ekblovis milda vento. Nokta mallumo nerimarkite vualis ĉion en la urbeto. Jasmeno ne venis al la riverbordo por sin refreŝigi, tamen sur la digo kolektiĝis ja dekoj da homoj zorgantaj pri ŝia drinkejo, inkl. de la kvar homoj, kiuj hieraŭ estis sur la digo. Ili jam dekojn da fojoj ripetis la okazintaĵoj en la lasta tago kaj disputis ĝis flamiĝo pri ĵuj detaloj, kiaj la nombro kaj formo de la tolsakoj de la blindulo, lia kresko kaj eĉ longeco de lia bambustango. Oni fine tediĝis de tio kaj silentiĝis. La vespero estis duonserena. Flosis strangformaj nuboj. La luno jen ennubiĝis, jen montris sian vizaĝon el la nubo; kaj ĉe la digo jen heliĝis, jen malheliĝis. La homoj jen komprenis, jen konfuziĝis. De tempo al tempo aŭdiĝis flugilofrapado de birdoj en branĉoj. Densiĝis la aromo de la soforfloroj. La homoj sur la digo kvazaŭ dronus en trankvila dormo.

Jam estis noktomezo. Malvarmeto kaj dormemo ekpelis la homojn. Iuj malsupreniris de sur la digo. Jen malfermiĝis la pordo de la ĉambro de Jasmeno. Aperis en la korto figuroj alta kaj malalta — la svelta Jasmeno kaj malgranda blindulo. Ŝi metis sian faldeblan seĝon kaj proponis ĝin al la blindulo, kaj ŝi mem sidiĝis sur benketo, apogis sian mentonon sur ambaŭ manoj kaj rigardis rekte la blindulon. Oni kun miro larĝe malfermis siajn okulojn kaj atente observis la virinon kaj la viron. Regis absoluta silento sur la digo. Mutiĝis eĉ la babilema Sanŝje. La rivero flustre preteriris, foje kaj foje leviĝis kvakado de ranoj kaj tuj poste denove ekestis silento. Subite leviĝis sono malaperinta multajn jarojn en la urbeto: La blindulo ekludis fluton. Komence la sono similis al profunda kaj mallaŭta vespiro de junulino kaj poste al plorsingultado lanta kaj leĝera kiel Balong-rivero kaj la flosantaj nuboj sur la ĉielo. La sono iom post iom malleviĝis, kvazaŭ falinta en senliman maron tristan. . . Subite la sono fariĝis emocia, impona kaj dezerteca, pli kaj pli laŭtiĝis, kvazaŭ impetanta torento da akvo. La homa animo agitiĝis en la muzika ondo. Lamulo Fang la Sesa kun okuloj duonfermitaj turnis sian vizaĝon supren. Flavokululo kun mallevita kapo peze spiradis. Variolulo Du Ŝuang ŝirmis siajn okulojn per la manoj. Sanŝje rondigis siajn okulojn. . . La fluta melodio fariĝis pli kaj pli malĝoja, akra kaj eĉ ŝtonhaka. La sono vibrigis la plej fajnan kaj plej molan kordon de la koro kaj dronigis la aŭskultantojn en nebulan, songan staton.

Haltis la flutado, tamen la melodio daŭre vibris en la aero. Kun dolĉa bedaŭro oni senbrue malsupreniris de sur la digo kaj malaperis en la urbeton.

La sekvantan tagon falis subtila pluvo. Oni ne povis fari kamlaboron kaj venis al la komerca centro por tie pasigi la tempon.

Frumatene malfermiĝis la pordo de Jasmen-drinkejo, kaj Jasmeno radiis de ĝojo ĉe la vendotablo. Bonodoris dekoj da olerostitaj kokoj kaj dekoj da teleroj da frititaj ternuksoj. La drinkejo elspiris aromon. La kelkdek sidlokoj estis okupitaj de klientoj. Pluraj venis al la drinkejo kun malica motivo. Ili aĉetis vinon pro dudek fennoj (monunuoj de Ĉinio. Unu ĵuano egalas al 100 fennoj) kaj teleron da frititaj ternuksoj, malrapide maĉis, trinketis, fiksante rigardon sur Jasmeno. Jasmeno ŝajne tute ne rimarkis tion kaj kun nenia avareco dediĉis sian afablan rideton al ĉiu kliento, kiu ŝin rigardis.

Fine iu malpacientiĝis de silento. Li paŝis antaŭen kaj balbutis: "Franjo. . ."

"Kio? Ĉu vi volas kokon?"

"Ne, ne. . ."

"Ĉu vi timas, ke la edzino tanos al vi la haŭton? Estante viro, vi ne rajtas aĉeti eĉ kokon! Sentaŭgulo! Via mono ŝimos!"

"Mi aĉetu! Franjo Jasmeno, vi ne subtaksu min!"

"Brave! Jen la vireco!"

Jasmeno prenis kokon, ĝin pesis kaj tuj anoncis: "1 350 gramoj, 4 ĵuanoj kaj 5 fennoj. Lasu 5 fennojn! Vi pagu 4 ĵuanojn!"

La kliento pagis por la koko, sed anstataŭ foriri li malkaŝeme petis: "Franjo, oni diris, ke ĉe vi estas flutisto. Ĉu vi bonvolus konigi lin al ni?"

"Franjo, montru vian trezoron al ni, alie en la lito li ŝimos!" intervenis Sanŝje, kiu enpuŝiĝis nerimarkite.

Jasmeno ruĝiĝis. Kuntiriĝis siaj mallarĝaj brovoj, kio markis ŝian koleron. La apudestantoj timis, ke ŝi sin ĵetos el post la vendotablo kaj enpuŝos la tranĉilon en la korpon de Sanŝje, kaj pene kvietigis ŝin.

La viro, kiu aĉetis kokon, klariĝis: "Franjo, ni estas ravitaj de lia

flutado. Ĉu li bonvolus ludi por ni? Se tiel, mi regalos lin per kokajo.”

Jasmeno malrapide viŝis siajn oleplenajn manojn kaj kapjesis. Ŝi iris al la malantaŭa domo. Post longe, kondukante la blindulon je mano, ŝi revenis antaŭ la klientojn.

Kun miro Sanŝje trovis, ke la blindulo tute ŝanĝiĝis je la aspekto. Liaj vestoj estis puraj, bonodoraj kaj bone gladitaj, la hararo bone kombita, verŝajne iom ŝmirita per pomado.

La lokanoj neniam vidis tiel elegantan blindulon.

La juna blindulo gracie riverencis antaŭ la publiko kaj diris per oreplaĉa baritono: “Mi ne estas denaska blindulo. Mi eklernis popolan muzikon post blindiĝo antaŭ nelonge. Mi apenaŭ ludas kelkajn komponaĵojn. Ne decas rifuzi vian afablecon kaj mi volantas prezenti al vi. Sed flutado estas ĉarma nur en luna nokto. En tago kompreneble oni povas fluti, tamen la efiko multe malpli bona. Feliĉe, ke mi povas ludi ankaŭ *erhu*-on (dukorda ĉina muzikilo). Nun mi per tio esprimu mian koran dankon al via afableco.”

La parolo estis eleganta, kio montris, ke li estas neordinara. Iu proponis al li tabureton. Li sidiĝis, reordigis la kordojn. Meditante momenton, en retenita spirado, li tre lerte ekmanipulis la arĉon. La muziko estis leĝera, klara, delikata kaj sentoplena, same kiel milda vento de flora marto kisanta la homan vizaĝon. Gejunuloj povis senti teneran kareson en la muziko kaj maljunuloj rememoris la nebulan pasintecon, aŭskultante la belan melodion. Vere dolĉa sento inundis la animon de la aŭskultantoj. Oni forgesis la ĉielon, la teron, ĉian ĉagrenon kaj aflikton. Jasmeno sidis ĉe la vendotablo, apogante per la manoj la vangojn ĉarmajn kiel persikfloroj, kaj dronis en meditado. Antaŭ la okuloj de la blindulo aperis fantazia



mondo: velkintaj arboj, korvoj, antikvaj temploj kun intermita sonorado, sovaĝaj anseroj ripozantaj sur plaĝo, lunarko . . . La muziko fariĝis trista. En la imago de la aŭskultantoj subite aperis aŭtuna kampo kaj susurantaj soforbranĉoj en vento . . . Ondaj melodioj de la muziko tute kaptis ilian koron, kiu batis konforme al la ritmo de la muziko.

Finiĝis la muziko. Senmove sidis la blindulo kun pala frunto, duonfermitaj okuloj malviglaj. Nervoze tremetis liaj oreloj ekstreme grandaj. Malsekiĝis la okuloj de la aŭskultantoj. Kun larmoj en la okuloj kaj pala vizaĝo Jasmeno rigide rigardis la subtilan pluvon.

Kiam la blindulo ekludis, la klientoj unu post alia direktiĝis al la drinkejo el la tetrinkejo, restoracio kaj butikoj, same kiel ferpecoj altirataj de magneto. Ne plu vi-

deblis homoj sur la mallarĝa strato. La pluveroj falis sur la ŝtonan pavimon, ŝprucigante akvajn perlojn. Jen kaj jen sin pafis kelkaj hirundoj kun malordaj plumoj. Leviĝis vento kaj soforpetaloj flirte falis sur la straton. Mute sidis ĉe la pordo de sia domo Fang la Sesa, Flavokululo kaj Du Ŝuang kun rigidaj okuloj al la homplena drinkejo. Neniu sciis, kio okupas ilian penson.

(Daŭrigota)

Esperantigita de LIŬ CAJŜENG

* *Mo Jan*, origina nomo *Gŭan Moje*, 30-jara, el *Sandong*-provinco, servis en la armeo kiel soldato, subplotona estro kaj instruisto. En 1981 li komencis sian verkistan vivon. Li publikigis pli ol 20 novelojn. Nun li studas en la literatura fakultato de la *Belarta Instituto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo*.

ORA TEMPO POR PROZO (II)

de MEJ ĜI

La prozaĵoj de diversaj skoloj en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj tiuj de Militantaj Regnoj multe superis la historiajn, ĉu en kvanto, ĉu en enhavo kaj arta nivelo. Tiuj prozaĵoj naskiĝis en la procedo de "Disputado de cent skoloj" kun reprezentantaj verkoj kiaj "Vortoj de Kongzi (Konfuceo)", "Laŭzi", "Mozi", "Mengzi (Menceo)", "Ĝŭangzi", "Ŝjunzi", "Hanfejzi" k.a.

La prosperiĝo de prozaĵoj de diversaj skoloj en Ĉinio koincidis kun la ora florado de la antikva helena filozofio, en kiu aperis unu post alia grandaj filozofoj Sokrato, Platono kaj Aristotelo. Dume la ĉinaj filozofoj kaj iliaj verkoj brilis tiel kiel la helenaj.

La unua menciinda el la prozaĵoj de diversaj skoloj estas "Vortoj de Kongzi". Ĝi estas libro el notoj pri la ideologio kaj agado de Kongzi. Kongzi estis Lu-regnanto en la lastaj jaroj de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno. Li estis eminenta erudiciulo kaj fama politikisto kaj edukisto en la ĉina historio. Lia ideologio entenas du flankojn, nome lia sinkonformigo al la socia evoluo kaj civiliziteco kaj lia penado por defendi la tradiciajn sociordon kaj etikon.

Kongzi estis malsukcesa en sia ambicio, kaj por propagandi siajn politikojn, li vojaĝis al multaj lokoj dum sia tuta vivo, sed estis malmultaj interesiĝintoj. Sian maljunecon li pasigis hejme per instruado.

Laŭdire li havis 3 000 disĉiplojn. Post sia morto Kongzi pli kaj pli famiĝis, ke li estis adorata de la postaj regantoj kiel ideologia instruisto kaj sanktulo kaj ke la de li fondita konfuceanismo estis prenita kiel la gvida penso por la ĉinoj dum longa feŭdisma socio.

"Vortoj de Kongzi" estis kompilita de disĉiploj de Kongzi. La libro entenas parolojn de Kongzi kaj agadojn de li kaj liaj disĉiploj. La paragrafoj estas mallongaj kun ideogramoj dekelkaj ĝis kelkcentaj. Tamen la enhavoj estas tre riĉaj inkluzivantaj politikajn opiniojn, edukajn principojn, etikojn kaj virtan memkulturadon. La libro estas plena de saĝa konsiderado kaj sperta resumo de Kongzi pri la reala vivo de homoj.

La libro karakteriziĝas per sia abundeco de maksimumoj. Ekzemple "Ĝusta takso pri sia scio estas vera scio" prezentis lian ĝustan sintenon pri scio. "Lernado sen pensado kondukas al konfuzo; pensado sen lernado al danĝero" montris la dialektikan interrilaton inter lernado kaj pensado. "Oni konas la frostoeltenemon de pinoj post alveno de vintro" estas filozofia resumo pri liaj riĉaj spertoj de la vivado. La libro estas abunda je tiaj maksimumoj, tre popularaj por la ĉina popolo.

"Vortoj de Kongzi" karakteriziĝas ne nur per profunda kaj preciza penso, sed ankaŭ per viveca priskribado de homoj. Kelkvorta

skizo en la verko jam vivigis la priskribitajn figurojn. Multaj ĉapitroj en "Vortoj de Kongzi" estas priskribado pri Kongzi kaj liaj disĉiploj. Unu el la ĉapitroj estas noto pri la interparolo de Kongzi kaj liaj disĉiploj pri ilia ambicio. Antaŭ la komenco de interparolo Kongzi diris, ke ili ne estu timemaj en interparolo pro tio, ke li estas multe pli aĝa ol ili. La tiama Kongzi estis modesta, indulgema kaj kompatema instruisto. Tamen alfoje li estis tre rigora. Foje unu el liaj disĉiploj Zajju fordormis la tagmezon, kaj Kongzi riproĉis lin, ke li estas "putra ligno nesculptebla kaj kadtkamuro nekalkebla".

En "Vortoj de Kongzi" estis anekdoto pri du ermitoj. Foje Kongzi kaj lia disĉiplo Zilu demandis al ili pri vojo. Sed anstataŭ doni helpon, la du ermitoj mokis ilin, ke ili ne bezonas demandi pri vojo, ĉar ili bone konas vojojn, vojaĝante kaj persvadante ĉie. Ili diris al Zilu: "Preferinde por vi estas, ke vi ermitiĝu anstataŭ sekvi Kongzi." Ĉi tie la verko vidigis senzorgajn kaj orgojlajn ermitojn per la vortoj "ili kaj faras kampan laboron kaj parolas kun la demandantoj".

"Laŭzi" kaj "Ĝŭangzi" estas du gravegaj verkoj de taoisma skolo. Taoismo estas malsama ol konfuceanismo. Taoistoj ne tre atentis la konkretajn sociajn problemojn sed akcentis esploradon pri la kosma ontologio. En tiu flanko


taoismo estis iom simila al la okcidenta filozofio.

Laŭzi estis fondinto de taoismo. Lia verko “Laŭzi” alinomita kiel “La Etikoj” el 5 000 ideogramoj estas tre lakona tamen riĉa je filozofia rezonado. Pri la verko ni faros pli detalan eksplikon poste en la artikolo pri la ĉina antikva filozofio.


Ĝuangzi, post Laŭzi, estis same fama kiel Laŭzi, kaj Ĝuangzi portis pli elstaran karakterizaĵon. En la verko “Ĝuangzi” estas artikoloj ne nur de Ĝuangzi, sed ankaŭ de posteuloj. Ĝuangzi pledis por absoluta sinkonformigo al la naturo kaj oponis kontraŭ homa intenco ago. Li ne ŝatis rangecon kaj riĉecon. Li emfazis sin konformigi al si mem kaj agi laŭ sia karaktero, kaj preferis sin vivteni mizere per farado de pajlaj sandaloj, ol esti altrangulo.

La artikoloj de Ĝuangzi estas tre riĉaj je imago lertaj en eksplikado de profunda filozofio pere de buntaj fabloj. Tio estis tre okulfrapa trajto de liaj artikoloj.

Unu el la ofte cititaj artikoloj en “Ĝuangzi” estas “Senĝena Ekskurso”. La artikolo konsistas ĉefe el roloj en serio da historiaj mitoj kaj priskribado pri la objektoj de la homa mondo. La artikolo priskribas gigantan birdon peng, polvon, Ljezi povantan flugi en vento kaj senmortan Peng Zu (legenda persono, laŭdire vivis 800 jarojn). Peng estis giganta birdo, kaj per flugilfrapo ĝi povis levi ondon 3 000 li-an (li estas ĉina mezurunuo de longo, egala al duonkilometro) kaj rapide flugi en altecon de 90 000 li-oj. Ĝi dorse portis la ĉielon kaj flugis libere, kun kiu neniu birdo povis sin kompari. Ljezi estis figuro malsama ol karnuloj, kiu povis leĝere flugi senhalte duonmonaton sur la ĉielo. Pere de tiuj metaforoj Ĝuangzi esprimis siajn filozofiajn vidpunktojn pri la prefero de senĝena plezura ekskurso ekster la homa mondo kaj pri strebo al libereco. En la artikolo li diris, ke kvankam




“Vortoj de Kongzi” manskribita en Ming-dinastio (1368-1644)



“Laŭzi”, “Mengzi” kaj “Ĝuangzi” ksilografitaj en Ming-dinastio

peng kaj Ljezi havas supernaturan forton, ke ili povas libere agi en la mondo, tamen ilia libereco ne estas absoluta libereco, ĉar ili ĉiuj devas atendi “ion”, nome eksteran kondiĉon — venton. Do kio estas la vera libereco? Laŭ Ĝuangzi tio

estas integra intermiksiĝo de la universo kaj la memo, sen memo, sen strebo al famo kaj rango; nur tiele oni povas atingi la medion por “senĝena ekskurso”. La filozofia penso de Ĝuangzi estas tiel rezonita pere de serio da metaforoj.



“Šjunzi”, “Mozi” kaj “Hanfejzi” ksilografitaj en Ming-dinastio

Plejparto de la prozaĵoj de Ĝuangzi rompis la formon de simpla noto de parolo kaj fariĝis fakaj disertacioj kun fokusita argumento. Kaj liaj prozaĵoj per forta romantika odoro profunde influis la postan literaturon.

Alia influhava reprezentanto de la skoloj estis Mengzi (Menceo). Li estis samtempulo de Ĝuangzi kaj la plej aŭtoritata reprezentanto de konfuceanisma skolo en la mezo de la Periodo de Militantaj Regnoj. Mengzi famiĝis per sia retoriko, kio klare montriĝas en lia verko “Mengzi”. Ĝi estas multe malsama ol la “Vortoj de Kongzi”, kvankam ĝi estas prozoforma notaĵo de paroloj. La polemikoj en dialogoj aplikis klarajn kaj sentoplenajn vortojn, kaj ofte pelis siajn rivalojn en senelirejon ĝis kapitulaco aŭ kompleta konsterniĝo.

En “Mengzi” estas anekdoto. Foje regnestro Šĵuanŭang de Ĉi-regno ordonis liberigi buĉotan bovon ŝajnigante sin simpatia. Tiam Mengzi kaptis la ŝancon por “ataki” la regnestron je lia regado. Li diris: “Via favoro atingas eĉ brutojn, sed la regnanoj akiris

Alia tre ŝatata fablo el “Ĝuangzi” estas “Bovdistranĉo”. Ĝi rakontis pri kuiristo lerta en distranĉo de bovoj. Ŝajne la rakonto penis pruvi, ke oni lertiĝos nur post ripetada praktiko kaj

kompleta kono de objektiva leĝo. Sed fakte pere de la metaforo Ĝuangzi intencis montri sian filozofian personon pri la vivado, nome en la vivo oni devas lerte eviti kontraŭdirojn.

Portreto de Kongzi



Portreto de Laŭzi



nenian favoron de vi. Kial?" Ne donante al la regnestro tempon por respondi, li daŭrigis sian kritikon: "Vi mobilizis la tutan armeon al risko je la vivo por ataki najbarajn regnojn. Ĉu nur tio estas por vi plezuro?" La sufokaj demandoj devigis la regnestron diri, ke li ne povis preni tion kiel plezuron. La rakonto plene montris la akrecon de la kritiko de Mengzi.

Disvolviĝante ĝis la periodo de "Ŝjunzi" kaj "Hanfejzi", la prozaĵoj de diversaj skoloj atingis la lastan etapon de tiu periodo, proklamante la finon de ora tempo por prozo. "Ŝjunzi" kaj "Hanfejzi" ne atingis la nivelon de la elokventeco de la filozofiaj verkoj de Aristotelo, tamen ilia rezonado estis solida kaj logika, kaj la prozaĵoj estis pli rafinitaj kaj pli longaj. Ĝuste pro tio iliaj politikaj polemikaj artikoloj pli malproksimiĝis disde literaturo. Tial, laŭ la vidpunkto de literatura disvolviĝo, ilia influo estis multe malpli

granda ol "Vortoj de Kongzi", "Gŭangzi" kaj aliaj verkoj.

Bovdistranĉo

Kuiristo estis distranĉanta bovon por regnestro Huj'ŭang de Ljang-regno. Kie lia mano tuŝis, la ŝultro apogiĝis, la piedo surmetiĝis, kaj la genuo premis, ĉie estiĝis knarado. Kaj la sonoj de tranĉado estis ritmaj kiel dancmuziko.

Huj'ŭang diris: "Ha, bone, kiel vi fariĝis tiel lerta?"

La kuiristo demetis la tranĉilon kaj respondis: "Mi lertiĝis pro tio, ke mi posedas la leĝon de la afero. Kiam mi komencis distranĉadi bovojn, mi vidis nur la tutan bovon. Post tri jaroj mi jam vidis ne la tutan bovon. Kaj nun mi rigardas distraĉotan bovon ne per okuloj, sed la spirito. Mi enigis la tranĉilon, laŭ la strukturo de la bovo, en la interspaĉojn de la ostoj. Bona kuiristo ŝanĝas novan tranĉilon ĉiun jaron, ĉar li tranĉas; ordinara

kuiristo ŝanĝas tranĉilon ĉiun monaton, ĉar li simple hakas. Mi distranĉis milojn da bovoj en 19 jaroj per tiu sama tranĉilo, kaj ĝi restas ankoraŭ tiel akra kiel nove akriĝita. Inter la ostoj estas sufiĉaj spacoj, dum mia tranĉilo apenaŭ havas dikecon. Do mia tranĉilo povas sufiĉe libere vagi inter la ostoj. Jen kial mia tranĉilo povas esti ĉiam akra en la 19 jaroj kiel nove akriĝita. Tamen ĉiufoje kiam mia tranĉilo atingis la lokon kie interligiĝas la ostoj kaj tendenoj, mi ĉiam tenas min atenta, mi fiksas mian tutan atenton sur la tranĉota loko kaj movas la tranĉilon malrapide, dume la distranĉita bovaĵo rapide amasiĝas sur la tero. Mi staras apude kun la tranĉilo kaj sentas grandan kontentiĝon, rigardante ĉirkaŭen. Mi purigis la tranĉilon kaj eningigis ĝin."

Huj'ŭang diris: "Bonege! La parolo de la kuiristo inspiris al mi bonan higienon."

Lucky-filmoj

tre utilaj por vi!

La Unua Filma Fabriko sub la Kemi-industria Ministerio de Ĉinio estas la plej granda fabriko, kiu produktas plurspecajn filmojn kaj magnetajn materialojn. Ĝiaj produktaĵoj estas uzataj en kinematografio, televizio, kulturo, eduko, naciddefenda industrio, astronautika telegvido, medicino, presado, fotado k.a. Estas pli ol 70 specoj de produktaĵoj, el kiuj tri oni premiis per ŝtata arĝenta medalo, 12 oni titolis elstaraj produktaĵoj de Hebej-provinco aŭ la nomita ministerio kaj 12 oni vendas en 12 landoj kaj regionoj de Azio, Eŭropo kaj Afriko.



化工部第一胶片厂

中国保定

电话: 37901 37902
电报: 5231

Bonkvalitaj kaj bonvenaj estas la koloraj kaj pankromataj Lucky-filmoj de ĉiaj normoj.

Unua Filma Fabriko sub la
Kemi-industria Ministerio de Ĉinio
Baŭding, Ĉinio

Tel.: 37901 37902

Telekso: 5231

**ĈINA FAMA ESPERANTA
TRADUKISTO SAINT JULES
ZEE FORPASIS**



S-ro Saint Jules Zee

La 11-an de oktobro 1986 forpasis en Ŝanhajo s-ano Saint Jules Zee, membro de la Ŝanhaja Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj tiu de la Grupo por Plani Ordigadon kaj Eldonadon de Antikvaj Libroj sub la Ŝtata Konsilantaro, profesoro de la Orient-Ĉinia Instruista Universitato de Ŝanhajo kaj iama konsilanto de la fama ĉina "Plena Han-lingva Vortaro". Frue en la 30-aj jaroj li okupiĝis pri verkado kaj tradukado de Esperantaj literaturaĵoj. Li estis aktiva kunlaboranto de la redakcioj de "Literatura Mondo" kaj "El Popola Ĉinio". "Fajrolumo en la Fronto", "Sovaĝa Herbaro", "La Plej Forta Voĉo de la Paco" kaj "El Ĉina Poezio" estas liaj Esperantaj tradukoj. Liaj tradukoj troviĝas ankaŭ en "Ĉina Antologio" (1949-1959), "Noveloj de Lusin", "Esperanta Antologio" (1887-1981). Lia forpaso estas granda perdo por la Esp-movado de Ĉinio.

**ESPERANTA GLUMARKARO
GAJNIS LA UNUAN PREMION**

Lastatempe la glumarkaro kun la titolo "Esperanto, Lingvo de Pa-

co kaj Amikeco" gajnis la unuan premion en la Dua Ekspozicio de Poŝtmarkoj okazinta en Mjanjang, Siĉŭan-provinco. Estis eksponataj 60 glumarkoj kolektitaj de juna esperantisto Ĉen Ŝan. Dank' al la ekspozicio multaj junuloj ekinteresiĝis pri Esperanto. En la Unua Geknaba Ekspozicio de Poŝtmarkoj kun Difinita Temo okazinta en Jantaj, Ŝandong-provinco, ankaŭ Esperantaj filatelaĵoj kolektitaj de juna esperantisto Ju Ĉjangŭo estis laŭditaj.

**ESP-KURSOJ EN DIVERSNIVELAJ
LERNEJOJ DE ĈINIO**

En 1986 ekfunkciis Esp-kursoj en diversnivelaĵoj de Ĉinio. Ili estas la Ŝingĝjang-a Financa kaj Ekonomika Instituto, Ŝenjang-a Metalurgia Kolegio, 19-a Mezlernejo de Tonghŭa, Ĝjilin-provinco, Unua Profesia Supera-mezlernejo de Liling, Hunan-provinco, kaj Liŭŭeĵlu-a Elementa Lernejo de Dandong, Ljaŭning-provinco, kio akumuliĝos spertojn pri Esperanta instruado.

**LA 3-A SANMARINA
UNIVERSITATA SESIO**

La Akademio Internacia de la Sciencoj SAN MARINO okazigis laŭplane 1986-08-30/09-08 la 3-an sanmarinan universitatan sesion. Ĝin partoprenis ĉ. 70 sciencistoj, subtenantoj kaj studentoj el 20 landoj de ĉiuj kontinentoj.

Okazis jenaj oficialaj kunvenoj:

- (1) Solena inaŭguro; (2) La 2-a Asembleo 1985 pŕR kaj la 1-a Asembleo 1986 pŕR de la Subtena Sektoro (S.S.) de AIS; (3) La 3-a kaj la 4-a kunsidoj de la senato; (4) 2-a Ĝenerala Asembleo 1986 de AIS; (5) Konstituiĝa kunsido de la konsilio; (6) Kunsidoj de la sekcioj 1,2,3, kaj 5 (7) Ferma solenaĵo; (8) Komuna kunsido de la ĝisnuna kaj la novelektita estraro de S.S.

La ministrino Fausta Morganti por klerigado, kulturo kaj justico de RSM akceptis la honoran senatanecon dum la solena inaŭguro. Ĉiuj partoprenantoj estis oficiale

La nova estraro de la Brazila Esperanto-Ligo (de maldekstre): La unua sekretario Neima Adorno, unua kasisto Jose Carlos Dorini Ramos, prezidantino Neia Lucia Souza



invititaj partopreni kiel honoraj gastoj la plurtagan, riĉan kulturalan programon, kiun la Respubliko de San Marino okazigis por festi la datrevenon de sia fondiĝo (301-09-03).

SUS4 okazos inter la 28-a de marto kaj la 6-a de aprilo 1987, kaj SUS5 inter la 29-a de aŭgusto kaj la 7-a de septembro 1987. Serĉataj estas ĉiuj universitataj profesoroj kaj docentoj, kiuj jam kontentige regas la Internacian Lingvon por tiuj sesioj.

ESPERANTO-KURSO EN GIMNAZIO

Komence de septembro 1986 okazis kvartaga Esperanto-kurso sub la gvido de Franz-Georg ROESSLER en Nikolaŭs-von-Weis-Gimnazio en Spiro (Speyer), FR Germanio. 24 gejunuloj kun la aĝo de 13 ĝis 17 jaroj fervore lernis en ĝi. Ili ne nur interesiĝis pri la strukturo de Esperanto, sed ankaŭ pri ĝia taŭgeco kiel interhoma komunikilo. Lernejestrino Helga Joerger sugestis aboni EPC por la lerneja biblioteko.

La grupo prezentis la rezulton de la instruado al ĉ. 300 aliaj lernantoj kaj instruistoj.

Esperanto-kursanoj en Nikolaŭs-von-Weis-Gimnazio



La fronta kaj dorsa flankoj de arĝenta medaliono por la 100-jara jubileo de Esperanto

La kursanoj fariĝis "simpatiantaj membroj" de la nova Esperanto-grupo en Ruando, kiu estas "ĝemela ŝtato" de la koncerna germana kanton.

MEDALIONOJ DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

Laŭ JEL-programo pri la 100-jara Jubileo de Esperanto la Serbia Esperanto-Ligo okazigis solenan inaŭguron de jubileaj oraj kaj

arĝentaj medalionoj. Unu el ili (ora kaj arĝenta) koncernas 100 jarojn de Esperanto en la mondo, kaj la alia rilatas 80 jarojn de la Esperanto-movado en SFR Jugoslavio.

Dum la 71-a UK en Ĉinio D-ro Mika J. Andrić, reprezentanto de la Serbia Esperanto-Ligo sub la Jugoslavia Esperanto-Ligo donacis al UEA, Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de EPC po unu specimenon de la medaliono.

Ili estas mendeblaj ĉe Serbia Esperanto-Ligo Beograd pere de la adreso: Radiša Ž. Kovačević, YU-36103-KRALJEVO, Kosovska 1 Jugoslavio.

ESPERANTO-AGADO EN VENEZUELO

Okaze de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Ĉinio la okcident-venezuelaj esperantistoj okazigis sian trian renkontiĝon, dum kiu ili faris ekspozicion de El Popola Ĉinio, kaj la novaj membroj de la Zulia Esperanto-Asocio finlernis elementan Esperanto-kurson kaj ricevis diplomon.

Eventualaj damaĝoj de novaj teknikoj

Sciencoj kaj teknikoj alportas lumon kaj feliĉon, tamen eble kaŭzas samtempe damaĝojn al la homaro. Frue en la unua teknika revolucio estis popularaj vapormaŝinoj kaj rapide altiĝis la produktivo. Sed, pro granda konsumo de karbo, senĉesa ellaso de eluzitaj forĵetaĵoj kaj gaso, poluciigis la aero, akvofonto kaj tero. En Londono okazis terura "fumbubula afero", kio estas ankoraŭ freŝe memorata. Komence oni ne antaŭvidis, ke sciencoj kaj teknikoj, krom alporti industriigon, kaŭzas mediopolucion, des pli ne pensis, ke la industriaj eluzitaj forĵetaĵoj kaj gaso damaĝas la sanon de homoj.


Kun la disvolviĝo de sciencoj kaj teknikoj, precipe kiam la


nova teknika revolucio kun la mikroelektronika tekniko kiel sia kerno iras tra la tuta mondo, ĝi kreas por la homaro gigantan ekonomian kaj socian profiton, kaj samtempe minacas la sanon de homoj, pri kio oni pli kaj pli atentis. La japana registaro jam sankciis la Blankan Libron pri Medio ellaboritan en 1985. Pri la media sekureco la libro analizas la nunan staton kaj venontajn atentindajn problemojn pri la integrita cirkvito, kies altaj teknikaj produktovaloroj draste plimultiĝis en la lastaj jaroj, kaj pri la bioingeneria arto, kiu havas grandan influon sur sciencaj branĉoj pri medicino, agrikulturo, medio, kemio ktp. La libro montras, ke la industrio de inte-

grita cirkvito, kies produktov valoro atingis 1 973 miliardojn da japanaj jenoj en 1984, uzis diversajn organikajn kloridojn, arsenon, fosforon kaj aliajn venenajn kemiaĵojn. Kvankam estis ne tre granda la kvanto de la kemiaĵoj, tamen ili povas difuziĝi en la medion, se oni ne bone ilin regas. En traktado de eluzita akvo kaj sendamaĝiga traktado de eluzitaj venenaj forĵetaĵoj, la bioingeneria arto povas fari kontribuon por medioprotektado, sed dum esplorado de la tekniko pri gena reorganizo eble elkreskas vivaĵoj malutilaj al la sano de homoj kaj la medio.

Fakte, jam aperis fenomenoj montritaj en la Blanka Libro pri Medio. Ekzemple, ĵurnaloj kaj gazetoj laŭdis, ke la Silicia Valo de Kalifornio en Usono estas la "pura" centro de industrio de altaj teknikoj. Ĝi konsistas el industrioj de duonkonduktantoj, elektroniko, komputiloj, bioingeneria arto ktp. Tamen, laŭ enketado farita de la Higiena Departemento de Kalifornio en 1985, la plejparto de la loĝantoj opiniis, ke la industrio de altaj teknikoj grave minacas ilian vivmedion. Post la enketado farita inter la loĝantoj, kiuj prenis akvon el la subtera akvokonserva tavolo poluciita de la kompanioj en la Silicia Valo, sciencisto trovis, ke la procentaĵo de la nature kriplaj suĉinfanoj estas 3-oble pli granda ol tiu en aliaj lokoj. De

Ekipaĵo por traktado de malpura akvo de la Pekina Dizela Fabriko





La aŭtomata regadejo de la traktejo de malpura akvo en la Pekina Dua Lan-teksvila Fabriko

1981 en tiu loko okazis ellaso de venena kemia gaso pli ol cent fojojn. Tia ellaso nun ankoraŭ ne estas ĉesigita kaj profunde maltrankviligas la loĝantojn.

Kaj krome, la procentaĵo de laborantoj de la duonkonduktantaj entreprenoj de la valo, suferantaj profesian malsanon, estas 3-oble pli granda ol tiu en aliaj industriaj entreprenoj de Kalifornio. Respondeculo de la Venenopreventa Federacio de la Silicia Valo montris, ke la industrio de altaj teknikoj ofte uzas grandkvantajn venenajn solvaĵojn, acidojn kaj ekstreme venenajn gasojn, kiuj estas subtere konservataj kaj ofte ellasiĝas. Novaj teknologioj uzotaj en la Silicia Valo havas pli grandan eblon kaŭzi kemian polucion.

La radikala tasko de la bioinĝeniera arto estas reformi vivaĵojn kaj krei novajn speciojn. Tiuj specioj formiĝas dank' al la ŝanĝo de genoj, hereda materio en organismo. La eksperimentaj materialoj ofte estas bakterioj kaj virusoj. Ne devas esti neglekta, ke ili eble kaŭzos polucion, ĉar tiuj vivaĵoj ne nur estas malfacile rekapteblaj, sed ankaŭ

grandnombre fekundiĝas kaj kreskas en la medio.

Plej timinde estas, ke la bioinĝeniera arto estas uzata por fabriki vivaĵajn kaj heredajn armilojn. Tio estas, ke ŝanĝante heredajn karakterojn de iuj vivaj organismoj, oni kreskigas "monstrojn" por milito, virusojn de kancero aŭ serioze malsanigajn organismojn, kiaj bakterioj, virusoj k.a. kio alportas al homoj katastrofan minacon. Komprenible, tio estas grava krimo.

Hodiaŭ, fakuloj pri bioinĝeniera arto atentigis, ke la bioinĝeniera arto estas danĝero nekonnata. Tial, oni devas ellabori bioinĝenier-artan administran planon kaj malpermesi bioinĝenier-artan eksperimentadon antaŭ determina analizo pri ĝia sekvo, por ne kaŭzi damaĝon al homoj.

Sekve, disvolvante altajn teknikojn, oni devas antaŭkalkuli iliajn utilojn kaj eventualajn problemojn. Antaŭ ol fari strategiajn decidojn pri la altaj teknikoj, oni devas bone konsideri pri iliaj utiloj kaj malutiloj, preni sekurajn rimedojn kaj trejni administrantojn. Ĉio ĉi tio estas tre necesa.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkuponno por 5 vortoj aŭ mallongigoj. **Por fotoj:** 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Okaze de 750-jara jubileo de Berlino kaj la 100-jara jubileo de Esperanto 1987 la E-junularo-grupo aranĝos letervesperon kun ekspozicio en aprilo 1987. Ni petas sendi bk, salut-leterojn aŭ E-aĵojn. Ni garantias resp. al ĉiuj! Skribu al Ingo Fischer, Ho-Chi-Minh-Str. 19/B,2. Etage /0204, Berlin, DDR — 1156.

* Zhang Xinhua, gimnaziinstruisto 23-j, pri muziko k. interŝ. pk. Adr.: Jiugang Jiaoyuchu, Jiayuguan, Gansu, Ĉinio.

* Ĉinlingva instruisto 23-j dez. kor. tutmonde esperante aŭ ĉinlingve pri ĉ.t. kaj interŝ. pm. pk. k. E-librojn pri literaturo k. historio. Wen Yuliang, Neijiang Dianchang, Neijiang, Sichuan, Ĉinio.

* Guan Yubin, 21-j fraŭlo, Xingshu Guangbo Dianshi Ju, Venhualu, Qujing, Yunnan, Ĉinio, dez. kor. kun geamikoj japanaj, francaj, germanaj kaj norvegaj pri arto, fotografado, Han-lingvo ktp.

* Membroj de Zulia E-Asocio (Okcidenta Venezuelo) dez. kor. pri ĉ.t. kun esperantistoj tutmondaj. Ankaŭ ni petas, ke kelkaj samideanoj kunlaboru kun nia malgranda biblioteko, sendante al ĝi E-librojn. Adr.: Zulia Esperanto-Asocio (David G. Valecillos V.), Calle 79 No. 3C-72, Maracaibo-4002, Venezuelo.

Jangzi—la plej granda rivero de Ĉinio

Teksto de ŜI ĜJA

Fotoj de ŜEN JANTAJ


La ĉeftero de Ĉinio estas alta okcidente kaj malalta oriente. Jangzi-rivero fontas sudokcidente de la neĝkovrita monto Geladandong sur la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo de sudokcidenta Ĉinio kaj torentas orienten laŭ Tŭotŭo-rivero tra Ĉinghaj, Tibeto, Junnan, Siĉŭan kaj aliaj kvin provincoj. Fine ĝi fluas en la Orientan Ĉinan Maron apud Ŝanhajo. Ĝi longas pli ol 6 300 km. kaj estas la unua granda rivero de Ĉinio kaj la tria en la mondo.


Jangzi-rivero estas ne nur la plej granda rivero en Ĉinio, sed ankaŭ la historia simbolo de la

ĉina nacio. La historio de la homaro montras, ke riveroj ne nur povas malutili al homoj, sed ankaŭ servas kiel luliloj de la homa civilizacio. En Ĉinio fluas du mondfamaj riveroj: la Flava Rivero kaj Jangzi-rivero. La unua imponas simple kaj honeste, kaj la lasta romantike kaj grandioze. La du riveroj, kiuj paralele kuŝas sude kaj norde sur la ĉina ĉeftero kaj senĉese kuras orienten, estas luliloj de la ĉina civilizacio kaj kreis brilajn antikvajn kulturon kaj civilizacion de la Oriento. Ĝuste pro tio, Jangzi-rivero ludas gravan rolon en la

evoluo de la ĉina civilizacio. Kun paso de tempo la centro de la disvolviĝo de kulturo, politiko kaj ekonomio de Ĉinio iom post iom moviĝis al la baseno de Jangzi-rivero, tiel ke la rivero farigis grandioza scenejo de la ĉina historio. Dum miloj da jaroj tie okazis intensaj bataloj, en kiuj sennombraj herooj sin prezentis. Granda poeto de Song-dinastio Su Ŝi (1036-1101 p. K.) kun emocio faris la versaĵon: "Orienten kuras la granda rivero, forportas sennombrajn heroojn historie. . ." Ankaŭ nun la versaĵo emocias legantojn.

Ĉe Jangzi-rivero





Urbo ĉe Jangzi-rivero

Jangzi-rivero estas atesto de la ĉina nacia historio. Ĝi estas ankaŭ ĉarma vidindejo, kiu estas fama pro siaj ĉarma fonto kaj grandioza kaj impona supra baseno de la rivero. Tie prezentiĝas malofte vidataj mondfamaj glacipintoj kaj neĝmontoj, danĝeraj rifoĵoj kaj gorĝoj. Inter ili Hutjaŝja-gorĝo kun niveldiferenco de 170 m. kaj ravinoj profundaj je pli ol 3 000 m. estas konata kiel la plej danĝera gorĝo en la mondo. Ĉe la meza parto de Jangzi-rivero prezentiĝas belaj pejzaĝoj montaj kaj akvaj. Tie troviĝas la famaj Tri Gorĝoj de Jangzi-rivero. Elirinte el la Tri Gorĝoj en Hubej-provincon, Jangzi-rivero trafluas la urbon Uhan kaj atingas sian malsupran basenon. La vasta, nebule kovrita surfaco de la rivero, per la lagoj kaj interkruĉantaj fluejoj ĉe ĝi prezentas pitoreskan pejzaĝon de belega sudĉinia akvoriĉa lando.

Jangzi-rivero kun pli ol 700 ĉefaj branĉoj, tra montoj, ravinoj kaj ebenaĵoj, alportas ĉiujare pli ol 900 miliardojn da kubmetroj da akvo en la Orientan Ĉinan Maron. Ĝia baseno kovras areon de 1 800 000 kvadrataj kilometroj, t.e. kvinonon de la tuta teritorio de Ĉinio. La orienten torentanta fluo malsekigas la fekundan grundon kaj dank' al tio, kvarono de la totala agraro de Ĉinio fariĝis "grenejo" de Ĉinio. Tie abundas rizo, kotono, kolzo, sezamo, silko, teo, tabako k. a. Precipe la meza kaj malsupra basenoj de Jangzi-rivero estas unu el la plej riĉaj regionoj de Ĉinio kaj tiu loko estas konata kiel "lando abunda je fiŝoj kaj rizo".

Jangzi-rivero, senfosta kaj abunda je akvo, estas grava navigvojo de antikveco kaj honorita kiel "ora akvovojo". Pli ol 70 000 km. da akvovojo de

Jangzi-rivera sistemo taŭgas por navigado. Statistiko montris, ke la longeco de navigebla vojo de Jangzi-rivero konsistigas 70 % de la totala longeco de la landinterna navigacio. Pluraj fervojoj irantaj de sudo al nordo interkruĉiĝas kun Jangzi-rivero kaj ili kune formis vojnodojn inter sudo kaj nordo, oriento kaj okcidento. La facila trafiko sur Jangzi-rivero ludas tre grandan rolon en ekonomia disvolviĝo, interŝanĝo de kulturo kaj formiĝo de urbo en Ĉinio.

Ambaŭborde de Jangzi-rivero troviĝas dudekelkaj grandaj kaj mezgrandaj urboj kaj vivas triono de la loĝantaro de la tuta lando. Inter la urboj estas famaj kulturaj urboj kun longa historio, kiaj Kunming, Guĵiang, Ĉengdu k. a., komercaj kaj industriaj urbegoj, kiaj Ĉongĉing, Uhan kaj Ŝanhajo kaj ankaŭ granda nombro da novaj mez-

kaj malgrandaj urboj. Ili inkrustiĝas apud Jangzi-rivero kiel brilantaj juveloj.

Krome, la baseno de Jangzi-rivero havas riĉajn energion kaj mineralojn. La akva kaj elektra riĉfontoj de la Jangzi-rivera sistemo konsistigas 40 % de tiu de la tuta lando. La rezervokvantoj de titano, vanado, hidrargo, fosforo, kupro, antimono, volframo kaj kobalto superas 50 % de tiuj de la tuta lando respektive.

Tamen, la rivero iam ankaŭ furiozis. En historio ĝi kaŭzis multfojajn katastrofojn, inundis


la kampojn, kio kaŭzis disiĝon de familianoj kaj pereon de karuloj. Por preventi la inundon kaj utiligi la akvon por irigacado, la antikva ĉina popolo konstruis la famkonatan akvoutiligan konstruaĵon Duĝjangjan kaj aliajn. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 la ĉina registaro donis grandan atenton al regado kaj ekspluatado de Jangzi-rivero. Oni konstruis la inundakvodividan konstruaĵon de Ĝingĝjang-rivero, inundakvo-konservajn konstruaĵojn de Dongting-lago, Pojang-

lago kaj Hŭajang-lago, dekojn da grandaj kaj mezgrandaj akvoutiligaj konstruaĵoj, kia Geĝoŭbaraja, kaj multajn malgrandajn hidroelektrejojn, ke Jangzi-rivero fariĝis pli bela kaj alportas pli da bono al la homaro.

En Ĉinio oni havas multajn vortojn pri Jangzi-rivero. Ĝi allogas turistojn per siaj antikvaj kaj sorĉaj legendoj, eleganta kaj impona figuro kaj senĉese torentanta akvo. Karaj legantoj, aprenu tiun riveron, sekvante la spurojn de raportistoj de El Popola Ĉinio.


MAPO DE LA BASENO DE JANGZI-RIVERO

- | | | |
|----------------------------|---|----------------------|
| 1. Ĉinghaj-provinco | 8. Hubej-provinco | 14. Henan-provinco |
| 2. Tibeta Aŭtonoma Regiono | 9. Hunan-provinco | 15. Fuĝjan-provinco |
| 3. Siĉŭan-provinco | 10. Ĝuangŝji-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono | 16. Ĝeĝjang-provinco |
| 4. Junnan-provinco | 11. Ĝuangdong-provinco | 17. Ĝjangsu-provinco |
| 5. Gujĝoŭ-provinco | 12. Ĝjangŝji-provinco | 18. Ŝanhajo |
| 6. Gansu-provinco | 13. Anhuj-provinco | |






En frosta loko ĉe la fonto de Jangzi-rivero




Hutjaŭŝja-gorĝo, kies plej mallarĝa interspaco estas malpli ol 50 m.



Kurbiĝo de Ĝinŝa-rivero, la supra parto de Jangzi-rivero

La Ĉongĉing-a Pontego super Jangzi-rivero

Foto de **JAN ĜIN**





*Ĉjutang-gorĝo, unu el la tri gorĝoj
de Jangzi-rivero*



Jŭejang-turo ĉe la lago Dongting


Parto de la ĉerivera urbo Uhan

Foto de **LI ĈUNGENG**

*Ŝigong-monto ĉe la kunfluejo de
Jangzi-rivero kaj Pojang-lago*

Foto de **LIŬ ĈUNGEN**





Uhu-haveno ĉe la malsupra Jangzi-rivero

Foto de **JU SUJĈU**


Ĝinŝan-templo ĉe la rivero

Foto de **JAN ĜIN**



Ŝanhajo

La enfluejo de Jangzi-rivero



81507



Peizaço êe la fonto de Jangzi-rivero

Foto de **JU SUJCU**